# Gvidilo

al la

## 17 CELOJ POR DAŬRIPOVA EVOLUIGO
de Unuiĝintaj Nacioj




Eldonita en kunlaboro kun
**Universala Esperanto-Asocio**

**Gvidilo**
al la

**17 Celoj por Daŭripova Evoluigo**
de Unuiĝintaj Nacioj

Eldonita de Mondial, Novjorko, en kunlaboro kun
Universala Esperanto-Asocio (UEA), Roterdamo

Redaktis Humphrey Tonkin, Rakoen Maertens

© 2020 Mondial kaj UEA
ISBN 9781595694102

www.esperantoliteraturo.com

Gvidilo

al la

# 17 Celoj por Daŭripova Evoluigo

de Unuiĝintaj Nacioj

Redaktis Humphrey Tonkin, Rakoen Maertens

**Mondial, Novjorko**
en kunlaboro kun
**Universala Esperanto-Asocio, Roterdamo**

# ENHAVO

LA CELOJ POR DAŬRIPOVA EVOLUIGO ........ 6

ANTAŬPAROLO ........ 8
***Humphrey Tonkin***

ENKONDUKO ........ 14
***Rakoen Maertens***

CELO 1. NENIU MALRIĈO ........ 20
***Renato Corsetti***

CELO 2. NULA MALSATO ........ 24
***Heidi Goes***

CELO 3. BONA SANO KAJ BONFARTO ........ 29
***Christoph Klawe***

CELO 4. BONKVALITA EDUKADO ........ 34
***Mark Fettes***

CELO 5. SEKSA EGALECO ........ 39
***Manuela Ronco***

CELO 6. PURA AKVO KAJ HIGIENO ........ 48
***Allan Argolo***

CELO 7. PAGEBLA KAJ PURA ENERGIO ........ 54
***Alvaro Motta***

CELO 8. BONA LABORO KAJ EKONOMIA KRESKO ........ 59
***Giorgio Novello***

CELO 9. INDUSTRIO, INVENTEMO, INFRASTRUKTURO ........ 67
***Tamás Slezák***

CELO 10. REDUKTI MALEGALECON ........ 71
***Rafaela Urueña***

CELO 11. DAŬRIPOVAJ URBOJ KAJ KOMUNUMOJ .......................... 76
***Eric Hamelin kaj Guillaume Armide***

CELO 12. RESPONDECAJ KONSUMO KAJ PRODUKTO ................. 80
***Manfred Westermayer***

CELO 13. KLIMATA AGADO ............................................................ 87
***Orlando Raola***

CELO 14. SUBAKVA VIVO .............................................................. 92
***Francesco Maurelli***

CELO 15. SURTERA VIVO .............................................................. 96
***Said Pontes de Albuquerque***

CELO 16. PACO, JUSTO, FORTAJ INSTITUCIOJ ..............................101
***Ulrich Brandenburg***

CELO 17. PARTNERECOJ POR LA CELOJ..........................................107
***Humphrey Tonkin***

KELKAJ SPECIALAJ TAGOJ DE UNUIĜINTAJ NACIOJ ....................111

NIAJ KONTRIBUINTOJ........................................................................112

# Celoj por Daŭripova Evoluigo

dum la Periodo 2015-2030

**Akceptitaj la 8-an de septembro 2015**

1. Forigi malriĉon ĉie, en ĉiuj ĝiaj formoj.
2. Forigi malsaton, atingi manĝo-sekurecon kaj pli bonan nutradon, kaj antaŭenigi daŭripovan agrikulturon.
3. Garantii sanajn vivojn kaj kreskigi bonfarton por ĉiuj homoj en ĉiuj aĝoj.
4. Garantii inkluzivan kaj egalecan bonkvalitan edukadon kaj plivastigi por ĉiuj la ŝancojn por tutviva lernado.
5. Atingi egalecon inter la seksoj kaj plivastigi la decidopovon de ĉiuj virinoj kaj junulinoj.
6. Garantii al ĉiuj homoj haveblon kaj daŭripovan mastrumadon de akvo kaj sanitaraj sistemoj.
7. Garantii al ĉiuj homoj alireblon al pagebla, fidinda, daŭripova kaj moderna energio.
8. Antaŭenigi daŭran, inkluzivan kaj daŭripovan ekonomian kreskon, plenan kaj produktivan dungitecon kaj bonkondiĉan laboron por ĉiuj homoj.
9. Konstrui elteneman infrastrukturon, akceli inkluzivan kaj daŭripovan industriigon kaj kultivi inventemon.
10. Redukti malegalecon ene de landoj kaj inter landoj.
11. Igi urbojn kaj homajn loĝejarojn inkluzivaj, sekuraj, eltenemaj kaj daŭripovaj.

12. Garantii daŭripovajn formojn de konsumado kaj produktado.

13. Urĝe agi por kontraŭbatali klimatŝanĝiĝon kaj ties efikojn (konforme al la Kadra Konvencio de Unuiĝintaj Nacioj pri Klimatŝanĝiĝo).

14. Konservi kaj daŭripove utiligi la oceanojn, marojn kaj marajn risursojn cele al daŭripova evoluigo.

15. Protekti, restarigi kaj disvastigi daŭripovan uzadon de teraj ekosistemoj, daŭripove mastrumi arbarojn, kontraŭbatali dezertiĝon, haltigi kaj inversigi la degeneradon de grundoj kaj haltigi la perdiĝon de biodiverseco.

16. Antaŭenigi la konstruadon de pacaj kaj inkluzivaj socioj por daŭripova evoluigo, garantii aliron al justico por ĉiuj homoj, kaj starigi efikajn, respondecajn kaj inkluzivajn instituciojn je ĉiuj niveloj.

17. Plifortigi la realigajn kapablojn kaj revigligi la tutmondan partnerecon por daŭripova evoluigo.

# ANTAŬPAROLO

***Humphrey Tonkin***

Antaŭ vi troviĝas gvidilo al la Deksep Celoj por Daŭripova Evoluigo, kiun Unuiĝintaj Nacioj lanĉis en la jaro 2015, kun aprobo de ĉiuj siaj membraj ŝtatoj. La Celoj, kune kun siaj subceloj kaj aliaj detalaj planoj, formas la bazon de la evoluiga strategio de UN dum la periodo 2015-2030.

Tiu ĉi gvidilo celas informi vin pri la Celoj kaj doni sugestojn pri kiel vi kaj viaj esperantistaj kolegoj kaj konatoj povas engaĝiĝi en kunlaboro por realigi ilin.

Kial entute ni esperantistoj aliĝu al tiu internacia kampanjo? La Celoj ja ne mencias la lingvan demandon entute, kaj certe ne aludas al Esperanto. Aliflanke, se ni ne estas esperantistoj nur por esti esperantistoj, sed efektive volas krei pli bonan kaj pli egalecan mondon, la Celoj donas al ni vojon kie ni povas konversacii kun tiuj aliaj personoj kiuj same celas pli bonan estontecon – ĝuste la homoj plej malfermaj al nia ideo pri internacia lingvo. La Celoj donas al ni vojon montri kion la Esperanto-movado, kun siaj malfermaj komunikkanaloj kaj sia spirito de gefrateco, povas atingi per kunordigita kaj celkonscia laboro. Tiel, ni povas en netruda maniero atentigi pri Esperanto homojn principe favorajn al similaj valoroj.

La manko de menciado de lingvoj inter la Deksep Celoj estas frape evidenta kaj en si mem bedaŭrinda kaj erara – sed la realo estas, ke lingvoj estas unuavice rimedoj, ne celoj. Sen efika lingva komunikado, neniuj el la Celoj realiĝos – ĉar lingvoj formas la bazon de komunikado, kaj komunikado estas necesa por komuna laboro. En tiu senco, Esperanto havas rilaton kun *ĉiuj* el la Celoj. Fundamenta demando pri ĉiu Celo estas: Kiel Esperanto rilatas al tiu ĉi Celo? Kiel ni povas uzi Esperanton por realigi tiun ĉi Celon?

Kaj se ni volas progresigi Esperanton, ni prefere estu modelo por la mondo ne nur en lingva senco sed ankaŭ en farada senco: ni kunlaboru kun homoj de bona volo kaj ni alportu al la komuna agado nian specialan kontribuon, nome la kapablon unike efike kunlabori.

Ni ja povus kritiki la Celojn pro tio kio mankas – manko de atento al kulturaj (kaj sekve lingvaj) valoroj kiel dimensioj de la evoluigo; manko de atento al lingva diskriminacio, al la rolo de lingvo en politiko, edukado, amaskomunikado k.s.  Sed unu el niaj taskoj ja povas esti, ke ni atentigu pri difinitaj mankoj – sed ĉiam en konstrua, celkonscia maniero. Ni ankaŭ konsciu, ke la fakto, ke ĉiu membra ŝtato tiel facile akceptis la Celojn, povus montri solidarecon aŭ povus montri nur malfortan intencon ilin realigi: foje estas pli facile voĉdoni por io pri kio oni ne interesiĝas ol kontesti ĝin… Do, gravas insisti ĉe niaj registaroj kaj ties instancoj.

Jes, bonas kaj gravas certagrade resti en nia propra lingva medio – ĝui la amikan rondon, diskuti pri terminologio aŭ la venonta kongreso, turismi en tiu aŭ alia ekzotika loko (tiam kiam, kaj tie kie, tia turismo eblas…) – sed ankaŭ gravas agi pozitive kiel civitanoj de la mondo, kaj antaŭenigi la spiriton de Esperanto per kunlaboro kun aliaj personoj.

Do, nia helpo, nia kunlaboro, nia kuraĝo, gravas, precipe en mondo kie indiferento tro ofte venkas, kaj avaro tro ofte triumfas super justeco. Esperanto indas la penon – kaj ja la nepoj nin benos!

Ni petis deksep homojn kun apartaj kvalifikoj prezenti en tiu ĉi gvidilo la deksep Celojn. Kun ilia helpo (sed ankaŭ kun niaj propraj pensoj), ni ankaŭ kunmetis etan kolekton de ideoj pri la manieroj laŭ kiuj vi povos kunlabori en realigo de la Celoj kaj utiligi viajn unikajn kontaktojn tiurilate.

Vi certe ne konsentos pri ĉio kion niaj aŭtoroj skribas, kaj vi certe havos proprajn aldonajn ideojn pri kelkaj Celoj (ideoj kiuj, cetere, foje ripetiĝas de Celo al Celo, ĉar ili ĉiuj estas interrilataj) – sed se la rezulto de via legado estos pli da diskutado, pli da engaĝiĝo, tio per si mem antaŭenigos la debaton kaj helpos meti Esperanton tien kie ĝi devus troviĝi – en la avangardo de konstrua kaj pozitiva ŝanĝiĝo.

**KION FARI?**

**Unuope**,
vi povas

1. informiĝi pri la Celoj, tiel ke vi parolu kaj agu saĝe,
2. viziti www.esperantoporun.org kie vi trovos utilajn informojn pri la Celoj kaj la vidpunkto de UEA en tiu rilato,
3. aliĝi al lokaj, regionaj kaj naciaj grupoj aŭ organizoj kiuj laboras por la Celoj, precipe via landa Asocio pri UN (www.wfuna.org), kaj/aŭ Junulara Asocio de UN (https://www.un.org/development/desa/youth/what-we-do/what-can-you-do/unya.html),
4. fariĝi volontulo por Unesko: https://en.unesco.org/countries/associations-centres-and-clubs-unesco (la retejo ekzistas en kelkaj lingvoj),
5. proponi vin kiel kunlaboranton de la laborgrupo de UEA pri rilatoj kun UN (oni bezonas surlokan helpon en Novjorko, Ĝenevo kaj Vieno, sed oni ankaŭ akceptas helpon dedistance: skribu al info@esperantoporun.org),
6. informi viajn esperantistajn amikojn pri la problemoj kiujn la Celoj alfrontas,
7. informi viajn neesperantistajn amikojn kaj kolegojn pri tio, kion la esperantistoj faras por realigi la celojn,
8. interveni ĉe lokaj, regionaj kaj naciaj politikistoj, ĵurnalistoj k.a.,
9. uzi sociajn mediojn por disvastigi informojn kaj raporti pri tio kion vi faras,

10. verki artikolojn por amasmedioj aŭ sendi leterojn al la redakcio,
11. verki artikolon pri la Celoj, aŭ pri specifaj Celoj, por la Esperanto-gazetaro,
12. kunlabori kun fakaj Esperanto-asocioj ĉirkaŭ temoj ligitaj al iliaj interesoj kaj al la Celoj,
13. instigi aliajn esperantistojn same agi,
14. se vi havas specialigitajn, fakulajn sciojn kiuj rilatas al la 17 Celoj, meti tiujn fakajn sciojn je la dispono de via loka grupo kaj via landa asocio, kaj fortigi vian kapablon paroli kaj skribi pri ili en Esperanto,
15. regule ricevi la dumonatan informilon de la Novjorka oficejo de UEA: skribu al esperanto.un@gmail.com,

… Kaj certe ni forgesis kelkajn eblecojn!

**Grupe,**
vi povas

1. kun viaj grupanoj, analizi la Celojn el la vidpunkto de lingvo (kiujn lingvajn implicojn ili havas; kiel lingvaj demandoj rilatas al ĝia sukcesa realigo?), kaj komuniki viajn konkludojn al via landa Asocio pri UN aŭ al reprezentanto de UEA ĉe UN, por transdono al UN,
2. organizi kunvenojn (realajn aŭ virtualajn) ĉirkaŭ unuopaj Celoj, precipe se en via grupo estas fakuloj kiuj povos pli detale klarigi,
3. organizi kunvenojn por specife pridiskuti unu el la ĉapitroj en tiu ĉi Gvidilo,
4. inviti eksterajn fakulojn paroli al la grupo kaj poste (a) krei malgrandan terminaron pri la temo kaj (b) pridiskuti ĝin en Esperanto en via grupo,
5. elserĉi projekton de loka, regiona aŭ nacia (aŭ internacia) organizo, sindikato, preĝejo, UN-asocio, kaj formi kunlaborantaron el inter la loka esperantistaro (vidu ankaŭ la sekcion pri unuopuloj, ĉi-supre,

6. trovi lokan projekton iel ligitan al la Celoj, kiun vi povas realigi kiel grupo.
7. kunfesti la specialajn tagojn de UN kiujn UEA aparte rekonas; tiuj ĉi tagoj ofte tuŝas temojn rilatajn al la Deksep Celoj (ekzemple, Internacia Virina Tago [8 marto], Internacia Tago de Familioj [15 majo], Internacia Tago de Paco [21 septembro], Universala Infana Tago [20 novembro], Homrajta Tago [10 decembro] – plus kompreneble UN-Tago [24 oktobro]; plenan liston vi povas trovi ĉe http://www.un.org/en/sections/observances/international-days/

… kaj tiel plu.

**Lande**,
vi mem, kaj eble via loka Esperanto-grupo, povas instigi **vian landan asocion**

1. aliĝi al via landa Asocio pri Unuiĝintaj Nacioj kaj kunlabori kun ĝi,
2. kontakti vian landan Unesko-Komisionon kaj proponi kunlaboron,
3. fari rektan kontakton kun eventualaj oficejoj aŭ centroj de UN en via lando,
4. aperigi materialon kaj konsilojn pri la Celoj en via landa Esperanto-gazeto, Fejsbuk-paĝo k.s.
5. okazigi kunsidojn kaj diskutojn pri la Celoj en regionaj aŭ naciaj kongresoj kaj renkontiĝoj,
6. asigni al unu estrarano la taskon regule okupiĝi pri UN-aferoj kaj instigi lokajn grupojn kaj unuopulojn tion fari.

… kaj simile,

Inter la **rimedoj** facile alireblaj estas abundaj nacilingvaj retejoj de UN (precipe https://www.un.org/sustainabledevelopment/ en la diversaj UN-lingvoj kaj https://sdgs.un.org/ en la angla), de landaj asocioj pri UN, de la diversaj instancoj de UN (pri nutrado, pri sano,

pri infanoj, pri homaj rajtoj ktp.) kaj Unesko, kaj, en Esperanto, la retejo de la organizo Esperanto por UN, www.esperantoporun.org, kaj blogo pri UN sub aŭspicio de UEA https://unesperante.wordpress.com/.

En la jaro 2016, la Studogrupo pri Lingvoj kaj Unuiĝintaj Nacioj organizis en Novjorko simpozion pri “*Lingvoj kaj la Celoj por Daŭripova Evoluigo*” kies raporton (bedaŭrinde nur en la angla lingvo) vi povas trovi ĉe www.languageandtheun.org.

# ENKONDUKO

***Rakoen Maertens***

Kiel esperantistoj, ni havas unikan vidon al la mondo. Tra niaj vastaj interkulturaj spertoj per nia lingvo neŭtrala kaj nia senlima reto de diversnaciaj homoj, ni konscias pri la interligiteco de kulturoj kaj politikaj decidoj. Ni komprenas kiel kio okazas en specifa parto de la mondo povas influi aliajn partojn. Ni scias kiom utilas kunlabori, interkompreniĝi, kaj streĉi niajn mensojn por kompreni la mondon en ĝia tuto, konstatante ke la planedo, la homaro, kaj la diversaj problemoj ne estas sendependaj. Ni kaj nia movado aparte reprezentas tian pli grandan kaj integrigan vizion.

La kadro de la Celoj por Daŭripova Evoluigo (CDE-oj) de la Unuiĝintaj Nacioj (UN) ankaŭ reprezentas tian vizion en eĉ pli vasta skalo. Kiel lingva politiko de unu lando povas influi aliajn, tiel ankaŭ ŝanĝoj en subakva vivo povas influi la sanon de esperantistoj surteraj. La Celoj daŭrigas la laboron komencitan dum la mandato de antaŭa Ĝenerala Sekretario de UN, Kofi Annan (1997-2006), kiu specife emfazis la gravecon vidi la *tutan* mondon kaj la interligitecon de ĝiaj diversaj domajnoj. Same kiel niaj idealoj kiel esperantistoj, UN volas unuavice altigi la interkompreniĝon kaj kunlaboron al pli bona mondo. Kiel vi vidas, estas nature ke niaj celoj kaj tiuj de UN similas. Ne nur tio: ĝi evidentigas fruktodonan grundon por kunlaboro, kaj la CDE-oj formas propedeŭtikan kadron.

Antaŭ la CDE-oj UN havis la Jarmilajn Evoluigajn Celojn (JEC), ok celojn atingendajn inter 2000 kaj 2015. Ili markis la unuan fojon kiam UN havis tegmentan evoluigan celaron al kiu povis rekte kontribui ŝtatoj, entreprenoj *kaj* civila socio (movadoj, neregistaraj organizoj). La JEC-oj, kun diversaj sukcesoj, montris la forton kaj praktikan utilon de klaraj kaj mezureblaj celojn. Surbaze de tiu

sperto, pli ambicia tagordo estis kreita: Agendo 2030, kiu enkondukis la CDE-ojn. La sukcesa kreado kaj specife la akcepto de la nova kaj ambicia celaro estas tre granda diplomatia atingo kiu montras la forteco de efika multflankismo: ĉiuj 193 membroŝtatoj de UN aprobis ĝin (kompare: la Universala Deklaracio de Homaj Rajtoj estis aprobita nur de 48 el la tiamaj 58 membroŝtatoj).

Kiel vi povas legi en tiu ĉi gvidilo, la ambicia plano enhavas dek sep celojn. Sed ne nur tion: malantaŭ ili kaŝiĝas 169 subceloj kaj 232 indikiloj. Okazas jara revizio kaj analizo pri la progreso al plenumo de la CDE-oj, kun pinte en julio la Altnivela Politika Forumo pri Daŭripova Evoluigo, en Novjorko. Tie, pluraj landoj prezentas sian progreson al la kompletigo de la Celoj (la tiel nomataj Volontulaj Naciaj Revizioj), kaj surbaze de tio aliaj landoj kaj UN plibonigas siajn proprajn strategiojn. Ĉiu membroŝtato de UN havas komitaton kiu pritraktas la progreson, kaj neregistaraj organizoj aktivas kaj por realigi projektojn kaj por faciligi la kunlaboron. Multaj neregistaraj organizoj ne havis rektan ligon kun la CDE-oj en la komenco, sed poste tamen kontribuas kaj kadrigas sian propran laboron laŭ la CDE-oj.

Ni kiel Esperanto-movado ne rajtas manki en tiu laboro. Ĉu UEA aŭ TEJO, ĉu landa sekcio aŭ faka asocio, ĉu unuopulo aŭ grupo, ni ĉiuj povas kontribui al la monda laboro por plenumo de la CDE-oj. Farante tion, ni malfermas la pordojn al aliaj kunlaborebloj, kun organizoj lokaj, naciaj, kaj internaciaj, kiuj volas kontribui al unu aŭ pluraj el la specifaj celoj. Ni povas kontribui, gvidi eĉ, ĉefe per nia specialismo: niaj spertoj pri interkompreno, kunlaboro, lingva diplomatio, kaj tutmonda vizio. Tiuj estas gravaj lertoj, specife en mondo kiu suferos de dispolusigo. Kiel unuopulo vi eble pensas pri UN kiel fora organizaĵo kiu iel en turo pripensas mondajn strategiojn. La vero, tamen, estas pli interesa. UN estas aktiva kaj influas aktivecojn je ĉiu nivelo: en la turo en Novjorko, sed ankaŭ ĉe la popolo loka. La ideo malantaŭ la CDE-oj estas, ke ili atingu la plej

surteran lokan nivelon same kiel la plej altan internacian nivelon. Ke en via vilaĝo aŭ urbo, la ŝanĝoj kaj plibonigoj videblu, sed ankaŭ dum niaj internaciaj kongresoj kaj en interlandaj rilatoj.

Same grava, do, estas la internacia kunlaboro *kaj* la loka kunlaboro. Legante tiun ĉi gvidilon, rigardu ĉirkaŭ vi. Ĉu jam ekzistas kelkaj CDE-rilataj projektoj en via najbaraĵo, eble de la urba registaro, de loka organizo pri UN, aŭ de UN-agentejo? Se jes, ĉu vi jam estas membro de unu aŭ pliaj, kaj ĉu vi jam konscias al kiuj Celoj vi kontribuas? Kaj se mankas projektoj, ĉu ne estas almenaŭ unu el la 17 Celoj, pri kiu vi povus pasie agadi loke aŭ internacie? Kiel esperantisto eble vi ŝatas kunveni en via Esperanto-klubo aŭ socio. Kelkfoje oni serĉas manierojn por rekruti kaj engaĝi novajn membrojn en lokaj kluboj. Ĉu eble via klubo povas kunlabori kun aliaj lokaj organizoj al la realigado de la Celoj, aŭ starigi propran CDE-projekton kaj tiel montri la utilecon de Esperanto, nerekte rekrutante novajn interesitojn?

Estas grave ke ni, kiel esperantistoj, ne kaŝu nin en niaj cirkloj, sed ankaŭ ne nur iru eksteren portante verdan flagon. Ni devas montri ke ni, kiel idealisma sed serioza komunumo, zorgas pri la mondo, kaj ke nia unika kono pri kulturoj, lingvoj, kaj interkompreniĝo povas helpi al la bonfarto de la mondo, rekte kaj nerekte. La Celoj povas inspiri novajn projektojn lokajn *kaj* internaciajn, kaj kunigi esperantistojn *kaj* ne-esperantistojn.

En Britio mi kunlaboras por starigi novan tutlandan junularan platformon pri la Unuiĝintaj Nacioj, kaj nun ni kunlaboras kun la ĝenerala Asocio pri UN de la lando pri konkreta agado por la Celoj. Samtempe, en mia urbo Kembriĝo, mi okupiĝas pri projektoj kiuj temas pri loka biodiverseco. En ambaŭ projektoj, mi, kiel esperantisto, agas por kunigi diversajn personojn, organizojn kaj grupojn kiuj unuavide estas rivaloj kaj politike dividitaj, sed kadre de la Celoj povas tamen kunlabori pri konkretaj celoj. Dume, kiam mi bezonas

helpon aŭ pliajn informojn pri specifaj subtemoj, mi kontaktas specalistajn esperantistojn kiuj spertas pri la fako, utiligante nian reton. Kiel mi emfazis en ĉefparolado ĉe Unuiĝintaj Nacioj en 2019, ne gravas kiun aĝon, nacion, ideologion, etnon, genron aŭ koloron vi havas: la Celoj restas same gravaj, kaj niaj mondo kaj planedo, kiel vivantaj organismoj, bezonas nian subtenon.

Nun la pilko estas ĉe vi. La Celoj funkcias kiel praktika kaj rekte uzebla ilo por riĉigi viajn projektojn Esperantajn kaj ne-Esperantajn. Se vi serĉas novan projekton, vi povas preni tiun ĉi gvidlibron pri la Celoj, re-legi ĝin, kaj selekti unu el ili por starigi novan projekton. Kiam vi instruas Esperanton, vi povas fari tion ankaŭ utiligante la gvidilon. Kiam vi organizas kongreson, vi povas uzi la kadron de la Celoj por ligi ĉiun sesion al almenaŭ unu el la Celoj, por poste montri kiel via tuta kongreso kontribuis al la diversaj kolonoj de la Celoj. En la venontaj ĉapitroj vi legos enkondukajn eseojn pri ĉiu el la 17 celoj, verkitajn de elstaraj esperantistoj. **Renato Corsetti** parolos pri *neniu malriĉo* (#1), **Heidi Goes** pri *nula malsato* (#2), **Christoph Klawe** pri *bona sano kaj bonfarto* (#3), **Mark Fettes** pri *bonkvalita edukado* (#4), **Manuela Ronco** pri *seksa egaleco* (#5), **Allan Argolo** pri *pura akvo kaj higieno* (#6), **Alvaro Motta** pri *pagebla kaj pura energio* (#7), **Giorgio Novello** pri *bona laboro kaj ekonomia kresko* (#8), **Tamás Slezák** pri *industrio, inventemo, infrastrukturo* (#9). **Rafaela Urueña** pri *redukti malegalecon* (#10), **Eric Hamelin** *kaj* **Guillaume Armide** pri *daŭripovaj urboj kaj komunumoj* (#11), **Manfred Westermayer** pri *respondecaj konsumo kaj produkto* (#12), **Orlando Raola** pri *klimata agado* (#13), **Francesco Maurelli** pri *subakva vivo* (#14), **Said Pontes de Albuquerque** pri *surtera vivo* (#15), **Ulrich Brandenburg** pri *paco, justeco kaj fortaj institucioj* (#16), kaj **Humphrey Tonkin** pri *partnerecoj por la celoj* (#17). Tiu ĉi gvidilo montras la diversajn fakajn sciojn de nia komunumo kaj la fakton, ke esperantistoj jam kontribuas al la Celaro per siaj propraj konoj.

Ĉi jare ni festas la 75-jariĝon de UN. Granda parto de tiu festa jaro temas pri la estonteco de UN. Ni devas same pripensi, kiel nia agado rilate al UN kaj Unesko povas pliboniĝi, ekzemple per engaĝo de pli da diversaj esperantistoj kaj ne-esperantistoj en CDE-rilataj projektoj, malfermante la Esperanto-movadon kaj ties agadon pri la Celoj al la ekstera mondo. Ni montru ke ni esperantistoj zorgas pri la mondo kaj pri nia komuna estonteco. La Celaro donas al vi la povon por fari ĝuste tion.

**KION LEGI?**

**La Jarmilaj Celoj**
[EO] https://eo.wikipedia.org/wiki/Jarmilaj_Evoluigaj_Celoj
[EO] http://www.esperantoporun.org/dokumentoj/un-dokumentoj-en-esperanto/

**Raportoj pri la (mal)sukcesoj de la Jarmilaj Celoj**
[AR] https://www.un.org/ar/millenniumgoals/reports.shtml
[EN] https://www.un.org/millenniumgoals/reports.shtml
[ES] https://www.un.org/es/millenniumgoals/reports.shtml
[FR] https://www.un.org/fr/millenniumgoals/reports.shtml
[RU] https://www.un.org/ru/millenniumgoals/reports.shtml
[ZH] https://www.un.org/zh/millenniumgoals/reports.shtml

**La Celoj por Daŭripova Evoluigo**
[EO] https://eo.wikipedia.org/wiki/Celoj_por_Da%C5%ADripova_Evoluigo
[EO] http://www.esperantoporun.org/dokumentoj/un-dokumentoj-en-esperanto/

**Akceptita rezolucio pri la Celoj por Daŭripova Evoluigo (A/RES/70/1)**
[AR] https://undocs.org/ar/A/RES/70/1
[EN] https://undocs.org/en/A/RES/70/1

[ES] https://undocs.org/es/A/RES/70/1
[FR] https://undocs.org/fr/A/RES/70/1
[RU] https://undocs.org/ru/A/RES/70/1
[ZH] https://undocs.org/zh/A/RES/70/1

**Progresraportoj kaj utilaĵoj pri la Celoj por Daŭripova Evoluigo (en pluraj lingvoj)**

[EN] https://unric.org/en/sdgs-in-your-language/
[EN] Nikhil Seth k.a., *SDGs: Main Contributions and Challenges.* New York: UNITAR, 2019

**Datumbazo de naciaj progresraportoj (Naciaj Volontulaj Revizioj)**

[EN] https://sustainabledevelopment.un.org/vnrs/

**Listo de naciaj Asocioj por UN**

[EN] https://wfuna.org/una-directory

# CELO 1.
# NENIU MALRIĈO

*Renato Corsetti*

**Unua celo:**
**Ne plu malriĉeco – Finigi malriĉon ĉie, en ĉiuj ĝiaj formoj**

Kio estas komuna inter la 10 ordonoj de la kristana religio kaj la 17 celoj de Unuigintaj Nacioj por Daŭripova Evoluigo dum la Periodo 2015-2030? La fakto, ke ili estas aranĝitaj en serio, ke ili kontraŭas la profundajn instinktojn de homoj kaj tamen, ke ili estas noblaj kaj evoluigaj.

Ni vidis tra la historio, ke homoj instinkte celas deziri la aĵojn kaj la virinon de najbaroj, kaj se eble provas mortigi la najbarojn por akiri ilin. Tamen la agado de tiuj, kiuj diris, ke tio ne estas io farinda, de Moseo ĝis la nuntempa lasta vilaĝa pastro, malgraŭ ĉiuj kontraŭaj pruvoj iom efikis jarcenton post jarcento.

Same en la situacio de Unuiĝintaj Nacioj la malhelpoj al la realigo de tiuj celoj estas gigantaj kaj profunde enskribitaj en la genoj ne de la unuopaj homoj, sed en la genoj de iliaj ŝtatoj kaj de ilia ekonomia sistemo.

Tiu geno havas nomon "egoismo". En la lasta jardeko en multaj landoj de la mondo ekestis reagoj de la loĝantaro al la misfaroj de la antaŭaj registaroj, kiuj alportis al tiuj landoj politike konservemajn registarojn, kiuj memorigas onin pri la dekstraj registaroj de la 30-aj jaroj de la pasinta jarcento. Iliaj politikoj klopodas enlande forigi la rajtojn de la laboranta popolo kaj ilian aliron al sociaj servoj, kio kaŭzas pliiĝon de mizero ankaŭ en ekonomie alte evoluintaj lan-

doj. Kaj oni celas ankaŭ la plej malfortajn malplimultajn grupojn. Ne hazarde UN sendis sian Specialan Raportanton pri Ekstrema Malriĉeco kaj Homaj Rajtoj, profesoron Philip Aston, al Britujo kaj li deklaris sian hororon pri tio, ke en Britujo, “*la 5-a plej granda ekonomio en la mondo, 14 milionoj da homoj (kvinono de la loĝantaro) vivas en malriĉeco*”. Cetere lia devizo legeblas en Pepilo/ *Twitter* estas „*Malriĉeco estas politika elekto*“.

La politikoj de tiuj registaroj rilate internacian komercon provas malhelpi la liberan komercadon, alivorte la tiel nomatan tutmondiĝon, tuj, kiam oni rimarkis, ke ĝi ne plu estas profita nur por la evoluintaj landoj, sed ankaŭ permesas al evoluantaj landoj [Ĉinujo estis tia] evolui malprofite al la tiamaj profitantoj.

En ĉi tiuj kondiĉoj estas malfacile por Unuiĝintaj Nacioj fari multon, ĉar tiuj registaroj en la realo kontraŭagas kaj neas al UN la rimedojn por forigi malriĉecon, kiu povus malaperi nur se estus egaleco inter la homoj kaj justa komerco inter la landoj.

Cetere, alia efiko de la lastatempaj politikoj klare montras en la lastaj jardekoj pliiĝon de la malegalecoj en riĉeco inter individuoj kaj inter malsamaj landoj. Studo de la Monda Instituto por Esploroj pri Evolu-Ekonomio de la Universitato de Unuiĝintaj Nacioj raportas, ke 1 elcento de plenkreskuloj posedis tute sola 40 elcentojn de la riĉaĵoj en la jaro 2000, kaj ke la plej riĉaj 10% de plenkreskuloj posedis 85% el la monda sumo. La duono malsupre de la monda plenkreska loĝantaro posedis 1% de la tutmonda riĉaĵo. Pluraj fontoj indikas ke ĉi tiuj proporcioj malpliboniĝis depost la jaro 2000.

Evidente la kapitalisma sistemo estas ĉe la bazo de ĉi tio, kaj UN ne rajtas fari ion kontraŭ tio kaj kontraŭ la membro-ŝtatoj, kiuj subtenas tion. Nur la civitanoj rajtas ŝanĝi siajn registarojn, sed en multaj landoj sub la mantelo de gazetara libereco kaŝas sin la fakto, ke tiuj registaroj posedas aŭ regas la amaskomunikilojn, tiel,

ke la publika opinio estas influata voĉdoni kontraŭ siaj interesoj (la san-asekuro en Usono estas la plej klara ekzemplo pri kiu mi povas pensi), tiel, ke ankaŭ tiurilate la esperoj ne estas grandaj.

Aliflanke ni bezonas UN-on, kiu daŭre atentigas homojn pri la ĝusta vojo kaj, rilate al nia tempo, pri la bezono entute forigi malriĉecon. En la longa daŭro tio havos efikon.

Kvankam la Monda Banko anoncas, ke "*La mondo faris rimarkindan kaj senprecedencan progreson pri forigado de malriĉo en la lasta kvarono de la jarcento*", ĝi samtempe komprenigas, ke tiu progreso ŝuldiĝas ĉefe al la "*pliiĝanta riĉeco de multaj evoluantaj landoj, tute aparte en la plej loĝataj regionoj de Orienta Azio, Pacifiko kaj Suda Azio*". Alivorte la pliboniĝo de la situacio en Ĉinujo estas unu el la ĉefaj kaŭzoj. Samtempe ĝi ankaŭ rimarkas, ke "*la batalo kontraŭ ekstrema malriĉeco estas malproksima de la fino – kaj iumaniere ĝi estas fariĝanta pli malfacila. La nombro de malriĉuloj en la mondo restas neakcepteble alta, kaj iĝas ĉiam pli klare ke la bonaj efikoj de ekonomia kresko estis dividitaj malegale inter la regionoj kaj la landoj ... malriĉeco iĝas enradikiĝinta kaj pli malfacile elradikebla en kelkaj regionoj, aparte en landoj ŝarĝitaj per perfortaj konfliktoj kaj malfortaj instancoj*".

## KION FARI?

Kion ni esperantistoj individue kaj niaj landaj asocioj kaj lokaj grupoj povas fari konkrete?
Ni devas provi esti la salo de la tero kaj ekzemplo por niaj kuncivitanoj en ĉi tiu kampo en niaj landoj.

1. Unue kaj plej grave, voĉdoni por registaroj, kiuj subtenas internacian kunlaboron kaj malsubtenas naciisman politikon. (Cetere la spertoj de la provoj plaĉi al naciismaj partioj dum la 1930-aj jaroj fare de esperantistoj montris siajn limojn. Esperanto estas kombinebla kun ĉiuj idearoj krom kun naciismo.)

2. due, aranĝi prelegon en nia loka klubo pri la malfacila situacio de UN sieĝata de grandaj problemoj (klimat-ŝanĝiĝo, malriĉeco, militoj, ktp.) kaj senigata de bezonataj rimedoj fare de tiuj ŝtatoj, kiuj plej laŭte retorikas pri homaj rajtoj kaj evoluigo.
3. trie, verki artikolon pri tio por nia landa Esperanto-revuo, emfazante ke sen internaciaj organizaĵoj kaj sen internacia kunlaboro ne restas spaco por Esperanto.
4. kvare, utiligi ĉiujn eblecojn por levi en amaskomunikiloj tiujn samajn temojn, kaj en la informado per Esperanto ligi Esperanton kun paco, evoluigo, interkompreniĝo inter popoloj, kio eblas nur se ni havos funkciantajn tutmondajn organizaĵojn.
5. kvine, informiĝi en Esperanto pri la agado de Universala Esperanto-Asocio ĉe UN kaj Unesko kaj en nialingvaj komunikiloj pri la agado de UN kaj Unesko.
6. ankaŭ aliĝi, en la landoj kie tio ekzistas, al la landaj asocioj por UN kaj igi la propran landan asocion kunlabori kun ili.

**KION LEGI?**

Materialo en Esperanto pri ĉi tiuj temoj troveblas ĉe http://www.esperantoporun.org/
Serĉu ankaŭ en la katalogo de UEA, https://katalogo.uea.org/katalogo.php? per la vortoj Unuiĝintaj Nacioj kaj Unesko.

# CELO 2.
# **NULA MALSATO**

***Heidi Goes***

**La plej facile evitebla morto: malsatmorto**

Dum la unua duono de la jaro 2020 la plej ofta temo dum novaĵelsendoj en la plimulto de la landoj en la mondo estis certe la novaj ciferoj de kazoj, mortintoj ktp pro la KOVIM19-pandemio. Multaj sciencistoj en la mondo ekde tiam okupiĝas pri la disvolviĝo de vakcino. Ni povas pridemandi nin: kial tiom da peno kaj energio por atingi tion, dum oni povus multe pli facile savi multe pli da vivoj per io tre simpla: manĝaĵoj, kaj oni tion NE faras. Jes, multege pli da homoj mortos ĉi-jare pro malsato ol pro la korona viruso, kaj eĉ multe pli ol kutime, ĝuste pro tiu korona viruso aŭ pli specife, pro la limigita moveblo kiu malpliigas ekzemple la neformalan komercon kaj simple la eblecon labori por sia ĉiu-taga manĝo, kaj precipe en tiuj landoj kiel en Afriko, kie la viruso apenaŭ disvastiĝis. La kombino de jam ĝeneraligita malriĉeco, dependeco de importitaj manĝaĵoj kaj altiĝo de la prezoj manĝaĵaj kreskigas la riskon je malsato.

Kial estas tiom malfacile atingi ke neniu en la mondo malsatu? Ĉiuj jam scias ke fakte estas sufiĉe da manĝaĵoj en la mondo por nutri eĉ pli da homoj ol ekzistas. En Europo estis 'butermontaro', 'laktoflako', kaj kiom ofte jam en la lastaj jaroj farmistoj preferis forĵeti la rikoltojn aŭ ne plu rikolti, ĉar la vendoprezo ne plu kovras la elspezojn por rikolti kaj eliri por vendi. Multaj landoj produktas multe tro, kaj kiam subite iu eksportlando forfalos (ekzemple Rusio lastatempe pro bojkoto) ni postrestas kun multe tro da fruktoj aŭ

porkoj aŭ aliaj manĝaĵoj. Multege da manĝaĵoj estas detruitaj, kaj en ĉi tiu kriza situacio eĉ pli ol antaŭe. Kaj ankoraŭ ne finiĝis tiu periodo: dum la somero, la plej grava rikolta periodo, mankos pro la malpermeso vojaĝi en Europo multege da sezonaj laboristoj kiuj venas, ofte el Orienta Europo, por helpi rikolti. En Usono oni forĵetis jam lakton kaj terpomojn, kaj porko-farmistoj ricevis klarigojn pri la "eŭtanazio" de sanaj porkoj ĉar ili ne povas iri al la buĉejoj kaj tro kostas daŭre nutri ilin. La prezo tiom malkreskis, ke farmistoj povas travivi nur kiam ili produktas ĉiam pli kaj pli. Tamen en la lando ne eblas ĉiam pli konsumi, do necesas eksporti, kio nun ne plu eblas.

Ni scias do ke ne estas problemo pri manko da manĝaĵoj. Ĉu mankas la logistiko por transporti la manĝojn tien kie ili estas bezonataj? Nu, tio estas duone vera. La fakto estas ke ne eblas simple forsendi ĉion kio troas al landoj kie estas malsato: tio eĉ ne eblis antaŭ la pandemio. Krom en akutaj kazoj de subita kaj granda malsatego, tio krome detruus la lokan ekonomion, kaj tio en la pli longa daŭro kreos malsaton.

Kio do devus okazi? Memprovizo, memprovizo.... Kiel eble plej multe, manĝaĵoj devas esti produktataj kiel eble plej proksime. Oni manĝu de sia propra lando, de la propra regiono, de la propra urbo aŭ vilaĝo, kaj de la propra ĝardeno. La multegaj en- kaj eksportoj de manĝaĵoj dependigas nin de la monda ekonomio (kaj politiko!), kaj tiu transporto, kune kun la tro granda produktado, kreas krome multe da poluado. Ĉu vi scias ke la amasa produktado de la multdezirataj avokatoj kaj migdaloj, kiuj postulas multege da akvo, zorgas pri granda manko da akvo en la subteraj niveloj kaj tiel malhelpas la lokanojn kreskigi siajn proprajn legomojn? Do tiel produktado de manĝo (kun gajno por grandaj kompanioj) kreas malsaton (ĉe lokanoj kiuj mem kreskigas siajn legomojn kaj fruktojn).

Jam ekzistas en pluraj landoj ekzemploj de 'urbaj ĝardenoj', ĉu sur tegmento de grandaj konstruaĵoj, ĉu iom rande de la urbo sur antaŭe ne-uzitaj terenoj. Tie homoj povas helpi ĝardenumi kaj enŝanĝe ricevi parton de la rikolto. Ofte eblas uzi malgrandan parton por sia propra uzo. La ĝardenoj tiel ne nur provizas freŝajn manĝojn por tiuj kiuj ofte ne povas pagi tion, sed ankaŭ aldonan socian reton.

Loka produktado helpas al bio-diversigo: oni ne manĝos nur tiujn tipojn de terpomoj, rizo fruktoj kaj legomoj kiuj estas adaptitaj al grandskala produktado. En lokaj ĝardenoj eblas semi plej diversajn plantojn, kies semojn oni nepre konservu por daŭrigi la rikoltadon. Tion grandaj entreprenoj kiel Monsanto, kiuj vendas genetikajn modifitajn semojn volas preventi, kaj jam pluraj afrikaj landoj devis akcepti leĝojn kiuj malpermesas la farmistojn plu interŝanĝi la proprajn semojn, kiel ili de generacioj faras. Tiu praktiko estas subtenata de New Alliance for Food Security and Nutrition in Africa (NAFSN) [Nova Alianco por Nutraĵsekureco kaj Nutrado en Afriko], iniciatita en majo 2012 sub la aŭspicioj de la Grupo de la ok (ekde la forigo de Rusio en 2014 denove grupo de la 7). Tiel ili devigas la homojn uzi nur kelkajn tipojn de semoj, kaj ĉiu-foje necesas denove aĉeti ilin. Bio-diverseco malpliiĝas, kaj nutrado estas malpli diversa.

Multaj personoj diros pri memprovizo ke tio ne eblas kaj tiam donas ekzemploj kiel: ne eblas produkti lakton en la dezerto…. Tamen, kiom ajn malmulte oni mem produktas, jam helpos por pli sendependigi nin. Kaj kiom da ĝojo vidi kreski plantojn kiujn ni mem semis aŭ plantis! Tamen, la kutima ĝardeno, en kiu oni ĉiu-jare aŭ ĉiu-sezone denove semas, efektive probable ne estas la plej taŭga maniero memprovizi. Ni rigardu pli al arbarĝardenado, arbara agrikulturo, en kiu oni miksas arbojn, arbustojn kun legomoj kaj herboj. En tia miksaĵo oni povas sur relative malgranda surfaco rikolti multe.

**KION FARI?**

**Unuope**:

1. Kiom ajn malgranda estas via ĝardeno/korto/teraso: plantu ion manĝeblan.
2. Se vi havas grandan herbejon: forigu kaj plantu arbojn, arbustojn, legomojn, herbojn ktp.

**Grupe**:

1. Kuniĝu kaj eble kune labori en 'porpopolaj ĝardenetoj' aŭ urbaj ĝardenoj.
2. Dividu la rikolton aŭ kune kuiri dum kluba vespero.
3. Ĝentile kaj diplomate diskonigu dum la laborado Esperanton ĉe la aliaj ĝardenumuloj.

**Lande**:

1. Mobilizu viajn samlandajn esperantistojn ĉirkaŭ praktikaj projektoj.
2. Stimulu la unuopan kaj kluban agadon, raportu pri ĝi nacie en la loka lingvo kaj internacie en Esperanto.
3. Se vi havas monon aŭ eblecon kolekti monon, aĉetu terenon por komenci arbaran ĝardenadon (informiĝi pri projektoj en via lando).
4. Se tio ne eblas, almenaŭ kolektu iom da mono por helpi al afrikaj kluboj kiuj provas tiel helpi siajn samvilaĝanojn (ekz. KAE en Kongolando).

**Ĉiunivele nun pli urĝe**: se vi povas, helpu finance al organizaĵoj kiuj helpas homojn kiuj malsatas pro KOVIM-19.

**KION LEGI?**

En la nederlanda:

- https://www.mo.be/reportage/mensen-zullen-honger-lijden-terwijl-er-massaal-eten-vernietigd-wordt
- https://nos.nl/artikel/2334114-hongerpandemie-dreigt-niet-corona-zelf-maar-gevolgen-maken-meeste-slachtoffers.html
- VN: er dreigt een hongerpandemie (NRC) https://www.nrc.nl/nieuws/2020/04/22/wereld-op-rand-van-hongerpandemie-a3997616
- Hongersnood wordt erger dan coronavirus, waarschuwt VN (De Standaard) https://www.standaard.be/cnt/dmf20200422_04930842

En la angla:

- Coronavirus pandemic 'will cause famine of biblical proportions' (The Guardian) https://www.theguardian.com/global-development/2020/apr/21/coronavirus-pandemic-will-cause-famine-of-biblical-proportions
- The human cost of India's coronavirus lockdown: Deaths by hunger, starvation, suicide and more (Gulf News) https://gulfnews.com/world/asia/india/the-human-cost-of-indias-coronavirus-lockdown-deaths-by-hunger-starvation-suicide-and-more-1.1586956637547
- People don't realise what is coming': How a coronavirus crisis would unfold in war-torn Syria, Yemen or Libya (The Independent) https://www.independent.co.uk/news/world/middle-east/coronavirus-syria-yemen-libya-cases-update-death-toll-doctors-a9440486.html
- Courageous health workers on the frontline in a time of deadly COVID-19 (Relief Web) https://reliefweb.int/report/bangladesh/courageous-health-workers-frontline-time-deadly-covid-19
- http://www.fao.org/family-farming/detail/en/c/384055/
- https://eo.wikipedia.org/wiki/Agroforstumado

# CELO 3.
# **BONA SANO KAJ BONFARTO**

***Christoph Klawe***
*(Universala Medicina Esperanto-Asocio: UMEA)*

Por efike antaŭenigi bonan sanon kaj bonfarton gravas klare ekkoni la plej grandajn internaciajn defiojn, kiujn la homaro nun rilate al sano konfrontas. Bona sano por ĉiuj bezonas stabilajn vivcirkonstancojn.

Klimatŝanĝoj kaj veterkatastrofoj same kiel malpaco dum la historio de la homaro daŭre kaŭzis migradon de grandaj amasoj da homoj. Tiu problemo estas plej aktuala ankaŭ nuntempe.

Grandaj migrantaj homamasoj kaŭzas gravajn sanrilatajn problemojn.

Unu el la plej gravaj progresoj por antaŭenigi la sanrilatan bonfarton de la homaro estis la venko kontraŭ infektaj malsanoj pro la invento de efikaj medikamentoj kaj vakcinoj.

Estas granda risko de la eksplodo de epidemioj en rifuĝintejoj[1]. Por havi superrigardon pri la sanstato de rifuĝintoj, peri vakcinadojn kaj havi la eblecon tuj komence trakti ekestantajn epidemiojn necesas havi fortajn internaciajn sanorganizojn, kiuj sukcesas labori trans naciaj limoj.

Alia granda tasko por ĉiuj nacioj rezultas el epidemioj aŭ pandemioj pro jam konataj aŭ novaperintaj patogenoj. Eventoj, kiuj oku-

1 Vidu ekz. Kerry Shannon k aliaj, Cholera prevention and control in refugee settings: Successes and continued challenges. *PLoS neglected tropical diseases*, 13 (2019) 6.

pis la tutan mondan komunumon dum la lastaj jaroj, estis la diversaj eksplodoj de Ebolo-epidemioj en centra Afriko[2], la Zika-virusa epidemio en Brazilo[3], la SARS-epidemio[4], aŭ, plej aktuale, la pandemio KOVIM-19, t.e. la koronavirusa malsano, komenciĝinta en la jaro 2019.[5]

El la ĝisnunaj pripensoj estas evidente, ke komuniko inter nacioj por efike organizi kunan helpon al la ĝin bezonantaj same gravas kiel la fakto, ke oni sukcesas peri informojn al la koncernitaj grupoj kaj individuoj mem[6]. Hodiaŭ nur malmulte atentita estas la fakto, ke ofte ekzistas gravaj problemoj de lingva interkompreno ene de internaciaj helptaĉementoj[7], kiuj malhelpas efikan kunlaboron. Ĝuste pro tio gravis la ampleksa historio de la provoj de Esperantistoj antaŭenigi la disvastigon kaj uzon de Esperanto ene de la Ruĝa Kruco[8] – provoj, kiuj bedaŭrinde ne estis sukcese revivigitaj post la dua mondmilito. Helpprogramoj en regionoj trafitaj de gravaj krizoj ofte malsukcesas, ĉar lingvaj baroj ne povas esti forigitaj[9].

Kompreneble ni kredas ĝis nun, ke Esperanto povus esti bona solvo de komunikproblemoj ene de internaciaj helporganizoj kaj por peri

---

2 Paul Shears k Carrie Garavan, The 2018/19 Ebola epidemic in the Democratic Republic of Congo (DRC): Epidemiology, outbreak control, and conflict. *Infection Prevention in Practice*, 2 (2020) 1, art. 100038.

3 Gubio S. Campos, Antonio C. Bandeira k Silvia I. Sardi, Zika virus outbreak, Bahia, Brazil. *Emerging infectious diseases*, 21 (2015) 10: 1885.

4 Dan Feng k aliaj, The SARS epidemic in mainland China: Bringing together all epidemiological data. *Tropical Medicine & International Health*, 14 (2009): 4-13.

5 https://www.who.int/emergencies/diseases/novel-coronavirus-2019, rigardita 16.2.20.

6 Sara Waring, Michael Humann k Natasha Dawson, Facilitators and barriers to effective information sharing during international disaster response. *Journal of Emergency Management*, 17 (2019)6: 469-486.

7 Sergio Edgardo Castillo, The English language in the military: A study of peacekeepers, en Darío Luis Banegas k aliaj, *Authenticity in ELT*, 2017, 22-31.

8 https://www.icrc.org/en/doc/resources/documents/article/other/57jn53.htm, rigardita 23.2.20

9 https://translatorswithoutborders.org/survivors-of-cyclone-idai-33-do-not-have-information-they-understand, rigardita 16.2.20

informojn al multlingvaj loĝantaroj aŭ venki lingvajn barojn inter diversaj grupoj de migrantoj.

Tamen tre verŝajne oni devas alkutimiĝi al la fakto, ke lingvaj problemoj jam baldaŭ ankaŭ estos bone solvitaj per teknikaj rimedoj kiel tradukilo-apoj.

Ekzistas ankoraŭ aliaj taskoj por plibonigo de sano, kiuj gravas por la tuta mondo, kiel ekzemple la redukto de ĉiutaga salenigo[10] aŭ la lukto kontraŭ diabeto[11].

Kion la unuopa esperantisto povas fari por antaŭenigi la UN-celon pri sano kaj bonfarto?

Kompreneble ŝi aŭ li devus komenci ĉe si mem kaj vivi sanan vivon laŭ la kutimaj rekomendoj (grava paŝo estus redukti la salokvanton en manĝaĵoj ĝis malpli ol 5 gramoj ĉiutage).

Ŝi aŭ li devus daŭrigi la paclaboron laŭ la interna ideo de Esperanto.

Ŝi aŭ li devus pripensi apogon de internacia organizo, kiu okupiĝas pri sano, helpo en krizregionoj aŭ tiurilata internacia kunlaboro. La apogo povas okazi per financa fortigo, disponigo de individua laborforto aŭ prefere ambaŭ.

Esperanto-parolantaj medicinistoj devus aliĝi al UMEA por fortigi la pozicion de nia asocio en la medicina mondo.

Ili devus preter la ĉiutagaj devoj aparte atenti plulertiĝadon pri medicina helpo kaze de humanitaraj katastrofoj kaj mikrobiologio kaj disponigi siajn proprajn kapablojn.

---

10 https://www.who.int/news-room/fact-sheets/detail/salt-reduction, rigardita 23.2.20

11 https://ourworldindata.org/grapher/diabetes-prevalence, rigardita 23.2.20

Plibonigo de la aktuala situacio eblas. La mondo daŭre pozitive progresas[12], kaj estas nia kuna tasko apogi tiun evoluon.

**KION FARI?**

**Unuope**:

1. Vivu sanan vivon: estu bona ekzemplo por viaj konatoj, infanoj, kolegoj.
2. Laboru por paco per Esperanto: kompreno kaj kunlaboro helpas sanon.
3. Subtenu internaciajn organizojn kiuj laboras por sano kaj sana socio. Tion vi povas fari finance kaj ankaŭ kiel volontulo.
4. Se vi estas medicinisto, aliĝu al via faka organizo, la Universala Medicina Esperanto-Asocio (UMEA): http://umea.fontoj.net/

**Grupe**:

1. Trovu lokajn organizojn kiuj okupiĝas pri publika sano; proponu vian kunlaboron.
2. Kunlaboru kun lokaj Esperanto-grupoj en aliaj partoj de la mondo, por kompari sansistemojn, ekscii pri iliaj kondiĉoj, trovi komunajn projektojn.
3. Kiel bona estas via scio de terminoj pri sano? Plibonigu la lingvoscion en via grupo kaj samtempe persvadi la membrojn ekinteresiĝi pri la temo.
4. Kion faras internaciaj organizoj pri sanecaj demandoj – ekzemple la Monda Organizo pri Sano? Esploru la reton kaj dividu kun viaj grupanoj la informojn. Traduku ilin en Esperanton.

12 https://upload.wikimedia.org/wikipedia/commons/0/06/The_World_as_100_People.png, alrigardita 23.2.20

**Lande**:

1. Esploru la eblecon starigi kunlaboron inter via landa asocio kaj tiu en alia lando ĉirkaŭ sanecaj demandoj, komencante per kontakto kun medicinistoj-esperantistoj en la du landoj.
2. Trovu la medicinistojn en via landa asocio kaj konvinku ilin aliĝi al UMEA.

# CELO 4.
# BONKVALITA EDUKADO




***Mark Fettes***

**Celo 4. Garantii inkluzivan kaj egalecan bonkvalitan edukadon kaj plivastigi por ĉiuj la ŝancojn por tutviva lernado**

Edukado estas potenca rimedo por socia plibonigo; ĝi estas ankaŭ potenca rimedo por *malhelpi* la evoluon de minoritatoj, knabinoj, handikapitoj kaj aliaj grupoj kiuj ne konformas al la regantaj normoj de difinita socio. Tial UN emfazas, ke edukado estu *inkluziva kaj egaleca* – ke ĉiuj ricevu similajn ŝancojn kleriĝi kaj disvolvi siajn kapablojn. Tio estas nobla celo, kiu kaŝas multajn komplikaĵojn.

Edukado mem ampleksas multajn diversajn nivelojn kaj organizajn kadrojn. La kerno de la eduka sistemo en pli-malpli ĉiuj landoj konsistas el bazlernejoj, por infanoj ĝis la aĝo ĉirkaŭ 10-12 jaroj, kaj mezlernejoj, por pli aĝaj infanoj ĝis 16-18 jaroj. Tamen vastaj nombroj de infanoj tra la mondo ankoraŭ ne frekventas eĉ la bazlernejon. La kialoj estas diversaj. Laŭ UN, ĉ. 50 milionoj da infanoj ne povas iri al lernejo pro milito. Malpli ol duono de la knabinoj en la plej malriĉaj landoj trapasas la unuajn jarojn de la mezlernejo. Handikapitaj infanoj tra la mondo (ĉ. 100 milionoj) spertas barojn al partopreno; 40% da ili entute ne iras al lernejo. Kaj tiel plu. Provizi sekurajn kaj alireblajn lernejojn por ĉiuj infanoj de lerneja aĝo estas do surprize komplika tasko.

Sed tio estas nur la komenca defio. Ĉiuj esploroj indikas, ke la plej grava faktoro en la sukceso de lerneja edukado estas la kapabloj de la instruisto. Bonkvalita edukado do postulas motivitajn, inteligen-

tajn, bone trejnitajn instruistojn kun akcepteblaj laborkondiĉoj. Sed edukado estas unu el la plej multekostaj sociaj servoj, kaj do suferas de konstanta buĝeta premo. Trejnado kaj salajroj estas ofte minimumaj, kaj laborkondiĉoj tiaj, ke ili subfosas la motivitecon de la dungitoj. (Tiel estas ne nur en malriĉaj landoj. Malriĉaj kamparaj kaj urbaj regionoj ene de la riĉaj landoj ofte spertas similajn problemojn.)

Kompreneble, edukado ne okazas nur en lernejoj. Gravegan rolon ludas la hejma edukado, kiu multe dependas de la eduknivelo de la gepatroj, la stabileco de la vivcirkonstancoj, la ekzisto de subtena familia reto aŭ komunumo, kaj tiel plu. Kaj la rilatoj inter la familio kaj la lernejo ne estas ĉiam bonaj; povas temi pri kulturaj kaj lingvaj diferencoj, sed ankaŭ pri klasaj kaj religiaj diferencoj, pri malsamaj valoroj kaj konceptoj pri edukado, ktp.

Fine, gravas ankaŭ la rilato inter la lernejo kaj la posta vivo. Ĉu la scioj kaj kapabloj, kiujn flegas la lernejo, estas uzeblaj nur en difinitaj karieroj en la grandaj urboj, aŭ ĉu ili utilas por plibonigi la vivon kaj la laboreblojn je loka nivelo? Ĉu infanoj kun speciala talento pri tiu aŭ alia fako havas realan ŝancon plustudi? Ĉu ekzistas gamo de plustudaj eblecoj, de teknikaj lernejoj ĝis bonkvalitaj universitatoj? Ĉu la edukado pretigas junajn homojn por la aliaj defioj de la vivo – pri sano, amrilatoj, prizorgo de infanoj, civitaneco, homaj rajtoj, politiko?

Sub Celo 4 el la Celoj por Daŭripova Evoluigo, la ŝtatoj de UN akceptis kunlabori pri ĉiuj ĉi defioj. La subceloj inkluzivas:

- Senpagan, egalecan, bonkvalitan bazlernejan kaj mezlernejan edukadon por ĉiuj;
- Antaŭlernejajn preparprogramojn por familioj kaj infanoj, kiuj bezonas ilin;
- Pageblan, bonkvalitan superan edukadon de diversaj specoj, egale alireblan por viroj kaj virinoj;

- Signifan plinombriĝon de gejunuloj kaj plenkreskuloj kun bona faka eduko por diversaj karieroj;
- Forigon de baroj al la edukado de virinoj, handikapitoj, indiĝenoj, kaj infanoj en malfacilaj vivcirkonstancoj;
- Universaligon de la kapablo legi kaj skribi inter gejunuloj; plinombriĝon de plenkreskuloj kun tia kapablo;
- Universalan edukadon por daŭripova evoluigo;
- Plibonigon de lernejaj konstruaĵoj, de instruista trejnado, kaj de financa subteno por studentoj en supera edukado.

La antaŭlasta subcelo meritas apartan komentadon. Edukado rolas en la realigo de ĉiuj aliaj Celoj, kaj inverse, ĉiuj aliaj Celoj povus kaj devus influi la planadon kaj realigon de Celo 4. Kelkaj kunligoj estas jam evidentaj, ekzemple kun Celo 5, pri seksa egaleco, t.e. la forigo de diskriminacio kontraŭ virinoj, kiu troviĝas kerne en la konceptado de Celo 4. Tamen eĉ pri tio oni povas starigi demandojn: ĉu instruistoj bezonas specialan trejnadon por doni egalan atenton kaj subtenon al knaboj kaj knabinoj? Ĉu seksa egaleco devus esti temo en la lernprogramo? Kia estu la rolo de apartaj lernejoj aŭ klasoj por knaboj kaj knabinoj? Kion fari pri kulturaj konceptoj pri la respektivaj roloj kaj moroj de knaboj kaj knabinoj? Eĉ en la riĉaj landoj, ne regas unuanimeco pri tiuj demandoj, nek ekzistas universalaj solvoj.

Similajn rimarkojn oni povus fari pri ĉiuj aliaj Celoj: pri sano, (mal)riĉeco, paco kaj justeco, manĝoproduktado, energio, ktp ktp. Neniu scias kun certeco, kia edukado estas efektive bezonata por evoluigi daŭripovajn sociojn en daŭripova mondo; sed ni rajtas suspekti, ke la edukado mem bezonas ŝanĝiĝi sufiĉe multe por atingi tiun celon.

**KION FARI?**

**Diskuttemoj (por lokaj grupoj kaj renkontiĝoj, landaj kongresoj k.s.)**

1. Kiom inkluzivaj estas la lernejoj en via propra urbo, regiono aŭ lando? Kion vi scias pri grupoj kiuj spertas malfacilaĵojn partopreni kun egalaj ŝancoj en la lerneja sistemo? Kiajn solvojn tiuj grupoj proponas aŭ elprovas?
2. Ĉu diversnivela edukado en via urbo, regiono aŭ lando donas egalajn ŝancojn al knaboj kaj knabinoj? Ĉu ĉiuj fakoj estas egale alireblaj por ambaŭ seksoj? Ĉu vi opinias, ke iuj ŝanĝoj tiurilate estas necesaj aŭ dezirindaj?
3. Edukistoj argumentas, ke edukado en la denaska lingvo estas dezirinda, unuavice en la bazlernejo sed ankaŭ poste. Aliflanke lernejoj kutime emfazas nur unu aŭ du oficialajn lingvojn de la lando. Ĉu la lernejoj en via urbo, regiono aŭ lando trovis bonan ekvilibron inter tiuj postuloj? Ĉu ŝanĝoj estas dezirindaj?
4. Ĉu vi jam en via nacia lingvo spertis edukadon pri daŭripova evoluigo – t.e. pri temoj kiuj rilatas al la evoluigo de daŭripovaj socioj? Kian edukadon pri tiaj temoj vi ŝatus vidi, aŭ mem sperti? Ĉu la Esperanto-movado povus kontribui al tia edukado?

**Esploraj kaj kunlaboraj projektoj**

1. Kion vi scias pri la lernejaj aŭ aliaj edukaj spertoj de esperantistoj en aliaj landoj? Enketu inter viaj amikoj! Interŝanĝu rakontojn pri elstaraj (aŭ malbonegaj) instruistoj, neforgeseblaj spertoj, revoj realigitaj aŭ maltrafitaj. Kion eblas konkludi pri la vivoŝanĝa povo de edukado?

2. Kiuj organizoj en via lando (lokaj, landaj, internaciaj) laboras por plibonigi edukadon? Ĉu iuj laboras specife pri daŭripova evoluigo? Ĉu povus esti rolo por Esperanto en la perado de kontaktoj kaj informoj, aŭ la aktiva engaĝiĝo de esperantistoj pri difinita projekto?
3. La Esperanto-organizoj ILEI kaj Edukado.net provizas multajn informojn kaj rimedojn por kleriĝi kaj aktiviĝi pri edukado. Esploru iliajn retejojn, aliĝu al ili, partoprenu en diskutoj, kursoj, kaj projektoj!

**KION LEGI?**

Unesko pri edukado (en la oficialaj lingvoj de UN: angla, araba ĉina, franca, hispana, rusa):

- https://en.unesco.org/themes/education
- https://ar.unesco.org/themes/education
- https://cn.unesco.org/themes/education
- https://fr.unesco.org/themes/education
- https://es.unesco.org/themes/education
- https://ru.unesco.org/themes/education

Unesko pri edukado por daŭripova evoluigo (en la samaj lingvoj):

- https://en.unesco.org/themes/education-sustainable-development
- https://ar.unesco.org/themes/education-sustainable-development
- https://zh.unesco.org/themes/education-sustainable-development
- https://fr.unesco.org/themes/éducation-au-développement-durable
- https://es.unesco.org/themes/educacion-desarrollo-sostenible
- https://ru.unesco.org/themes/obrazovanie-v-interesah-ustoychivogo-razvitiya-0

# CELO 5.
# SEKSA EGALECO

***Manuela Ronco***

**Atingi egalecon inter la seksoj kaj plivastigi la decidopovon de ĉiuj virinoj kaj junulinoj.**

Seksa egaleco kaj povigado de virinoj kaj knabinoj ne nur estas unu el la 17 Daŭripovaj Evoluigaj Celoj en la Agendo 2030, sed ligiĝas kun ili ĉiuj. Virinoj konsistigas duonon de la homaro, kaj tiel ankaŭ duonon de ĝia potencialo. Pro tio seksa egaleco, krom esti fundamenta homa rajto, reprezentas necesan bazon por paca, prospera kaj daŭripova mondo. Provizi al virinoj kaj knabinoj egalan aliron al edukado, sanservo, deca laboro kaj reprezentado en politikaj kaj ekonomiaj decidaj procezoj nutros daŭripovajn ekonomiojn kaj profitigos sociojn kaj la homaron ĝenerale.

La Komisiono pri la Statuso de Virinoj de Unuiĝintaj Nacioj, fondita en 1946, estis la unua monda interregistara organo ekskluzive dediĉita al la antaŭenigo de seksa egaleco kaj povigado de virinoj. Ĝia starigado estis nur la komenco de longa proceso, markita de historiaj momentoj, signifaj atingoj kaj persistantaj defioj. Grava jaro de tiu ĉi historio estas 1975, kiam okazis en Meksiko la unua Monda Konferenco pri Virinoj. Ĝia rezulto estis la Meksika Deklaro pri Egaleco de Virinoj kaj Ilia Kontribuo al Evoluo kaj Paco. La jaro 1975 estis ankaŭ deklarita "Internacia Jaro de la Virino", kaj ekde tiam ĉiujare UN festas la Internacian Virinan Tagon, la 8an de marto (oficialigita en 1977).

En 1979, la Ĝenerala Asembleo de UN adoptis la Konvencion pri Elimino de Ĉiuj Formoj de Diskriminacio kontraŭ Virinoj, ankaŭ konata kiel "Ĉarto de Virinaj Rajtoj". Ĝi estas la plej ampleksa internacia rimedo por protekti la homajn rajtojn de virinoj. Ĝi difinas la signifon de diskriminacio kontraŭ virinoj kaj starigas leĝajn devojn por fini tian diskriminacion, same en la publika kiel en la privata sferoj, inkluzive de familio. Ĝi celas atingi egalecon inter virinoj kaj viroj ne nur laŭ la leĝoj, sed ankaŭ konkrete en la ĉiutaga vivo.

La Kvara Monda Konferenco pri Virinoj de UN, en septembro 1995, markas mejlostonon en la historio de virinaj rajtoj. Entute 189 landoj unuanime adoptis progresigan planon por virina povigo. La Deklaracio de Pekino skizas celojn kaj agojn en 12 kritikaj areoj por antaŭenigi virinajn rajtojn kaj, ekde ĝia adopto, ĉiujn kvin jarojn, okazas tutmondaj revizioj por taksi la progresojn kaj la mankojn en ĝia efektivigo.

Ĉe la Jarmila Pintkunveno en septembro 2000, mondaj estroj el 189 nacioj adoptis la Jarmilan Deklaron de UN, el kiu deriviĝis la ok Jarmilaj Evoluigaj Celoj (http://www.esperantoporun.org/dokumentoj/un-dokumentoj-en-esperanto/chefaj-un-dokumentoj/), kun limdato de 2015, por redukti ekstreman malriĉecon. Dum ĉiu celo estas neeviteble ligita al progresado de virinaj rajtoj, la Celo 3 specife alvokas antaŭenigon de seksa egaleco kaj la Celo 5 plibonigon de patrina sano. Dek kvin jarojn poste, mezureblaj rezultoj estis atingitaj en tiuj kampoj, inkluzive preskaŭ egalan aliron al baza edukado inter knabinoj kaj knaboj kaj signifa malaltigo de la patrina mortokvanto. Danĝeraj praktikoj kiel infanaj geedziĝoj kaj mutilado de inaj generaj organoj malpliiĝis, sed ankoraŭ multe da laboro farendas por tute forigi ilin.

Kvankam estas grandaj diferencoj pri la virina situacio en diversaj mondopartoj, nuntempe neniu lando povas diri, ke ĝi atingis seksan egalecon. Laŭ la raportoj de 2018, virinoj reprezentis 39% de la

laborforto, sed nur 27% de la manaĝeraj postenoj. La disdivido de la nepagitaj prizorgaj kaj hejmaj taskoj estas ankoraŭ malegala. Nur 24% de la membroj de naciaj parlamentoj estis virinoj. 35% de virinoj inter 15-49-jaraĝaj spertis fizikan aŭ seksan perforton, ofte fare de intima partnero, kaj 49 landoj ne havas leĝojn protektantajn virinojn kontraŭ hejma perforto. Aldone, neforgesendas la diskriminacioj suferitaj de lesbaj, gejaj, ambaŭseksaj kaj transgenraj (GLAT) kaj kviraj homoj, kiuj estas klare ligitaj al ilia seksa identeco kaj manifestiĝas en ilia vundebleco al socia ekskludo, al perfortaj atakoj kaj al neado de bazaj servoj.

Inter la kritikoj faritaj al la Jarmilaj Evoluigaj Celoj estas tiu, ke ili prioritatigis facilan kaj komunikeblan agadon, ellasante problemojn pli kompleksajn kaj strukturajn, aŭ ke ilia agadkampo estis tro limigita por krei vere daŭripovan ŝanĝon. Pro tio la novaj Celoj por Daŭripova Evoluigo estas multe pli vastaj, ampleksaj kaj intermiksitaj. Tio kongruas ankaŭ kun la invito de P. Kožuchová adopti pluranecan perspektivon ankaŭ en la E-agadon pri seksegaleco: *"Pluraneco estas aliro kiu agnoskas ke identecoj kiel raso, klaso, seksorientiĝo, handikapeco, religio, aĝo ktp estas ne nur plurope haveblaj, sed eĉ nedisigeble interligitaj, same kiel la subpremoj, kiujn oni spertas surbaze de ili. Tial ankaŭ nia agado kontraŭ subpremado devas konsideri tiun interligitecon. Laŭ mia opinio la egaleco kiun ni strebu atingi nepre estu ne nur genra, sed pluraneca. Bedaŭrinde, nuntempe ni anstataŭe plej ofte renkontas okcidentan, blankan, cisnorman, heteronorman, mezklasan version de 'feminismo'."*

En 2020, vere transforma tagordo pri seksa egaleco kaj rajtoj de knabinoj kaj virinoj estas bezonata. Sed, por ke tio okazu, necesas vera devontigo de ĉiu sektoro en ĉiu socio. Ni ne povas kaj ne devas moliĝi kaj permesi al maljusteco kaj malegaleco prosperi. Ni devas resti kritike konsciaj pri povo kaj pov-malekvilibroj, rimarkigi ilin kaj defii ilin.

**Tri manieroj por antaŭenigi seksan egalecon en Esperantujo**

Estas multaj, simplaj ĉiutagaj agoj, per kiuj ni ĉiuj povas kontribui al atingo de la Celoj por Daŭripova Evoluigo. Ĉi-sube mi listigos nur tri aspektojn de seksegaleco, kiuj laŭ mi aparte bone aplikiĝas al E-medio, kun sugestoj pri konkretaj paŝoj entreprenendaj de organizoj kaj unuopaj esperantistoj.

## 1. Rifuzi seksismon kaj seksĝenadon

Kvankam ĝenerale esperantistoj estas malfermmensaj kaj amikemaj homoj, ne ĉiam Esperantujo estas tute sekura loko por virinoj kaj aliaj marĝenigitaj grupoj. Seksismaj, gejofobiaj aŭ transfobiaj ŝercoj kaj atakoj aperadas en Esperantaj sociretejaj grupoj, knabinoj spertas seksĝenadon dum Esperantaj kongresoj, ktp. Organizoj kaj organizantoj devas trovi rimedojn por preventi kaj kontraŭstari tiajn fenomenojn. Bonaj praktikoj, jam uzataj en kelkaj junularaj Esperanto-eventoj, estas regularoj per kiuj oni eksplicite kaj firme rifuzas diskriminacion, perforton kaj (seks)ĝenadon, kun eventuala indiko de iuj taŭgaj kaj trejnitaj homoj, kiuj povas provizi subtenon al viktimoj de tiaj kondutoj kaj helpi solvi konfliktojn. Administrantoj de retaj spacoj aktive subtenu inkluzivan kaj senperfortan komunikadon, per klaraj gvidlinioj kaj firma interveno en kazo de ilia malrespekto.

## 2. Amplifi virinajn voĉojn en arto, faka agado, ktp.

Filmoj, libroj, gazetoj, podkastoj kaj aliaj artaj kaj informaj medioj havas daŭrajn efikojn sur la kulturaj perceptoj de seksoj, provizante al virinoj platformon por kundividi siajn rakontojn kaj perspektivojn.

"*En la Baza Legolisto de William Auld el 1997, en kiu estas menciitaj 59 verkoj, nur 6 estas aŭtoritaj de virinoj*". Ne nur la Esperanto-

literaturo, sed ankaŭ la Esperanto-muziko kaj -teatro estas dominataj de viroj. Kiam la kulturajn, artajn kaj fakajn programojn de niaj Esperantaj kongresoj plenigas preskaŭ nur viroj, tro facilas pensi, ke tia malekvilibro estas hazardaĵo aŭ ke ĝi ne estas vera problemo. Anstataŭe necesas sindemandi kial tio okazas kaj konkrete agi por ekvilibrigi la situacion. Tiu demando devas aperi en la kunsidoj de estraroj kaj organizaj teamoj, sed ankaŭ unuopuloj povas doni sian kontribuon. Kiel? Konsideru aĉeti libron aŭ muzikalbumon verkitan de ino, kaj verki recenzon pri ĝi aŭ paroli pri ĝi en la sociaj retejoj. Kuraĝigu esperantistinojn de vi konatajn partopreni artajn konkursojn, verki artikolojn, proponi koncertojn kaj prelegojn. Se vi havas la okazon, kontaktigu ilin kun organizantoj, redaktoroj, eldonistoj, k.s.

Aldona rimarko estas, ke ofte virinoj havas malpli grandan ŝancon partopreni en iuj aktivecoj kaj videbligi sin, ĉar ilia tempo kaj energio konsumiĝas en aliaj “nevideblaj” taskoj. Ni devas do atenti ekzemple ĉu niaj kongresoj estas alireblaj al patrinoj, sed, krome, ĉu ankaŭ en nia movado ripetiĝas la malegala disdivido de taskoj. Kiu pretigas la bufedon, kiu purigas post la festo, kiu provizas emocian subtenon dum konfliktoj? Kaj kiu parolas surpodie, kiu gvidas la sciencan forumon? Se vi vidas, ke iuj taskoj aŭ fakoj estas tradicie lasitaj al homoj de la sama sekso, estas tempo proponi ŝanĝon.

## 3. Pridiskuti la seksan duumon kaj adopti pli inkluzivan lingvouzon

“*Pli kaj pli da esperantistoj sentas la bezonon paroli pri homoj sen indiki ilian sekson.[...] Unuflanke la sekso de persono ne plu havas tiel gravan socian rolon kiel en antaŭaj tempoj, aliflanke kreskis la konscio pri tio, ke sekso ne nepre estas duuma kategorio, ĉar ekzistas homoj, kiuj laŭ sia identeco, socia rolo kaj/aŭ korpaj ecoj estas nek nur-virseksaj nek nur-inaj*.”

Plie, “*estas multaj kulturoj mondskale, kiuj agnoskas diversmaniere ‘trian genron’ [...] Multaj el ĉi tiuj tradicioj eltretiĝis aŭ preskaŭ eltretiĝis de la brita imperio aŭ hispana konkerado, kaj verŝajne estis multaj, pri kiuj ni nun ne scias [...] Ĉar Esperantujo konsideras sin neŭtrala, egala, kaj tutmonda, ni devus agnoski ĉi tiun diversecon kaj ĝin reprezenti*”.

La ĉiutaga lingvo ludas grandan rolon por rompi seksajn stereotipojn kaj malakcepti la duumon de “vira aŭ ina”. Jam de la 1970aj jaroj ekaperis diskutoj kaj reformaj proponoj de Esperanto, tiurilate, el kiuj eble la plej konata kaj disvastiĝinta estas riismo.

Sendepende ĉu oni volas uzi neoficialan seksneŭtralan pronomon, dum lecionoj, prelegoj, publikaj prezentoj, kiam ajn oni parolas pri homo, oni ne supozu scii ties sekson aŭ uzatan personan pronomon nur laŭ ties aspekto. Unu maniero malfermi konversacion estas doni sian preferon: diru vian pronomon kiam vi enkondukas vin aŭ aldonu ĝin al via retpoŝta subskribo kaj al viaj sociretejaj profiloj. Krome, ne referencu aŭ malkaŝu la seksorientiĝon aŭ seksan identecon de iu sen ties konsento.

Aliaj etaj rimedoj dum organizado de eventoj povas igi ilin pli inkluzivaj. Ekzemple eblas meti en la aliĝilo pli ol du elektebloj por la kampo “sekso”, eblas krei nomŝildojn kun spaco por indiki sian pronomon kaj decidi havi seksneŭtralajn necesejojn.

**KION FARI?**

**Unuope:**

1. Rifuzu seksismon kaj seksĝenadon.
2. Se vi administras retejon, klubon, similan agadon, aktive subtenu inkluzivan kaj senperfortan komunikadon.

3. Aĉetu librojn, muzikalbumojn k.s. faritajn de virinoj, kaj subtenu virinan agadon en kaj ekster la Esperanto-movado.
4. Sekvu podkastojn, retejojn ktp. faratajn de virinoj.

**Grupe:**

1. En via loka grupo laboru por inkluzivi virinojn en grupaj programoj, diskutoj kaj (precipe) gvidaj pozicioj.
2. Diskutu kun viaj grupanoj problemojn kaj solvojn de sekse bazitaj gramatikaj k.s. karakterizoj de la lingvo Esperanto. Kiel aspektus plene inkluziva Esperanto?
3. Organizu grupkunsidojn pri la situacio de virinoj kaj la ofteco de seksa diskriminacio en via lando kaj aliaj; kolektu informojn tiucele, eble en kunlaboro kun aliaj grupoj.
4. Diskutante literaturajn verkojn en Esperanto, ekzamenu la antaŭsupozojn de la aŭtoro kaj de la karakteroj pri seksaj kaj genraj demandoj.

**Lande:**

1. Certigu, ke en via landa asocio oni estu plene malferma al inkluziva konsistigo de estraroj, komitatoj k.s., kaj ke oni aktive celu diversecon.
2. Instigu uzadon de inkluziva lingvaĵo en vialanda Esperanto-revuo kaj aliaj eldonaĵoj.
3. Instigu vian landan asocion ĉiam konsideri demandojn de inkluziveco en organizado de kongresoj, konferencoj k.s.
4. Se via landa asocio havas sistemojn kaj servojn por faciligi lernadon de Esperanto, faru aparte fortajn klopodojn por inkluzivi virinojn kaj instigi ilin lerni la lingvon.

## KION LEGI?

**Konsiloj por plia legado kaj aŭskultado**

LIBROJ:

- Simone de Beauvoir, *Le deuxième sexe (La dua sekso)*.
- Chimamanda Ngozi Adichie, *We Should All Be Feminists (Ni devus ĉiuj esti feministoj)*
- Elisabeth Burgos-Debray k Rigoberta Menchú, Me llamo Rigoberta Menchú y así me nació la conciencia, 1983. Biografio de la homrajta aktivisto kaj Nobel-premiito Rigoberta Menchu pri ŝia vivo kaj pri la batalo por la rajtoj de indiĝenaj virinoj.
- Malala Yousafzai, *Mi estas Malala: La knabino kiu defendis edukadon kaj estis pafita de la talibano.*
- Marie Mies k Vandana Ŝiva, *Ecofeminism*, 2014, Libro pri kiel la virina movado povas kontribui al klimata agado kaj al aliaj sociaj movadoj.
- Eliza Orzeszko, *Marta.* Rakonto el pola lingvo tradukita de D-ro L. L. Zamenhof.

REVUOJ, RETEJOJ, BLOGOJ kaj PODKASTOJ

- Sekso kaj Egaleco, feminisma Esperanto-revuo redaktita de Anna Brennan (Anna Löwenstein) inter la jaroj 1979 kaj 1988. https://bitarkivo.org/gazetoj/seksokajegaleco#numero-000-oktobro-1979
- Egalecen, La unua blogo pri pluraneca feminismo en Esperanto. https://egalecen.org/
- Esperanto kaj sekso, artikolo de Markos Kramer en https://lingvakritiko.com/2014/10/16/esperanto-kaj-sekso/
- UN Women https://www.unwomen.org/ (retejo disponebla en la angla, franca kaj hispana lingvoj).

- Women Deliver https://womendeliver.org/ estas tutmonda organizo, kiu pledas por seksa egaleco kaj sano kaj rajtoj de knabinoj kaj virinoj.
- *Les couilles sur la table,* podkasto en la franca lingvo, kiu esploras diversajn aspektojn de nuntempaj virecoj. *https://www.binge.audio/category/les-couilles-sur-la-table/*.

# CELO 6.
# **PURA AKVO KAJ HIGIENO**

***Allan Argolo***

## La Akva kaj Sanitara Defio

*Akvo kaj pano servas al sano*: jen nedubebla proverbo, ĉar ambaŭ ja necesas por homa vivo. Ne hazarde la pracivilizoj ekfloris proksime de riveroj kaj kultiveblaj grundoj. Niaj praŭloj antaŭ jarmiloj kreis kaj evoluigis sistemojn de akvoprovizado, akvorezervado por sekaj periodoj kaj irigacio por sekaj grundoj. Ankaŭ ekzistis elementaj konceptoj pri pureco, tiel ke laŭeblaj sistemoj forkondukadis ekskrementojn, kaj eĉ rudimenta reuzado de tiuj lastaj kiel sterkakvo troveblas en la historio.

Tamen, la tempolinio de sanitaraj servoj estas nekonstanta. Ĝi prezentas evoluojn kaj mispaŝojn, depende de historiaj, sociaj, sciencteknikaj, politikaj, ekonomiaj kaj kulturaj variabloj. Tial, jarmiloj post la romianaj akveduktoj kaj *Cloaca Maxima*, 2,2 miliardoj da homoj en la mondo ankoraŭ ne havas aliron al sekuraj akvoservoj kaj 4,2 miliardoj ne disponas je taŭgaj sanitaraj sistemoj. Tial, pli ol jarcento post la rilatigo de ĥolero al malpura akvo fare de John Snow, du miliardoj da homoj uzas trinkakvojn el fontoj infektitaj de ekskrementoj kaj 297 000 infanoj ankoraŭ mortas ĉiujare pro laksaj malsanoj ligitaj al la manko de sekura trinkakvo, taŭga salubrigo kaj higieno. Same kiel ĉiuj strukturaj problemoj, plej suferas tiuj je vundeblaj situacioj kaj el malaltaj soci-ekonomiaj tavoloj.

Tutkohere, tiu temo enkadriĝas en la Celoj por Daŭripova Evoluigo (CDE) de Unuiĝintaj Nacioj (UN), kies sesa celo estas antaŭ 2030 *garantii al ĉiuj homoj haveblon kaj daŭripovan mastrumadon de*

*akvo kaj sanitaraj sistemoj*. Sekura trinkakvo kaj aliro al taŭgaj sanitaraj servoj estas fundamentaj homaj rajtoj ekde 2010, laŭ deklaro de la Ĝenerala Asembleo de UN, ankoraŭ en la kunteksto de la Jarmilaj Evoluigaj Celoj (2000–2015). Tiu homa rajto indikas ke ĉiuj havu sufiĉan, sekuran, akcepteblan, fizike atingeblan kaj pageblan trinkakvon por siaj personaj kaj hejmaj uzoj. Aldone, universala aliro al sanitara servo estas fundamenta por homa digno kaj privateco, same kiel ŝlosila paŝo al protektado de akvaj resursoj.

Kvankam oni atingis kelkajn progresojn dum lastaj jardekoj, multo farendas ĝis 2030. Inter la subceloj, gapige elstariĝas la plenumenda tasko fini la subĉielan fekadon (t.e. en malfermaj spacoj, riveroj, arbaroj), kio ankoraŭ estas kutimo de 673 milionoj da homoj, ĉefe en kamparaj regionoj. Malgraŭ nuntempa malgrandiĝo de tiu nombro mondskale, ĝi kreskas loke en kelkaj regionoj de Afriko kaj Oceanio pro demografia kresko. La kultura trajto de tiu kutimo ankaŭ estas baro, kaj akceliga strebo necesas por plenumi la celon ankaŭ en centra, suda, orienta kaj sudorienta Azio. Krome, tiu subcelo kaj la manko de taŭgaj higien-instajaĵoj reliefigas la vundeblecon de infanoj kaj virinoj, ĉu pro endanĝerigo al (seks)perforto ĉu pro menstrua tabuo kaj alligitaj san-problemoj.

Higieno montriĝas aparte fatala pro la pandemio de KOVIM-19, ĉar la plej baza prevento kontraŭ ĝi dependas de aliro al pura akvo kaj sapo por manlavado, sed tio mankas (ekzemple) en preskaŭ duono de la lernejoj en la mondo. Refoje, la efiko de tiu malsano forte trafas malriĉajn komunumojn kie mankas salubrigo kaj sanitaraj servoj.

Evidentiĝas ankaŭ la interrilato de la temo akvo kaj salubrigo kun la aliaj CDE, kiuj estas esence interdependaj. Ekzemple, sekura kaj atingebla akvo ebligas pli bonan vivkvaliton kaj sanon, kio rekte ligiĝas al pli da tempo por edukado kaj individua laborforto, kio siavice rezultiĝas je ĝenerale pli bona ekonomia prospero kaj de la individuo kaj de la komunumo. Tio eĉ havas pli grandan efikon sur

povigo de virinoj, kiuj ofte respondecas pri la akvo-rikolto, foje pli ol tridek minutojn for de siaj loĝlokoj. Cetere, estas pli-malpli fama la konkludo, ke investante $1 en sanitaraj servoj oni ŝparas $4 en kuracaj sistemoj, preventas mortojn kaj kreskigas produktivecon. Jen unu el la plej fortaj argumentoj por lobiumado favore al publika investo en sanitaraj servoj.

Alia ekzemplo estas tio ke dolĉakvo estas resurso endanĝerata de klimatŝanĝiĝo, kaj du miliardoj da homoj jam spertas akvomankon en la mondo. Aldone, poluado vigle minacas la kvaliton de tiu mankanta akvo, kies basenoj siavice estas translimaj (t.e. la limoj de hidrologiaj basenoj ne kongruas kun la politikaj landlimoj). Tial, por efike fronti la problemon de akvomanko oni devas kontraŭbatali klimatŝanĝiĝon, enkonduki demokratian kaj transliman mastrumadon de akvaj resursoj, havi taŭgajn urbajn kaj kamparajn nepoluajn strukturojn, apliki teknikojn por purigado de kloakaj akvoj kaj mastrumado de rubaĵoj. Fine, endas protekti la akvo-ligitajn ekosistemojn, inklude de montoj, arbaroj, malsekejoj, lagoj, riveroj kaj grundakvejoj por garantii bonan kvaliton de surfacaj kaj subteraj akvoj.

Indas mencii ankaŭ ke granda respondeco pri akvomanko kuŝas sur nesufiĉa efikeco en provizado kaj uzado de akvo. Tial, gravas plifortigi tian efikecon en ĉiuj sektoroj, ĉefe en agrikulturo kaj industrio, kiuj kreskadas pro la bezonoj de same kreskanta monda loĝantaro, sed samtempe respondecas pri plej larĝa porcio de la monda akvouzado, de la poluado de akvoj kaj konsekvence de premo sur akvomanko.

Laste sed ne balaste, por atingi la defion de efektiva mondskala ŝanĝo kaj redukti malegalecon koncernantan aliron al akvo kaj sanitaraj servoj, nepras internacia kunlaboro, interŝanĝo de konoj, kaj teknologioj pri daŭripova mastrumado kaj purigado de akvoj.

**Kiel la esperanto-komunumo povas kontribui?**

Unue ĉiu individuo povas edukiĝi pri la temo kaj pri ĝia graveco, konsciiĝi pri la problemo mondskale kaj ĉe ĉiuj soci-ekonomiaj tavoloj, scii kiel statas la situacio de akvo kaj salubrigo en sia propra regiono kaj ĉu tio ankaŭ efikas sur aliaj regionoj. Se oni havas aliron al sanitaraj servoj, kelkaj kernaj demandoj estas:

- Kiu estas la deveno de la trinkakvo? Ĉu la devena ekosistemo estas protektata aŭ minacata?
- Kien iras la forĵetata akvo? Ĉu ĝi estas taŭge purigata kaj ĉu ĝi efikas sur la akvoprovizado de alia komunumo?
- Ĉu la mastrumado de akvaj resursoj okazas demokratie kun aktiva partopreno de la komunumo kaj fakuloj?
- Ĉu la regionaj instancoj prioritatigas investojn en sanitaraj servoj?

Tiaj demandoj estas gravaj por aktiva partopreno en la diskuto kiu minimume devas okazi en ĉiu hidrologia baseno. Aliaj agoj koncernas individuan vivstilon kiaj akvo-ŝparado kaj uzo de varoj kies produktado respektas la medion (efikeca akvouzado kaj ne poluado).

Interesaj aktivaĵoj en kiuj esperantistoj kaj Esperanto-asocioj ankaŭ povas partopreni kaj engaĝiĝi estas la Monda Tago de Akvo (22-a de Marto) kaj la Monda Tago de Necesujo (19-a de Novembro), kies celoj estas videbligi la gravecon de tiuj temoj.

Fine, oni ĉiam povas subteni agadojn de neregistaraj organizaĵoj kiuj provizas edukadon kaj kapabligon al malriĉaj kumunumoj kaj ankaŭ provizas bazajn salubrigojn, ekzemple per konstruo de putoj, akvorezervujoj, sistemoj de pluvakva kolektado, latrinoj kaj sepsaj fosujoj. Ĉar la amplekso de la akva problemo estas giganta, ekzistas pluraj pri-akvaj neregistaraj organizoj (NROj) en la mondo.

**KION FARI?**

**Unuope:**

1. Informiĝu pri via loka situacio koncerne akvon kaj, eventuale pere de tieaj esperantistoj, pri la situacio en aliaj lokoj kaj landoj.
2. Ellaboru planon por ŝpari akvon en via hejmo; certigu, ke vi ne uzas superfluajn kvantojn da akvo por higieno, kuirado k.s.
3. Uzu varojn kiuj minimume damaĝas la lokan akvon.
4. Kontribuu finance aŭ tempe al lokaj aŭ naciaj organizoj kiuj okupiĝas pri la efika uzado de akvo.

**Grupe:**

1. Dediĉu grupan kunvenon al akvaj demandoj, eventuale post enketo ĉe lokaj instancoj; uzu la okazon por samtempe plibonigi la lingvoscion de la grupo kaj plibonigi ĝian konscion pri la efika utiligo de akvo.
2. Grupe marku la Mondan Tagon pri Akvo (22 marto).

**Lande:**

1. Eventuale kunlabore kun via loka grupo, aperigu artikolojn pri akvaj demandoj en via landa Esperanto-revuo.
2. Instigu la landan asocion kontakti aliajn landajn asociojn por proponi kunlaboron pri edukado pri akvaj demandoj.

**KION LEGI?**

Esperante:

- Oficiala retejo de la laborgrupo Esperanto por UN: http://www.esperantoporun.org

- Ĉefartikoloj de Revuo Kontakto 2015:2: Akvo, la oro de la tria jarmilo (https://uea.org/revuoj/kontakto/2015)
- Retejo de Naturamikoj: https://eo-naturamikaro.webnode.nl/artikoloj/dosiero-akvo
- Prelego pri krizo kaj alternativoj de akvoproduktado: prezento (https://goo.gl/B4Lyvo) kaj resumo (https://bit.ly/31ugx6C), publikigita en la revuo *Rio Esperantista*.
- Prelego pri sanitaraj servoj de kloakaj akvoj: https://youtu.be/Hy80s1xRJcs
- Artikoloj pri akvo en Esperanta Retradio: https://bit.ly/38jeHam

Plurlingve:

- Oficiala retejo de UN pri la CDE 6 (en la oficialaj lingvoj de UN): https://www.un.org/sustainabledevelopment/water-and-sanitation/
- Oficiala retejo de UN pri la temo akvo (tradukebla per google): https://www.unwater.org/
- Mondaj raportoj pri Akvo, Salubrigo kaj Higieno (Monda Organizaĵo pri Sano/Infana Fonduso de UN, plurlingvaj): https://bit.ly/3eRcp4K
- Monda tago de Necesujo (en la oficialaj lingvoj de UN): https://www.un.org/en/events/toiletday/
- Monda tago de Akvo (en la oficialaj lingvoj de UN): https://www.un.org/en/observances/water-day
- Retejo de Internacia Asocio de Akvo (plurlingva): https://iwa-network.org/
- Landaj Sekcioj de Inĝenieroj sen Landlimoj: http://ewb-international.com/countries/

# CELO 7.
# PAGEBLA KAJ PURA ENERGIO

***Alvaro Motta***

**Energio kaj ĝiaj nekonvenaj veraĵoj**

Unuiĝintaj Nacioj difinis kiel celon por la jaro 2030 garantii al ĉiuj homoj alireblon al pagebla, fidinda, daŭripova kaj moderna energio. La granda defio estos atingi ĝin sen kompromiti la sukceson de la aliaj Celoj por Daŭripova Evoluigo (CDE). Tio postulos de ni ĉiuj sisteman pens-manieron, kiu ne analizu la problemojn de sektoroj izole, sed strebu rigardi ĉiujn iliajn interdependojn.

Prenu ni la ekzemplon de interdependo inter akvo (CDE6) kaj energio (CDE7)[13]. Por produktado de energio necesas konstanta fluo da akvo por plenigi rezervujojn de akvoelektrejoj, por funkciigi termoelektrejojn kaj rafinejojn, ktp. Siavice, energio estas bezonata por kapti, purigi kaj liveri trinkeblan akvon al domoj kaj industrioj, kaj krome por kolekti kaj purigi kloakon antaŭ ĝia forĵeto en riverojn kaj oceanojn (CDE14).

Tiun saman formon de analizo de la problemoj eblas etendi al ĉiuj aliaj Celoj. En la nutraĵa sektoro (CDE2), ekzemple, energio estas absolute esenca por garantii liveradon de nutraĵoj produktitaj en la kamparo al grandaj urboj. Siavice, en pluraj lokoj la troa ekspansio de vegetaĵaj bruligaĵoj (alkoholo kaj biodizeloleo) konkurencas por rimedoj ankaŭ bezonataj por produktado de nutraĵo, kiel ekzemple, disponebleco de fekunda grundo kaj akvo.

Rilate al klimat-ŝanĝo (CDE13), energio respondecas tutmonde pri ĉirkaŭ 60% de la enaerigo de forcejaj gasoj pro la bruligo de fosili-

13 http://www.unesco.org/new/en/natural-sciences/environment/water/wwap/wwdr/2014-water-and-energy/

aĵoj[14]. Sekve, se ni intencas eviti ke la kresko de temperaturo en nia planedo transpasu la kritikan zonon de 1,5 celsiaj gradoj, konforme al la Pariza Interkonsento, estos ja devige restrukturi nian nunan energian modelon.

Alfronte al tiom da defioj kaj interdependoj, ekestas la jena demando: Kiu estas la plej efika maniero atingi la celon por 2030?

La plej ofta respondo estas teknologio. Sed ĉu teknologio kapablos solvi ĉiujn problemojn ligitajn al la energia sektoro? Kiam ni rigardas la partoprenon de la suna kaj venta fontoj en la tutmonda energi-produktado, ni konstatas ke nuntempe ĝi respondecas nur pri 3% el la tuto[15]. La vastigo de ĝia uzo al niveloj kompareblaj al tiuj de la fosiliaj bruligaĵoj postulos nemezureblan kaj neelteneblan kvanton de maloftaj mineralaj rimedoj (kupro, ŝtalo, ktp.). Krom tio, tiuj fontoj prezentas la intermitantan aŭ neregulan problemon: tio estas, ili povas generi energion nur en horoj, kiam estas sunbrilo aŭ vento. La baterioj, kiuj teorie povus helpi stoki tiun energion por la aliaj horoj, same prezentas gravajn mankojn por ĝia pli granda ampleksigo kaj havas tre malaltan energian densecon kompare al petrolo. Valoras substreki, ke estas ĝuste tiu alta denseco de petrolo, ekzemple, kiu permesas al niaj aviadiloj flugi kun relative malmulta avi-benzino. La nuklea energio, multfoje proponita kiel anstataŭanto de fosiliaj bruligaĵoj, krom la defioj por la pliampleksigo de ĝia uzo, ankoraŭ ne sukcesis solvi la kritikajn problemojn de nuklea rubaĵo[16].

Se teknologio per si mem ne estas solvo, simple resti ĉe la nuna modelo de alta dependo de fosiliaj bruligaĵoj same ne donas al ni trankvilon pri nia estonteco. La nunaj malkovroj de novaj rezervoj

14 https://www.un.org/sustainabledevelopment/energy/

15 https://www.worldenergydata.org/world

16 https://www.ourrenewablefuture.org

de konvenciaj petroloj[17] estas la plej malaltaj en jardekoj[18]. La nekonvenciaj petroloj ĝenerale ne nur estas pli kostaj por produkti, sed multfoje prezentas pli altajn teknikan defion kaj median damaĝon kompare al la konvencia.

Estas necese konsideri, ke la defio, kiun ni alfrontas estas ne nur teknologia, sed antaŭ ĉio morala.

Ĉirkau 573 milionoj da homoj en Afriko ne havas aliron al elektro. Sen ĝi, infanoj ne povas studi nokte (CDE4) kaj klinikoj ne povas stoki vakcinojn pro manko de frido (CDE3)[19]. Tiu ĉi lasta aspekto faras la batalon kontraŭ epidemioj kiel KOVIM-19 en tre malriĉaj landoj preskaŭ neebla.

Dume, la troa energia konsumo fare de la 10% plej riĉaj homoj respondecas pri ĉirkaŭ duono de la enaerigo de forcejaj efikaj gasoj tutmonde[20]. Sekve, superi la energian malriĉecon, respektante la klimatan justecon, nur eblos kiam ni pretos realisme batali kontraŭ la nedecan socian malegalecon en nia planedo.

Alfronti tiujn nekonvenajn veraĵojn de nia nuna energia modelo postulos: honestecon pri la efektivaj limoj difinitaj de la naturo (t.e., fortan kompromison kun la scienco), sisteman pens-manieron, kaj fortigon de kunlaboro ene de komunumoj kaj inter nacioj.

---

17 La vorto *petrolo* estas uzata ĉi tie en la senco donita de Zamenhof en la Fundamento de Esperanto por la rusa traduko de tiu vorto, tio estas, la kruda ŝtonoleo. La vorto *nafto* preferindas por difini petrol-derivaĵon ĝenerale aplikatan en la petrol-kemia industrio (en la angla “naphtha”, portugale “nafta”). La brazila kemia profesoro kaj akademiano L.C. Porto Carreiro Neto (1895-1964) ankaŭ uzis tiun difinon en sia vortaro “Portugala-Esperanto” (BEL, 2015).

18 https://www.bloomberg.com/news/articles/2016-08-29/oil-discoveries-at-a-70-year-low-signal-a-supply-shortfall-ahead;
https://www.ogj.com/exploration-development/reserves/article/14068305/rystad-oil-and-gas-resource-replacement-ratio-lowest-in-decades

19 https://www.un.org/sustainabledevelopment/energy/

20 http://piketty.pse.ens.fr/files/ChancelPiketty2015.pdf

Esperanto havas tre gravan rolon ĉi tie, ĉar demokratia kaj efika internacia komunikado impulsas la interŝanĝon de konoj inter popoloj, stimulante sciencan progreson. Krom tio, ĝi ankaŭ kontribuas al formiĝo de inkluziveca tutmonda civitaneco, esenca ilo por trakti problemojn, kiuj ne respektas landlimojn kaj kiuj postulas ĉies solidarecon, same kiel tion postulas la defioj de energia transformiĝo.

**KION FARI?**

**Unuope**
Informiĝi pri la defioj rilataj al energio surbaze de studoj kongruaj kun la scienco. Gravas ĉiam klopodi sisteme analizi la problemojn.

**Grupe kaj lande**

1. Organizi aktivaĵojn por pridiskuti energiajn temojn (CDE7) inter la membroj, kaj same rilate al la aliaj Celoj.
2. Starigi kunlaboron ĉe organizaĵoj de la civila socio kaj universitatoj, kiuj faras seriozan laboron ligitan al energio kaj aliaj Celoj.
3. Stimuli konsciigon pri la Konvencio 169 de ILO, la Internacia Labora Organizaĵo (https://www.ilo.org/global/topics/indigenous-tribal/lang--en/index.htm), kiu pritraktas la rajtojn de indiĝenaj popoloj. Multfoje energiaj projektoj prezentas grandajn medi-detruajn efikojn, ĉefe kiam faritaj en indiĝenaj teritorioj. La Konvencio 169 de ILO asertas, ke neniu projekto rajtas esti starigita en indiĝena teritorio sen antaŭa, libera kaj informita konsultiĝo de la popoloj tie loĝantaj. En niaj lingvaj festivaloj, ni povas proponi al indiĝenaj reprezentantoj ankaŭ informi ĉu la grandaj energiaj kaj minaj projektoj respektas tiun konvencion kaj ĉu tiu konsultiĝo okazas en iliaj denaskaj indiĝenaj lingvoj.

**KION LEGI?**

En Esperanto:

- UNESKO-Kuriero 2019, nro 3 (“La etikaj defioj de klimata ŝanĝo”): https://uea.org/revuoj/unesko_kuriero/2019
- Vikipedio: https://eo.wikipedia.org/wiki/Energio
- Kern-punkto: tie troveblas pluraj podkastoj pri temoj kiel “Suno kaj Vento”; “Renovigeblaj Energioj”; “Baterioj”, ktp.: https://kern.punkto.info/arkivo/
- Le Monde Diplomatique, en Esperanto: serĉu terminojn, kiel “petrolo”, “energio”, “nafto”, “klimato”: https://eo.mondediplo.com/rubrique.php3?id_rubrique=37
- Kontakto, numero 248 (2012:2): “Daŭripova Evoluigo: Kio ĝi estas, kaj kio ĝi ne estas”: https://uea.org/revuoj/kontakto

En la oficialaj lingvoj de UN:

- Sekretariato de Unuiĝintaj Nacioj pri Energio: www.un-energy.org
- Konvencio 169 de Internacia Labora Organizaĵo (ILO) (Konvencio pri Indiĝenaj kaj Tribaj Popoloj): http://www.ilo.org/dyn/normlex/en/fp=NORMLEXPUB:12100:0::NO::P12100_ILO_CODE:C169

En la angla:

- Interesa studo por sisteme ekkompreni la energian defion: www.ourrenewablefuture.org
- Raporto de UN pri la rilatoj inter akvo kaj energio: http://www.unesco.org/new/en/natural-sciences/environment/water/wwap/wwdr/2014-water-and-energy/
- Internacia Agentejo pri Energio: www.iea.org
- Internacia Agentejo pri Renovigeblaj Energioj: www.irena.org

# CELO 8.
# BONA LABORO KAJ EKONOMIA KRESKO

***Giorgio Novello***

**Enkonduko**

Mi verkas mian kontribuon meze de koronavirusa pandemio, kiu furiozas tra la tuta mondo en ĉi tiuj tagoj kaj semajnoj. Ĉu mi skribus malsame, se mi verkus mian eseon antaŭ nur unu monato? La respondo ne estas facila. Probable jes. Sed eble ne.

La deirpunkto estas tre simpla: laboro estas kerna, fundamenta, nemalhavebla bazo por la kresko de ĉiu homa socio. Laboro ne estas nur unu el la tri faktoroj de produktado identigitaj antaŭ tri jarcentoj de Smith kaj Ricardo: ĝi estas unu el la plej noblaj agadoj de la homa specio.

Samtempe ĝi povas transformiĝi en sklavecon, ekspluatadon – en koŝmaron, kiu eĉ povas nei kaj nuligi la homan naturon. De tie venas la rolo de tiu ĉi oka Celo kiel vera kerno de la tuta strategio de la 17 Celoj kaj 169 Subceloj.

Mi verkas ĉi tiujn liniojn laŭ mia profesia sperto. Mi unue estis kariera diplomato, kiu servis sian landon kiel ambasadoro en du landoj de Norda Eŭropo. Mi nun estas vicprezidanto de teknologie progresinta kompanio specialigita pri spaca teknologio.

Mi volas ĉerpi el mia pasinta kaj aktuala profesia sperto por prikomenti la rolon de laboro en la antaŭenigo de homa digno, anstataŭ raporti nur surbaze de teorioj.

Mi traktos unue la rolon de kunlaboro inter publikaj kaj privataj sektoroj. Due, mi aludos al la jam menciita specifa industria kaj teknologia sektoro, la spaca. Trie, mi elstarigos iujn elementojn de la agado de mia nuna kompanio. Mi aparte atentos nian decidon enkonstrui certajn Evoluigajn Celojn en nian kompanian strategion, kaj montri ilin en nia ĉiujara "ne-financa deklaro".

## 1. Publika kontraŭ privata sektoro

La debato pri la respektivaj roloj de la publika kaj privata sektoroj havas longan kaj intensan historion. Unuflanke oni ofte konsideras la publikan sektoron (t.e. la ŝtato) grandega kaj peza burokratia maŝino nekapabla je ajna efika administrado; aliflanke, la privata sektoro (t.e. kompanioj), estas foje konsiderata celanto de la propraj egoismaj interesoj, kiuj ne agnoskas la pezajn eksterajn kostojn de tiu agado sur la ĝenerala socio. Iuj fakuloj opinias alimaniere: ekzemple, la usona-itala fakulino Mariana Mazzucato (*The Entrepreneurial State,* 2013) skribis pri la rolo de la ŝtato kiel efika entreprenisto kaj pri la avantaĝoj, kiujn oni povas akiri per aŭtentika publika-privata partnereco.

Kunlaboro inter publikaj kaj privataj agantoj kompreneble ne estas nova. Ĝi estis ofta praktiko, ekzemple, en la 19a jarcento, la ora epoko de kanala kaj fervoja konstruado. Pli lastatempe, publikaj-privataj partnerecoj fariĝis tre oftaj kaj tre popularaj precipe en la finaj jardekoj de la pasinta jarcento, kvankam ilia efikeco estas nun foje pridubata.

Publikaj-privataj partnerecoj povas impliki eĉ internaciajn organizaĵojn. Je la nivelo de Unuiĝintaj Nacioj, unu el la plej elstaraj ekzemploj estas la Tutmonda Pakto ("Global Compact") apogita de la tiama ĝenerala sekretario Kofi Annan.

Lanĉante la pakton en 2004, Annan invitis privatajn kompaniojn akcepti dek principojn pri la praktiko de ekonomiaj aferoj. Ĉiuj tiuj principoj (kaj precipe la unua kaj dua) restas validaj en la ĝenerala kadro de la Oka Celo por Daŭripova Evoluigo. Tiuj principoj traktas privatajn kompaniojn kiel gravajn partoprenantojn en la tutmondaj evoluigaj klopodoj de UN.

Hodiaŭ pli ol 18.000 kompanioj tra la mondo aliĝis al la Tutmonda Pakto. La Pakto ne estas deviga traktato, nek simpla ekzerco de publikaj rilatoj, nek okazo por interkonekto: ĝi estas libervola komuna agado por kune trakti aferojn gravajn por la instituciaj kaj privataj mondoj. Libervola – kaj efika.

Vera kunlaboro povas okazi inter du aŭ pluraj agantoj nur se ili anticipe interkonsentas pri la bazo de tiu kunlaboro. Sperto de la pasintaj du jardekoj almenaŭ konfirmas, ke publikaj-privataj partnerecoj povas bone funkcii. Precipe la sukceso de la Jarmilaj Celoj ŝajnas konfirmi tion.

Kiel dirite, estas vaste akceptite, ke publikaj institucioj celas (aŭ devus celi) la komunan bonon. Aliflanke, privataj kompanioj supozeble agas surbaze de egoismaj interesoj. Ĉi tiu lasta supozo tamen ne vere reprezentas la realon. Ankaŭ kompanioj estas aglomeraĵoj de homoj, kiuj koncernas sin pri pli ol la sorto de individuoj. Korporacia lojaleco, la kutimo labori kune, reciproka interdependo emas krei korpan, kolektivan enton, kun speco de personeco sendependa de tiuj de ĝiaj komponantoj. Ĝia intereso ne estas nur profiti aŭ simple travivi, sed ankaŭ “preteriri”, kontribui al la progreso ĝenerala, ĉu de la urbo, ĉu de la lando, ĉu de la homaro.

La klasika paradigmo de la ekonomia homo (*homo oeconomicus*) montris siajn limojn. Neniu homo estas motivata nur de propra intereso. Moderna psikologio, preterirante la komencajn tezojn de Freud pri instinktoj, hodiaŭ prezentas la homojn kiel esence

orientitajn al kreskado, malfermitajn al pozitivaj interagoj, serĉante fundamentajn valorojn.

Ĉi tiu paradigmo povas esti aplikata, certagrade, ankaŭ al kompanioj. Sekvante la amon de individuoj al agado, ankaŭ privataj kompanioj povas montri kondutojn, kiuj superas iliajn tujajn materiajn interesojn.

Iam antaŭ la Dua Mondmilito, Walter Rathenau, politikisto, diplomato, pensulo kaj entreprenisto, foje prezidis kunvenon de akciuloj de la transportŝipa kompanio de la rivero Rejno. La akciuloj volis maksimumigi siajn dividendojn, kvankam estis sufiĉe klare, ke altaj dividendoj estus malutilaj al la servoj provizataj de la kompanio. Rathenau ne konsentis. Post longa kaj akra diskuto li fine ekkriis: "*Sinjoroj, estas boatoj sur la Rejno*!" Ni povus eble parafrazi lian diron jene: "Sinjoroj, nia kompanio ne ekzistas nur por riĉigi vin, sed ĉefe por disponigi sekurajn kaj regulajn transportajn servojn sur la rivero. Bonvolu taksi viajn prioritatojn ĝuste!"

Hodiaŭ ni ne parolas pri "boatoj sur la Rejno", sed pri "kompania socia respondeco" – pri la devo de entreprenoj kunlabori por protekti kaj plibonigi la komunan bonon, inkluzive de deca laboro por kiel eble plej multaj homoj.

Tio povas ŝajni ne ĉiam facile evidenta. Ni konsideru ekzemplon de specifa industria sektoro, kiu unavide ŝajnas malproksima al la bezonoj de la homoj sur la planedo Tero: la spaca industrio.

## 2. La spaca sektoro

La spaca sektoro povas ludi signifan rolon en la Celoj pri Daŭripova Evoluigo. Ekzemple, satelitoj estas tre utilaj en pluraj fakoj, inkluzive mediprotektadon, kontrolon de klimata ŝanĝiĝo, telekomunikadon,

agrikulturon. Hodiaŭ, jam ĉirkaŭ 5000 satelitoj orbitas la terglobon. La granda nuna defio estas do uzi la ekzistantajn satelitojn en novigaj manieroj, kongruaj kun socia kaj ekonomia progreso.

Precipe, privataj spacaj kompanioj devas subteni la ĝeneralan kapablon, uzi infrastrukturon, datumojn kaj teknikajn rimedojn, tiel vaste kiel eble. Aliflanke, ŝtatoj, kaj precipe la t.n. “fruaj spacaj nacioj”, devas plibonigi sian teknologian kompetenton por kontribui al komuna progreso kaj subteni novajn komunajn valorojn.

En la tagiĝo de la spaca epoko, en la jaroj post la Dua Mondmilito, spaca teknologio estis alirebla nur de du landoj. Duonjarcenton poste, kelkcent nacioj estas spacaj nacioj, kvankam kompreneble kun malsamaj niveloj de teknologia evoluo.

Tia impona disvolviĝo okazis precipe dank’ al transformo de spaca konkurenco al spaca kunlaboro. La internacia kosmostacio estas bona ekzemplo. Lanĉita en 1998 de kvin ĉefaj spacaj agentejoj (inkluzive de la Eŭropa Spaca Agentejo, kiu siavice inkluzivas dudek landojn), la internacia kosma stacio ricevis ĝis hodiaŭ 239 astronaŭtojn kaj kosmonaŭtojn el dek du nacioj.

UN mem faciligas spacan kunlaboron, kreante internacian leĝaron kiun oni povus konsideri ia komenca konstitucio de spaca agado. Ĝi ampleksas kvin traktatojn, kiuj kovras longan liston de konsideroj, inkluzive pritrakton de la luno kaj aliaj ĉielaj korpoj, respondecon pri agadoj rilataj al spaco, kaj la rolon de astronaŭtoj kaj kosmonaŭtoj kiel reprezentantoj de la tuta homaro kaj do helpindaj tutmonde laŭnecese.

Lastatempe UN lanĉis ankaŭ spacajn iniciatojn kun precipe socia kaj ekonomia enhavo. Menciinda estas la iniciato “aliro al spaco por ĉiuj” – publika-privata partnereco bazita sur interkonsentoj inter la Oficejo de UN pri Ekstera Spaco, en Vieno, kun unuopaj entrepre-

noj, inkluzive ekzemple senpagan enorbitigon de satelitoj de novaj spacaj nacioj.

### 3. Mia sperto en privata spaca kompanio

La tria kaj fina parto de mia kontribuo rilatas mallonge al mia agado en spaca kompanio, Avio S.p.A. Avio estas itala kompanio kun partneroj en Francio kaj Franca Gujano, kiu specialiĝas pri produktado de lanĉiloj (raketoj) por enorbitigi satelitojn de ĝis 1,5 tunoj. Avio estas ĉefa entreprenisto de la eŭropa malpeza lanĉilo Vega. Vega plenumis dek kvar sukcesajn sinsekvajn flugojn, enmetante en orbiton satelitojn venantajn de landoj en kvin kontinentoj.

Miaopinie, Avio konfirmas la du punktojn, kiujn mi provis reliefigi ĉi tie. Unue, ĝia sukceso ŝuldiĝas al internacia kunlaboro, kun instituciaj kaj privataj partneroj. Ekzemple, Avio kunlaboras kun la Eŭropa Spaca Agentejo, la iniciatinto de la programo Vega. La eŭropa spaca agentejo havas 23 membrojn, ĉiuj apartenantajn al la Eŭropa Unio krom tri. Avio ankaŭ subskribis interkonsenton kun UN en la kadro de la menciita iniciato “aliro al spaco por ĉiuj”, ofertante enmeti en orbiton naŭ minisatelitojn de “novaj spacaj nacioj”. Avio kunlaboras kun dekduo da landoj por produkti sian lanĉilon.

Due, Avio plene aprobas la enhavon de la strategio de Unuiĝintaj Nacioj esprimitan en la Celoj por Daŭripova Evoluigo. Ĝi aktivas por antaŭenigi daŭripovajn evoluigajn celojn en si mem kaj inter kompanioj kaj institucioj. Ĉiujare, Avio publikigas sian “nefinancan deklaron”, klarigante detale kaj konkrete sian socian strategion, kiu inkluzivas ne nur la efektivigon de la oka Celo, sed ankaŭ de la kvara, naŭa, dekdua, dektria kaj deksepa.

Konklude, do, publikaj institucioj kaj privataj kompanioj ne apartenas al malsamaj planedoj: ili akordiĝas ne nur pri iuj komunaj aspektoj rilate organizadon kaj funkciajn procedojn, sed ankaŭ kelkmaniere pri siaj finaj celoj. Inter tiuj celoj, la protekto de laboro kaj de la digno de laboro elstaras. Tion konfirmas eĉ la spaca industrio, kvankam ĝi ŝajnas esti tiom malproksima de la ĉiutaga vivo. La spaca industrio plifaciligis la vivon sur Tero kaj ĝi tion faros pli kaj pli en estonteco.

Unuflanke, la atingo de pluraj el la Celoj por Daŭripova Evoluigo dependas de spaca agado; aliflanke, la strategioj de la spaca industrio inkluzivas valorojn subtenatajn de Unuiĝintaj Nacioj.

**KION FARI?**

**Unuope:**

1. Studu la Universalan Deklaracion de Homaj Rajtoj, precipe Artikolojn 22 ĝis 25, pri laboro kaj laborkondiĉoj, kaj taksu ĝis kiu grado ili estas aplikataj en via lando aŭ regiono.
2. Esploru pri aliaj paktoj kaj interkonsentoj kiuj rilatas al la kondiĉoj de laboro, ekzemple la Internacia Pakto pri Ekonomiaj, Sociaj kaj Kulturaj Rajtoj.
3. Informiĝu pri la rolo de ILO, la Internacia Labora Organizaĵo.
4. Ekkonu la plurajn Esperanto-organizojn kiuj okupiĝas pri laboro kaj laborkondiĉoj, kiel ekzemple SAT.
5. Studu la ampleksan kaj interesan historion de Esperanto kaj la laborista movado.

**Grupe:**

1. Organizu kunsidojn aŭ grupajn diskutojn de via loka esperantista grupo pri la supre menciitaj internaciaj interkonsentoj kaj pri rilataj temoj. Uzu viajn esperantistajn kontaktojn en aliaj landoj por informiĝi pri iliaj kondiĉoj.
2. La lastatempa pandemio kaŭzis enormajn ekonomiajn perturbojn kaj reduktis aŭ eĉ haltigis ekonomian kreskon en multaj landoj. Diskutu kun via loka grupo kiel vi kiel grupo povas helpi tiujn kiuj estas senlaboraj, vialande kaj alilande, pro la pandemio.

**Lande:**

1. Surbaze de seriozaj esploroj, aperigu artikolojn en via landa Esperanto-revuo, intervenu en sociaj medioj – ne nur por reliefigi la problemojn, sed por proponi solvojn, kaj por montri la engaĝiĝon de la Esperanto-movado.

# CELO 9.
# **INDUSTRIO, INVENTEMO, INFRASTRUKTURO**

*Tamás Slezák*

**Konstrui elteneman infrastrukturon, akceli inkluzivan kaj daŭripovan industriigon kaj kultivi inventemon**

*Kial tio gravas?*
Ekonomia kresko, socia disvolviĝo kaj klimata agado forte dependas de investoj en infrastrukturon, daŭripovan industrian disvolviĝon kaj teknologian progreson. Fronte al rapide ŝanĝiĝanta monda ekonomia pejzaĝo kaj kreskantaj malegalecoj, daŭripova kresko devas inkluzivi industriigon, kiu antaŭ ĉio donas ŝancojn atingeblajn al ĉiuj homoj, kaj ankaŭ estas subtenata de inventemo kaj eltenema infrastrukturo.

*Sed efektive kio estas la problemo?*
Bazaj infrastrukturoj kiel ŝoseoj, informaj kaj komunikaj teknologioj, drenado de kloakakvo, elektra kurento kaj disponebla akvo restas malabundaj en plej multaj evoluantaj landoj. Laŭtakse 3,8 miliardoj da homoj ankoraŭ ne havas aliron al Interreto, reprezentante okdek procentojn de la loĝantaro en la malplej evoluintaj landoj. Tri miliardoj da homoj tutmonde ne havas aliron al baza kloaksistemo kaj tri el dek homoj ne povas provizi sin per sekura trinkakvo. La koronavirusa pandemio denove kaj eĉ pli evidente malkaŝis la urĝan bezonon de rezistema infrastrukturo.

*Kial mi zorgu?*
Inkluziva kaj daŭripova industriigo, kune kun inventemo kaj infrastrukturo, povas produkti dinamikajn kaj konkurencajn ekonomiajn

fortojn, kiuj generas dungadon kaj enspezon. Ili ludas ŝlosilan rolon en la enkonduko kaj antaŭenigo de novaj teknologioj, en la helpo de internacia komerco kaj en la ebligo de efika uzado de rimedoj.

La kresko de novaj industrioj signifas plibonigon de la vivnivelo por multaj. Ankaŭ se industrioj celas daŭripovon, tiu aliro pozitive influos la medion. Klimata ŝanĝiĝo efikas al ni ĉiuj.

*Kio estas la prezo de neagado?*
La prezo estas altega. Fini malriĉecon estus pli malfacile, konsiderante la rolon de la industrio kiel kerna motoro de la tutmonda evoluo por elradikigi malriĉecon kaj antaŭenigi daŭrigeblan evoluon. Aldone, malsukcesi en la plibonigo de infrastrukturo kaj antaŭenigo de teknologia inventemo povus alporti malbonajn sanajn servojn, neadekvatan higienon kaj limigitan aliron al edukado.

*Kiel oni povas helpi?*

- Ni povas establi normojn kaj antaŭenigi regularojn, kiuj certigas, ke projektoj kaj iniciatoj de firmaoj estos administrataj daŭripove.
- Ni povas kunlabori kun neregistaroj organizoj kaj la publika sektoro por helpi antaŭenigi daŭripovan evoluadon ene de evolulandoj.
- Pensu pri tio, kiel industrio trafas vian vivon kaj bonstaton kaj uzu sociajn amaskomunikilojn por antaŭenpuŝi politikistojn prioritatigi la Celojn.

Antaŭ deko da jaroj, en 2009, la Eldona Fako de SAT eldonis la verkon *Plano B – Mobilizo por savi civilizacion* en kiu ni povas legi jene:

> *La elekto estas nia – via kaj mia. Ni povas daŭre fari nian kutiman umadon kaj pluigi ekonomion, kiu plu detruadas siajn naturajn vivtenajn sistemojn ĝis ĝi detruos sin mem, aŭ ni povas adopti “Planon B” kaj esti la generacio, kiu ŝanĝas*

*direkton, movante la mondon sur vojon de daŭra progreso. La elekton faros nia generacio, sed ĝi influos la vivon sur la Tero de ĉiuj estontaj generacioj.*

**KION FARI?**

**Unuope:**

1. Ŝanĝu viajn kutimojn al konscia butikumado kaj konscia konsumo: elektu tiajn varojn, kiujn produktas kompanioj kiuj uzas daŭripovajn teknologiojn kaj metodojn, kaj ne ekspluatas siajn laboristojn, provizantojn kaj medion. Por tio vi devas multe lerni, kaj evoluigi vin mem: anstataŭ sekvi reklamojn, prefere vi esploru detalojn, saĝe uzu interreton kaj fariĝu konscia.
2. Atentu ne nur pri la produktantoj kaj iliaj varoj, sed ankaŭ pri justa komerco, pri la kanaloj laŭ kiuj la varoj atingas vin.
3. Instalu sunĉelojn kaj sunpanelojn sur vian tegmenton (se vi havas eblecon) aŭ aĉetu verdan elektran energion. Per tio vi kontribuas al eltenema infrastrukturo.
4. Parolu pri viaj tiuterenaj evoluo kaj spertoj en la loka Esperanto-klubo kaj kun viaj Esperanto-amikoj dum renkontiĝoj. Skribu pri tio artikolon en Esperantaj kaj lokaj ĵurnaloj.
5. Precipe se vi estas junulo, pere de viaj Esperanto-kontaktoj trovu evoluantan landon kie vi povos volontuli en projekto kiu rilatas al Celo 9 aŭ alia Celo por Daŭripova Evoluigo.

**Grupe:**

1. Serĉu Esperanto-grupojn kaj / aŭ unuopajn esperantistojn en evoluantaj landoj, kiuj ne havas Interreton kaj helpu ilin pere de financado de ilia retaliro dum unu aŭ pluraj

jaroj. Interreto estas nuntempe eble la plej grava parto de infrastrukturo.

**Lande:**

1. Kunlaboru kun aliaj Esperanto-grupoj por diskuti kaj ekagi rilate al Esperanto-grupoj en evoluantaj landoj.
2. Same kiel supre, serĉu ankaŭ landa(j)n asocio(j)n en la malplej evoluintaj landoj kaj financu ilian retaliron.

**KION LEGI?**

Se vi legas la anglan lingvon: “The lazy person’s guide to saving the world” (Gvidilo por maldiligentuloj pri kiel savi la mondon): https://www.un.org/sustainabledevelopment/takeaction/

# CELO 10.
# **REDUKTI MALEGALECON**

***M. Rafaela Urueña***

**Redukti malegalecon ene de landoj kaj inter landoj**

La principo de egaleco estas kerna en la Internacia Juro. Ĝi estas duflanka temo, ĉar ĝi antaŭvidas egalecon inter la ŝtatoj kaj egalecon ene de landoj.

## 1. Redukti malegalecon inter landoj

La 2-a paragrafo de artikolo 1 de la Ĉarto de Unuiĝintaj Nacioj (UN) proklamas la egalan suverenecon de la ŝtatoj: "*Evoluigi inter la nacioj amikajn rilatojn bazitajn sur la respekto al la principo de egalaj rajtoj de la popoloj kaj de ilia rajto decidi pri si mem, kaj apliki ĉiajn aliajn rimedojn taŭgajn por plifirmigi universalan pacon*." Do, suvereneco sed ne absoluta: submetita ĉiam al internacia juro kaj al paco. Suvereneco kaj egaleco estas relativaj inter la ŝtatoj en tio, ke artikolo 2 de la Ĉarto agnoskas la neceson "*plenumi bonafide la devojn kiujn ili [la ŝtatoj] alprenis konforme al ĉi tiu Ĉarto*". Nenio en la Ĉarto rajtigas interveni en aferojn kiuj esence apartenas al la interna jurisdikcio de iu ajn ŝtato, nek devigas la membrojn submeti tiujn aferojn al solvoproceduro laŭ la Ĉarto. (La tekston de la Ĉarto oni povas trovi en Esperanto ĉe www.esperantoporun.org.)

La ŝtatoj estas jure egalaj, eĉ se ne egalaj en aliaj sencoj: ni konas grandajn potencojn kaj malgrandajn landojn, ĉu geografie, ĉu ekonomie. Sed ĉiuj havas la samajn rajtojn kaj devojn antaŭ la internacia komunumo.

Tamen, en 1945 la Ĉarto de UN ne konservis tiun rajton de egaleco kiam ĝi atribuis la vetorajton al la kvin grandaj potencoj venkintaj en la Dua Mondmilito. Ni konas la historiajn kaj politikajn kialojn.

Resume, do, egaleco inter landoj enhavas juran egalecon, respekton de ĉiu ŝtato al la aliaj, netuŝeblecon, kaj la devon plenumi bonafide la internaciajn devojn kaj kunvivi pace. Tiuj principoj de suverena egaleco estas tamen nuntempe en dubo, pro pliiĝanta ŝtata interdependeco kaj t.n. tutmondiĝo. Ekzemple, en Eŭropo, la landoj apartenantaj al la Eŭropa Unio transdonas gravan parton de sia suvereneco al la Unio.[21]

## Redukti malegalecon ene de landoj

La principo de egaleco antaŭ la leĝaro estas intime ligita al nediskriminacio en la sfero de homaj rajtoj. Ĉiu membro de UN akceptis la devon protekti tiujn rajtojn: laŭ artikolo 1.3. de la Ĉarto, UN celas "*Realigi internacian kunlaboradon por solvi internaciajn problemojn de ekonomia, socia, kultura aŭ humaneca karaktero kaj por antaŭenigi kaj stimuli la respekton al homaj rajtoj kaj al fundamentaj liberecoj*" (vidu ankaŭ artikolojn 55 kaj 56).

Redukti malegalecon ene de landoj postulas stimuli la socian, ekonomian kaj politikan inkluzivon de la tuta loĝantaro ene de landoj, per fiskaj, salajraj kaj sociaj leĝoj cele al laŭstadia atingo de plej granda egaleco (vidu art. 2 kaj 7 de la Universala Deklaracio de Homaj Rajtoj, kaj art. 2 de la Internacia Pakto pri Civilaj kaj Politikaj Rajtoj). Aldone al tio, art. 26 de la Internacia Pakto pri Civilaj kaj Politikaj Rajtoj agnoskas la juran egalecon de ĉiu homo, kiu do rajtas, sen diskriminacio, al egala jura protekto. Oni malpermesas ĉian diskriminacion kaj garantias al ĉiuj "egalan kaj efikan protektadon kontraŭ diskriminacio per raso, haŭtkoloro, sekso, lingvo, religio, politika aŭ alia opinio, nacia aŭ socia deveno, posedaĵoj, naskiĝo

21 Vidu P.M. Dupuy, "International law: Torn Between coexistence, cooperation and globalization" en *European Journal of International Law*, 9 (1998), p. 278 kaj sekvaj.

aŭ alia stato". Same, art. 27 protektas la etnajn, lingvajn aŭ religiajn minoritatojn ekzistantajn en iu ŝtato.

Egaleco antaŭ la leĝaro signifas ke tiu jura protekto devas esti egala por ĉiuj, ĉiam konsiderante la "justajn malsamecojn" inter personoj kaj grupoj, agnoskatajn de art. 2.3 de la Internacia Pakto pri Ekonomiaj, Sociaj kaj Kulturaj Rajtoj.[22] Kvankam la plej granda parto de landaj konstitucioj agnoskas nediskriminacion, ni konstatas ofte rasan malsamecon kaj problemojn rilate nedokumentitajn enmigrantojn aŭ necivitanojn, al kiuj multaj landoj asignas malsuperan leĝan statuson ene de la nacia leĝaro. Oni tion vidas ekzemple en kontraŭmigraj leĝoj, aŭ rilate al rifuĝintoj, personoj sen civitaneco, ktp. Tamen, la internacia juro defendas la suverenecon de la ŝtato por determini kiu estas civitano, kiel trakti enmigradon, kiel difini landlimojn, ktp. Do, ni povas demandi nin ĝis kiu punkto etendiĝas la ŝtata suvereneco antaŭ ol trafi malegalecon.[23]

UN rekomendis rilate rifuĝintojn, azilon, kaj naciecon, ke la ŝtatoj ne rajtu subordigi la plenumon de la principo de egaleco antaŭ la leĝaro kaj de nediskriminacio, por atingi proprajn celojn pri iu ajn publika politiko, inkluzive rilate migradon.

Aliflanke, se ni observas sociajn malegalojn nacie kaj internacie, ni konstatas ke socioj kun grandaj sociaj diferencoj kaŭzas gravan ŝokon en civilaj, politikaj kaj sociaj rajtoj de civitanoj. Tamen, la nuna jurisprudenco tiurilata estas malofta, kaj kiam oni juĝas tiujn temojn, oni emas ne paroli pri malegaleco aŭ diskriminacio sed trakti nur specifajn temojn kiel sanon, nutradon, loĝadon ktp.[24]

---

22 L. Bosniak, "Human rights within one state: Dilemmas of personhood in liberal constitutional thought" en M.B. Dembour kaj T. Kelly (eds) Are Human Rights for Migrants? 2011, p. 201-221.

23 Verdikto de Eŭropa Kortumo pri Homaj Rajtoj 2017. N.D kaj N.T kontraŭ Hispanio.

24 Vidu ekzemple la Verdikton de la Eŭropa Kortumo pri Homaj Rajtoj kontraŭ Grekio kaj Belgio, 1-1-2011 kaj ankaŭ Verdiktojn Yakye Axa kontraŭ Paragvajo (17-6-2005) kaj Xákmok Kásek kontraŭ Paragvajo (24-an aŭgusto 2010). Ambaŭ verdiktoj , inter aliaj, ne traktis malobservon de egaleco, laŭ la Amerika Konvencio pri Homaj Rajtoj, kvankam estis motivoj por ĝia konsidero.

La lastatempa evoluo de la homaj rajtoj faris gravan progreson rilate egalecon antaŭ la leĝaro. Tiu progreso kontribuas al solvado de malobservo de tiu rajto, kiu tamen afliktas milionojn da homoj en la mondo.

**KION FARI?**

**Unuope:**

1. Rilate egalecon inter ŝtatoj, ni ofte opinias ke ni malmulton povas fari kiel esperantistoj. Tamen, ni havas gravan ŝancon en la momento de balotadoj, pensante pri la kandidatoj kaj iliaj pensmanieroj rilate al la temo. Pensu pri tio antaŭ ol voĉdoni.
2. Rilate egalecon ene de ŝtatoj, konsciu pri teritoria malegaleco. Ĉu la regionoj kaj komunumoj de via lando estas ekonomie kaj socie similaj? En viaj urboj, ĉu ekzistas “specialaj” kvartaloj aŭ enloĝantaroj traktataj pli malfavore? Ĉu oni diskriminacias kontraŭ iliaj enloĝantoj? Ĉu vi mem rilatas egale al aliaj etnoj? Kaj kion vi povas fari por ŝanĝi la situacion?
3. En sia laboro por homaj rajtoj, precipe ĉe UN en Ĝenevo, sed ankaŭ en Novjorko, UEA konstante bezonas la helpon de volontuloj. Proponu vin!

**Grupe:**

1. La ĉi-supraj temoj povas formi bonan materialon por debatoj kaj diskutoj en via loka grupo, se vi pretas flankenmeti antaŭjuĝojn kaj interveni kaj aŭskulti kun esperantista toleremo.
2. Kion via grupo faras por interesi ĉiujn etnajn kaj ekonomiajn grupojn en via komunumo pri Esperanto. Ĉu eblas fari pli?
3. La 10-a de decembro estas Homrajta Tago. Organizu specialan kunvenon de via grupo por festi tiun tagon. Invitu aliajn organizojn kune festi en kunveno en via loka

lingvo, en kiu vi povos ankaŭ klarigi pri lingvo kaj homaj rajtoj, kaj pri la rolo de Esperanto.

4. La 24-a de oktobro estas la ĉiujara Tago de UN – alia okazo por kunlabori kun aliaj organizoj en via regiono, precipe tiuj kiuj okupiĝas pri UN-aferoj.

**Lande:**

1. Ĉu via landa asocio estas malferma al ĉiuj etnaj grupoj kaj havas bonan reprezentiĝon de tiuj grupoj? Se via respondo estas "ne", kion vi kaj la aliaj membroj povas fari por ŝanĝi tiun situacion? Se via respondo estas "jes", klarigu al esperantistoj en aliaj landoj kiel tiu via politiko de inkluzivo funkcias.
2. Ĉu viaopinie Universala Esperanto-Asocio faras ĉion kion ĝi povus fari por antaŭenigi egalecon? Se ne, kion vi kaj via landa asocio povas fari por progresigi tiun procedon?

**KION LEGI?**

Vi trovos la tekstojn de pluraj internaciaj instrumentoj, inkluzive la Ĉarton de UN, kaj ligojn al aliaj, ĉe www.esperantoporun.org. Aparte grava estas la Universala Deklaracio de Homaj Rajtoj. Vidu ankaŭ la libreton *Fundamento de la Homaj Rajtoj,* UEA, 2016, kiu enhavas aparte utilan artikolon de prof. Urueña, "Enkonduke pri homaj rajtoj," kune kun la Universala Deklaracio, la Internacia Pakto pri Civilaj kaj Politikaj Rajtoj, kaj la Internacia Pakto pri Ekonomiaj, Sociaj kaj Kulturaj Rajtoj.

CELO 11.

# DAURIPOVAJ URBOJ KAJ KOMUNUMOJ

*Eric Hamelin kaj*
*Guillaume Armide*

**Daŭripovaj urboj kaj komunumoj: laŭ kiuj direktoj ni iru?**

Nuntempe multnombraj urboj kaj teritorioj en la mondo antaŭenigas daŭripovan evoluon de teritorioj tra tre konkretaj realigoj aŭ projektoj, notinde en la fakoj de daŭripova transportado, ekologia konstruado, enurbaj naturo kaj pejzaĝoj, kaj ĝenerale rilate al la vivkvalito kaj la integriĝo de ĉiuj tiuj aspektoj.

Eŭropo, kun la delonga politika influo de malsamaj ekologiaj movadoj, ludas gravan rolon en tiuj fakoj. Ekologiajn strategiojn notinde sorbas granda nombro da eŭropaj metropoloj, inter kiuj oni ofte mencias la ekzemplojn de mezgrandaj metropoloj kiel Kopenhago, Amsterdamo, Strasburgo, Bolonjo aŭ Freiburg. Ni provu, por resumi la plej progresemajn tendencojn, priskribi idealan teritorion laŭ vidpunkto de daŭripova evoluo.

Tiu teritorio plej unue zorgas pri limigo de troa sennaturigo de grundoj, ankaŭ nomata “urba disrampo” t.e. ekologie malprofita tendenco uzi pli da spaco ol necese por plenumi la bezonojn de la loĝantaro. Ĝi ankaŭ strebas por malpliigi la uzon de aŭtoj, kiu generas diversajn tipojn de poluo: atmosfera poluo (partikloj kaj toksaj gasoj), klimata poluo ($CO_2$, karbona dioksido, kiu kontribuas al la forceja efiko), sona poluo, kaj spaca poluo, nome okupado de konsiderinda bituma spaco pro stratoj kaj parkumado. Tiuj du prizorgoj parte kovras unu la alian, ĉar la urba disrampo ankaŭ efikas negative per kreskigo de la bezonoj de permotoraj moviĝoj.

Kiam ĝia loĝantaro kreskas, ĝi do strebas aranĝi sufiĉe kompaktajn kvartalojn, samtempe evitante troan amasigon de la speco vidata en certaj vertikalaj metropoloj, kie oni riskas fuĝigi la enloĝantojn al la periferioj. Ĝi atentas pri tio, ke novaj kvartaloj estu kvartaloj en kiuj oni povas labori, provizumi, edukiĝi, ŝatokupiĝi sen la neceso uzi veturilon. Ĝi klopodas ankaŭ laŭeble, ke tiuj novaj kvartaloj integriĝu en la jam ekzistantan urban medion, ekzemple per renovigo de forlasitaj urbaj areoj aŭ per reuzo de spaco el malaktualaj substrukturoj kiel enurbaj aŭtoŝoseoj aŭ neproporciaj komercaj areoj kun ties gigantaj pratempaj parkejoj. Ĝi certigas fine, ke ĉiu nova kvartalo estu konektita al la aliaj per biciklaj vojoj kaj publikaj transportoj akcepteblaj al la enloĝantaro, kiel ekzemple tramoj, aŭtobusoj sur propraj vojoj, aŭ trajnoj surgrundaj – prefere ol subgrundaj, ĉar malmultaj homoj aspiras al subgrunda vivo.

Ĝi same klopodas konservi la viglecon de historiaj kvartaloj, celante kiel eble nature tiun mikson de proksimaj uzoj, kiuj igas la urbon pli alloga kaj piedirebla. Tiucele, ĝi multobligas piedirajn areojn aŭ larĝajn trotuarojn, publikajn placojn kiuj favoras agrablan kunvivadon kaj tute aparte ebligas instalon de kafejaj terasoj, malgrandajn verdejojn, trankvilejojn. Ĝi evoluigas ankaŭ publikajn transportilojn kiuj faciligas atingon de ĝiaj kvartaloj kaj ebligas la senaŭtomobilan vivon. Ĝi favoras la uzon de senmotoraj kaj elektraj bicikloj per instalo de komfortaj biciklaj ĉefvojoj, kaj limigojn, en certaj areoj, al termikaj aŭtoj kaj motorbicikloj bruaj kaj poluaj.

Paralele ĝi celas ree regi la dislokitan urboplanon tipan de la aŭtomobila erao, konsistantan el komercaj areoj, industriaj areoj, domaraj areoj disigitaj per aŭtoŝoseoj kaj periferiaj alirvojoj, parkejoj kaj postlasitaj herbejoj. Ĝi planas laŭgradan transigon de tiuj ekologie katastrofaj areoj al estontaj “ekokvartaloj” enhavantaj verdajn spacojn, mikson de uzoj kaj ekologiajn loĝejojn laŭ la evoluo de la demografiaj bezonoj.

Pli ĝenerale, ĝi celas plibonigi la vivkvaliton de ĉiuj tipoj de kvartaloj per multigo de publikaj verdejoj kaj ĉeesto de vegetaĵoj ĝis la fasadoj, kaj ankaŭ en stratoj, kortoj, avenuoj. Ĝi protektas laŭnature kaj firme la ekzistantajn verdejojn kaj ĉiujn transvivantajn naturajn ekologiajn koridorojn, notinde laŭ la akvofluoj. Tiel ĝi respondas ankaŭ al la aktuala zorgo ligita al klimata plivarmiĝo, nome la lukto kontraŭ "urbaj varmo-insuloj".

Laŭ sama logiko ĝi strebas plibonigi la kvaliton de la loĝejaro. Ĝi reguligas konstruadon rilate al termika izoliteco por eviti uzon de klimatiziloj kaj bezonojn varmigi, tiel reduktante la konsumon de energio kaj eligadon de karbona dioksido el la konstruaĵoj. Ĝi ankaŭ aplikas bazajn regulojn pri komforto per favorado de sona izolo kaj natura lumo, per disponigo de eksteraj spacoj por laŭeble plej granda nombro da loĝlokoj, kiel balkonoj, kortoj, loĝioj aŭ privatecaj ĝardenetoj, kiuj povas esti komunaj ĝardenoj. Ĝi tiel klopodas igi pli alloga loĝejaron relative kompaktan kaj celas tiel eviti troan konsumon de spaco per ĝishorizontaj domaraj zonoj kaj bitumaj vojoj. Tiel ni kovris la tuton de la temo revenante al la unua prizorgo…

## KION FARI?

### Unuope:

1. Informiĝu pri urba planado en via urbo kaj, kunlabore kun viaj najbaroj, laboru por plibonigi kaj plibeligi vian kvartalon.
2. Lernu pri arboj, plantoj, insektoj, por povi pli efike labori por plibonigoj.

### Grupe:

1. Loka grupo povas multon fari. Kiel menciite supre, eblas kunlabori por plibonigi kaj plibeligi la urbon, subteni

lokajn politikistojn kiuj celas tian progreson, kaj eĉ mem grupiĝi por praktika laboro kun tiu celo. Se inter vi vi uzos Esperanton, pliboniĝos via lingvoscio.

2. Vi povas organizi ekskursojn al interesaj urbaj kvartaloj, kunveni en restoracioj, pikniki en parkoj, samtempe uzante la lingvon kaj informiĝante pri la urbo kaj ties diverseco.

**Lande:**

1. Ĉu en via lando oni faris aparte utilan progreson en la kreado de efike funkciantaj urboj aŭ urbaj spacoj?  Se jes, informu esperantistojn en aliaj landoj, interŝanĝu spertojn kun ili, organizu spacialajn kunvenojn en kongresoj kaj invitu esperantistojn el najbaraj landoj por priparoli urban planadon.

# CELO 12.
# RESPONDECAJ KONSUMO KAJ PRODUKTO

***Manfred Westermayer***

Tutmonda konsumado kaj produktado – motoro de la monda ekonomio – sin apogas sur la uzon de la naturmedio kaj rimedoj laŭ maniero kiu daŭre havas detruajn efikojn sur la planedo.

Ekonomia kaj socia progreso dum la lastaj jarcentoj estas akompanata de degenerado de naturmedio kaj endanĝerigas ĝuste tiujn sistemojn sur kiuj nia estonta evoluado dependas.

Se la tutmonda loĝantaro atingus 9,6 miliardojn ĝis 2050, la ekvivalento de preskaŭ tri planedoj necesus por provizi la naturajn rimedojn laŭ nuna vivmaniero – la ekologia premsigno.

Por atingi daŭrigeblan ekonomion, la registaroj devas devigi firmaojn krei produktojn longdaŭre uzeblajn, laŭeble ripareblajn kaj sen kemiaĵoj danĝeraj al uzantoj kaj naturo. Ni devas zorgi por daŭrigebla maniero de konsumado kaj produktado, ĉar alimaniere la homaro kaj naturo estos minacataj de tutmonda kolapso.

**Kelkaj faktoj kaj ciferoj**

La ekologia premsigno, la tielnomata “piedspuro” estas indikilo kiu devas atingi la kvanton 2 por esti daŭripova. Temas pri la nombro de globaj hektaroj (gha) necesaj por unu persono dum unu jaro, kaj enkalkulas biologiajn resursojn: areo kiu produktas nutraĵojn kaj areoj (arbaroj, ktp.) kiuj absorbas karbonan dioksidon ($CO_2$) eligita pro produktado aŭ vivobezonoj. Limigitaj resursoj, kiel metaloj kaj fuelo, estas en la kalkuloj en formo de eligita $CO_2$.

La homoj en riĉaj landoj foruzas multe pli da resursoj ol tiuj en malriĉaj landoj, kaj tiuj resursoj estas plej ekspluatataj en malriĉaj landoj. La Ekologia Piedspuro de unu persono situas inter 2 kaj 10 gha, depende de la regiono (varma aŭ malvarma) kaj enloĝado. La Resursa Piedsigno en tunoj por unu homo kaj unu jaro montras vastan gamon inter 2 t ĝis 26 t.

Ĉiujare, proksimume unu triono de ĉiuj nutraĵoj produktitaj – sume 1,3 miliardoj da tunoj – estas forĵetata, ĉar ĝi putras ĉe konsumantoj kaj vendistoj, aŭ jam pro maltaŭga transporto kaj stokado.

La uzado de ardantaj lumo-ampoloj kun malalta rendimento, en hejmoj kaj oficejoj aŭ por lumigi stratojn, malŝparas elektran energion. Dank' al LED-tekniko, eblas provizi lumon je malgranda perdo. Nia interreta teknologio bezonas daŭran energio-provizon, kaj tie okazas granda perdo da energio, nerimarkite de la konsumantoj.

Elektronikaj aparatoj tro rapide perdas uzeblon, unuflanke ĉar rapida novigado postulas aĉeti novajn aparatojn, kaj aliflanke ĉar riparado tro ofte ne eblas je prezo komparebla kun tiu de nova ilo. Ilia konstrumaniero devus antaŭvidi la eblecon ripari aŭ interŝanĝi difektajn partojn. Aliflanke modernaj komputiloj kaj kurento-adaptiloj bezonas malpli da energio ol tiuj de la 1990-aj jaroj.

La reciklado de ne plu uzeblaj varoj devus esti deviga parto de ilia konstruado kaj de oficiala akcepto de produktoj, ĉar miksitaj materialoj malfaciligas la recikladon.

Daŭrigeblaj konsumo kaj produktado signifas pli bone uzi malpli da resursoj. Ĝi malkuplas ekonomian kreskon disde degenerado de la naturmedio, pliigante resurso-efikecon kaj antaŭenigante daŭrigeblajn vivmanierojn. Nur tio garantias la senliman ekziston de homa civilizo.

## Kromefiko de KOVIM-19 al la temo Konsumado kaj Produktado

La nuna krizo estas okazo moviĝi al pli daŭripova ekonomio kiu funkcias kaj por homoj kaj por la planedo. La ekapero de KOVIM-19 substrekis la fortan rilaton inter homoj kaj naturo kaj malkovris la fundamentajn principojn kiujn ni konstante frontas: homoj havas senlimajn dezirojn, sed la planedo havas limigitan kapaciton kontentigi ĉiujn. Ni devas kompreni kaj akcepti la limojn ĝis kiuj la homaro povas uzi la naturon, se ĝi volas eviti negativan efikon.

### KION FARI?

**Unuope:**
Vivi laŭ daŭripova maniero postulas de ni, homoj/konsumantoj:

1. Informiĝi pri la produktad-maniero kaj decidi por plejeble longdaŭraj produktoj kaj medio-afablaj manieroj de produktado;
2. Limigi la aĉeton de varoj laŭ la neceso, kaj rezigni sekvi modojn;
3. Pripensi ĉu propra aŭtomobilo necesas, kaj, se jes, ke tiu kongruas al viaj bezonoj (la nuntempaj grandaj-dikaj SUV-aŭtoj konsumas tro da resursoj, kaj ne taŭgas por mallarĝaj stratoj kie ili endanĝerigas la aliajn trafiko-partnerojn);
4. Uzi komunumajn trafikilojn aŭ piediri kaj bicikli reduktas la konsumon de resursoj;
5. Uzi elektrajn kaj elektronikajn aparatojn saĝe, ke ili ne malŝparas energion: pli densa fotaĵo kreas grandajn dosierojn: sendi ilin tra la interreto kostas pli da energio; serĉi ĉe Google bezonas pli da datum-transportado kaj energio ol serĉi en wikipedia.org;
6. Malŝalti aparatojn kiam eblas;

7. Papero estas malmultekosta, sed kaŭzas grandan piedspuron; redoni paperon al reciklado kaj uzi recikligitan paperon; uzi foliojn ambaŭflanke laŭeble; prepari tekstojn tiel ke la spaco estas bone uzata – aparte kiam temas pri multaj kopioj;
8. Aĉeti nutraĵojn nur laŭ la bezono, forkonsumi ĉion kaj ne forĵeti manĝeblajn produktojn en sitelon por defalaĵoj; aĉeti malpli da viando, kaj prefere de regiona kulturo kiu ne dependas de importo de furaĝo por la bestoj, ĉar tio kaŭzas la detruon de pluv-arbaroj; aĉeti prefere kvaliton de organika agrikulturo, kiu ne enhavas pesticidojn;
9. Se vi havas gazonon en via ĝardeno, ne uzu rotaciantan falĉ-maŝinon, ĉar tio detruas insektojn kaj larvojn de insektoj, ekzemple papiliojn; herbejo kun floroj kaj akra falĉilo estas pli afabla al la naturo;
10. Eviti plastajn saketojn, kunporti ŝtofajn saketojn kaj ujojn por malsekaj produktoj;
11. Aĉeti surloke evitas kartonojn (produktitajn el arboj) kaj transportojn, kaj reduktas la bezonon de gigantaj centroj de logistiko kiuj voras agrikulturajn terenojn (malbona ekzemplo: Amazon);
12. Plani vojaĝojn respondece: longaj vojaĝoj bezonas multe da fuelo; la pandemio KOVIM-19 donas okazojn ŝanĝi nian skemon de internacia kunlaboro uzante video-konferencojn por internaciaj diskutoj; tio reduktas vojaĝojn kaj aparte flugadon.

**Grupe kaj lande:**

La Internacia Junulara Kongreso de Esperanto en 1997 en Assisi havis verdan temon "*Homoj, ĉu sub aŭ parto de naturo?*" Enkadre de la kunsido de AVE kolektiĝis kelkaj konsiloj. Okaze de la 99-a Universala Kongreso en Buenos Aires (2014), kun la kongrestemo "Daŭrigeblo", ni diskutis denove la ekologiajn efikojn de niaj kongresaj vojaĝoj kaj kio okazas dum la kongresoj. Jen kelkaj konsiloj:

1. Proponi eblecojn manĝi vegetare; modele farita dum la 104-a UK en Lahti.
2. Prefere uzi trajnon ol aviadilon; aktivi en grupoj pri naturo, kiel AVE (ekologio, daŭripoveco, politiko), BEMI (organizi biciklokaravanojn), TEVA (vegetara manĝado).
3. Antaŭ Universala Kongreso: Informi la partoprenontojn pri la lokaj trajn- kaj aŭtobus-sistemoj por alveni de la stacidomo kaj pri lokaj dumkongresaj biletoj. Se la loko estas malbone ligita per publika trafiko, necesas ke la kongresaj komencoj kaj finoj kongruu kun la publika trafiko. Aŭ organizi transportilon al stacidomo, organizi komunan kunveturadon de diversaj regionoj
4. Kompensi la ekologiajn vojaĝ-kostojn. Jen indeks-nombroj pri vojaĝi per aviadilo (2), propra aŭto (1), buso (0,5) aŭ trajno (0,3,) kiuj egalas plejparte al fosiliaj energioj kiuj eligas karbondioksidon. Se flugi necesas por tre foraj loĝantoj, intertempe UEA prezentas konton por kompensi la $CO_2$-eligon subtenante rearbarigo-projektojn aŭ similajn agadojn kiuj sorbas $CO_2$. Rekta agado estus planti arbojn dum la kongreso (se la sezono taŭgas) kaj la lokaj samideanoj zorgu ke tiuj bone evoluas.

**KION LEGI?**

**Interretaj ligiloj:**

- Asocio de Verduloj Esperantistaj (AVE): www.verduloj.org AVE, Verduloj Esperantistaj, pri rearbarigo > Per-Esperanto Agado
- Tutmonda Esperantista Vegetarana Asocio: https://www.vegetarismo.info
- Internacia Biciklista Esperantista Movado: http://bemi.free.fr/eo.htm
- Sennacieca Asocio Tutmonda: www.SATesperanto.org
- Ekologia premsigno: www.eo.wikipedia.org/wiki/Ekologia_premsigno

- Klimataj organizoj: www.de.wikipedia.org/wiki/Klimakompensation
- Sustainable Process Index (SPI): http://www.fussabdrucksrechner.at (kalkulas la ekologian piedspuron de unuopa persono aŭ de komunumo, uzante gravajn detalojn de konsumado (angle kaj germane).
- Resursa piedspuro: http://www.sustainabledevelopment-germany.github.io/12/

**Literaturo en Esperanto pri Konsumado kaj Produktado:**

- *Kolapsologio*, ĉeftemo de Sennaciulo 2020/03-04, #1377-1378, eld.  SATesperanto.org
- *Kien la klimato?* #1 kaj #2, (2011) 70 p., Monda Asembleo Sociala, mas-eo.org, #2 ISBN 978-2-918300-56-4, mendebla ĉe libroservoj de UEA, FEL k.a.
- *Plano B – Mobilizo por savi la civilizacion*, Lester R. Brown, 2007, traduko-teamo, eld. Robin Beto, eldona fako de SAT, 341 p., formato 24 * 16 cm, , ISBN 978-2-918053-01-9
- Traduko de “Plan B 3.0“ (tradukita en multaj lingvoj): www.earth-policy.org
- Kiosko (1 – 10), jaraj temaj kolektoj de D-ro Wolfgang Guenther, pri daŭripoveco, bioekonomio, antropoceno, resilienco ktp., krome pri arto. Nula Horo, Kassel, w.guenther.esperanto@web.de

**Fruaj verkoj:**

- *Ekologio – La alia Verda Movado*, de Ralph Harry kaj Donald Broadribb, okaze de la Aŭstralia kaj Novzelanda Esperanto-Kongresoj 1992. Inkluzivas: artikolon pri klimatoŝanĝiĝo kaj la Ĉarto de la Tero, proponata de la Konferenco de UN pri Medio kaj Evoluo. Projekto de Ralph Harry, antaŭa ambasadoro de Aŭstralio ĉe U.N. Broŝuro, 64 p. [La Ĉarto ne estis akceptita, sed eniris en la dokumentojn de la Pintokonferenco de UN por Medio

kaj Evoluigo en Rio de Janeiro (1992): (angle, hispane, portugale): www.earthcharter.org/; (Esperanto): www.verduloj.org/dokument.htm – serĉu UN, Tero.]

- *Nachklänge / Resonoj*, 1983, Natur & Umwelt Verlag, München; ilustritaj poeziaĵoj, tradukita de Eckhard Bick; pripensoj pri la ofte tro neglekta agado kontraŭ naturo flanke de konsumantoj, agrikulturo kaj industrio, de Hubert Weinzierl, tiama prezidento de la Asocio por Vivmedio kaj Naturprotektado en Germanio (BUND e.V.).
- *Sin nutri en la naturo*, de Edmond Dazun, 1995, eldonejo Laute!, Beauville, 223 p., desegnoj, detalaj priskriboj de manĝeblaj plantoj, kaj listo de danĝeraj plantoj.
- *Fokuso*, gazeto de Esperanto-Centro Budapeŝto, i.a. pri naturprotektado, 1980-aj jaroj.

# CELO 13.
# KLIMATA AGADO

*Orlando Raola*

**Urĝe agi por kontraŭbatali klimatŝanĝiĝon kaj ĝiajn efikojn (konforme al la Kadra Konvencio de Unuiĝintaj Nacioj pri Klimatŝanĝiĝo)**

Por la homoj en la pratempo, la Tero estis sovaĝa, nekonata kaj esence senlima etendaĵo. Naturo provizadis la bezonaĵojn kaj estis tute normale ĉerpi kaj ĉerpi el ĝiaj riĉaĵoj, sen ajna konscio aŭ zorgo pri ilia limigiteco. Pligrandiĝis laŭgrade la homa industrio, vivo fariĝis pli komforta, sed ankaŭ pliiĝis la kvanto da forĵetaĵoj kaj rubaĵo elĵetita je konstanta ritmo.

Subite, la homoj ekkonsciis pri la malbonaj sekvoj de atmosfera malpuriĝo, kiam la aero super Tokio fariĝis nespirebla kaj la nebulo super Losanĝeleso sufokis homojn ĝis morto.

Kompreneble temis pri ŝanĝoj en la lokaj atmosferaj kondiĉoj, en la tiel nomata vetero.

Tamen, hodiaŭ ni alfrontas multe pli drastan kaj timigan aferon, ĉar nun, preterdube, la tutmondaj sciencistoj interkonsentas pri la decida influo de industria homa agado en la ŝanĝiĝo de klimataj kondiĉoj. La faktoj parolas per si mem: plialtiĝo de la averaĝa temperaturo kiel konsekvenco de plialtiĝo de koncentriĝo de forcejaj gasoj, kaj speciale de karbona dioksido ($CO_2$). La konsekvencoj estas okulfrapaj: malapero de glacio dum parto de la jaro ĉe la polusaj regionoj, pli intensaj kaj longdaŭraj veteraj fenomenoj, ŝanĝoj en la vivkondiĉoj de amasego da plantaj kaj bestaj specioj.

La absoluta plejmulto de la scienca komunumo plene konsentas pri ĉiuj ĉi aferoj, sed, tre bedaŭrinde, intermiksiĝas kun la scienco la decidopovo de senskrupulaj politikistoj kaj de riĉaj avaruloj kiuj volas ĉiam pli kaj pli akiri senrigarde de la konsekvencoj, kun nekredebla ignorado de la efikoj de la nunaj agoj sur la bonfarto kaj eĉ vivkapablo de la estontaj generacioj.

La konscio pri la problemo kaj la urĝeco trovi adekvatajn solvojn se ni volas certigi pluvivadon en tiu ĉi planedo bonŝance etendiĝas kaj la voĉoj estas ĉiam pli kaj pli laŭtaj. Unuiĝintaj Nacioj, pere de la Celoj por Daŭripova Evoluigo, kaj UNESKO gvidas la movadon, sed individuoj kaj organizaĵoj dise tra la planedo pli kaj pli montras intereson kaj sindevigon.

Kaj ne temas nur pri paroladoj, analizoj, publikigaĵoj, eĉ se ĉiuj ĉi estas bonvenaj. Ankaŭ ne sufiĉas manifestacii, malsatstriki kaj bojkoti la fikomercistojn, eĉ se tio estas ankaŭ tute en ordo. La granda defio estas adopti multflankan, science bazitan, mezureblan, malferman, demokratian kaj efikan planon por haltigi la poluadon atmosferan, akvan kaj teran, por stabiligi kaj eĉ malgrandigi la kvanton de forcejaj gasoj en la atmosfero, certigante stabiliĝon de la temperaturo, kaj klopodi evoluigi la homan agadon en maniero pli kongrua kun la respekto al la sano kaj bonfarto de la tuta planedo.

La agado por kontraŭbatali klimatŝanĝiĝon devas nepre starti ĉe la komuna intenco eduki la homojn de ĉiuj aĝoj, de ĉiuj landoj, de ĉiuj kulturoj kaj de ĉiuj ekonomiaj niveloj por certigi la plej vastan komprenon pri la faktoj: ne eblas daŭre ĉerpi, ne eblas daŭre celi ekonomian pligrandiĝon en sistemo limigita space kaj laŭ materiaj rimedoj; ne eblas daŭre pritrakti la teran atmosferon kiel senpagan defluejon, kien oni ĵetu ion ajn senzorge kaj senhalte. Ni loĝas en komuna domo, la planedo Tero, kaj ni, la homaro, ne havas aŭ havos alian loĝlokon en la universo dum la antaŭvidebla estonteco.

La scienca kaj teknika evoluigo, kiu certigas al plej multe da homoj decan vivon, sen malsato kaj sen malsanoj, en mondo pli paca kaj pli plaĉa, tute maltrafos la celon plibonigi la homan vivon, se mankas la kompreno pri la limoj altruditaj de la naturo.

Jen interesa demando: ĉu la movado celanta al protektado de la planedo kontraŭ klimata ŝanĝiĝo kaj ĝiaj konsekvencoj povas iel esti ligita al la klopodoj de la Esperanto-movado cele al pli justa monda komunika ordo? En la kadro de Unuiĝintaj Nacioj, la reprezentantoj de la mondaj registaroj diskutas kaj analizas, planas kaj denove planas. Ilia agado okazas en pluraj lingvoj: angla, franca, ĉina, rusa, araba kaj hispana. Sed se la komuna strebado cele al haltigo kaj inversigo de la klimataj ŝanĝoj restos nur ĉe la nivelo de registaroj, ni, la ordinaraj teranoj, ne havas esperon pri estonteco. Kaj interalie, ni povas de nun forgesi pri internacia lingvo, ĉar ne estos komuna planedo loĝebla por uzi kaj ĝui ĝin. La movado celanta klimatan justecon devas esti movado de la individuaj unuopuloj en ĉiuj landoj de la mondo.

Tial oni povas  trovi rektan konekton inter la celoj de esperantistoj kaj la celoj de la movado por klimata justeco. Ni povas provizi alternativan vojon por komunikiĝo inter ĉiuj homoj kiuj interesiĝas pri vivipova estonteco sur la planedo Tero. Ĉu temas nur pri “faka agado”? Ne, tiu ĉi problemo tuŝas ĉiujn fakojn kaj tavolojn de la socio. Ĉu temas pri politika aŭ sociekonomia afero? Ne. Senrigarde de via politika vidpunkto kaj de via ekonomia aŭ socia pensmaniero, vi estos same tuŝita de la aliigo de la klimato sur la planedo. Temas pri vere “neŭtrala kaj internacia fenomeno”.

## KION FARI?

Nia antaŭa ĉapitro, pri respondecaj konsumado kaj produktado, donas multajn ideojn kaj sugestojn rilate al tiuj temoj, kiuj rekte rilatas al la demando pri klimatŝanĝiĝo. Konsideru ankaŭ la jenajn punktojn.

**Unuope:**

1. Verdigu vian pendoladon. Se vi regule (aŭ neregule!) vizitas oficejon, lernejon, laborejon: uzu trajnon aŭ aŭtobuson anstataŭ aŭtomobilon, uzu biciklon anstataŭ trajnon aŭ aŭtobuson.
2. Manĝu malpli da viando.
3. Hejtu vian domon saĝe: uzu programeblan termostaton; instalu ekonomian hejtilon; bone izolu la murojn, tegmentojn kaj fenestrojn.
4. Uzu energiŝparajn ampolojn.
5. Lavu vestojn en malvarma akvo laŭeble.
6. Uzu renovigeblan energion.
7. Investu en klimatkonsciaj entreprenoj.
8. Subtenu klimatkonsciajn junularajn organizojn.
9. Se vi vojaĝas al Esperanto-kongreso, uzu vian tempon tie ĝis maksimumo: tia vojaĝo fariĝu investo en via esperantisteco.
10. Subtenu klimatkonsciajn politikistojn kaj politikajn partiojn.

**Grupe:**

1. Ekzistas amaso da materialo pri klimatŝanĝiĝo en preskaŭ ĉiu lingvo, inkluzive Esperanton. Estus bone se via loka Esperanto-grupo akirus materialon pri la temo en Esperanto, kaj eĉ pli bone, se ĝi komune kreus novan materialon – kaj disanoncus tiun iniciaton en la gazetaro kaj ĉe sociaj medioj.

2. Petu la membrojn de via klubo kune partopreni en diskuto kaj klarigo pri klimatŝanĝiĝo de la vidpunkto de iliaj profesioj.

**Lande:**

1. Uzu ĉiujn rimedojn de via landa asocio (precipe ĝiajn membrojn!) por eduki la esperantistojn pri la graveco de laboro kontraŭ klimatŝanĝiĝo.

**KION LEGI?**

Artikoloj pri klimatŝanĝiĝo el *Le monde diplomatique* https://eo.mondediplo.com/mot1058.html
*Kien la klimato?* Eldonis MAS: Monda Asembleo Socia.

# CELO 14.
# **SUBAKVA VIVO**

*Francesco Maurelli*

**Enkonduko**

Oceanoj kovras 71% de la tergloba surfaco kaj enhavas 97% de la tuta akvo de la planedo.

Ilia temperaturo, kemio, kurentoj kaj vivo stiras la tutmondajn ekvilibrojn kaj igas la Teron loĝebla por la homaro. Oceanoj estas la ĉefa reguliganto de la tutmonda klimato: ili sorbas forcejajn gasojn, inter kiuj ĉirkaŭ 30% el la karbona dioksido produktita de homoj. Ili ankaŭ provizas al ni akvon kaj oksigenon, kiun ni spiras. Pensu ke ĉiu dua aerspiro venas danke al oceanoj. Fine, oceanoj gastigas grandegajn rezervojn da biodiverseco. Pli ol 200 mil identigitaj specioj vivas en la oceanoj, sed la nombro de identigoj kreskas kune kun la esplorado. La homaro scias multe pli pri la luna surfaco ol pri la submara tereno.

Pli ol tri miliardoj da homoj tutmonde dependas de mara kaj marborda biodiverseco por sin subteni. Eŭropa Komisiono pritaksis ke la ekonomia efiko de la "blua" ekonomiko – kiu konsideras ĉiujn agadojn rilatajn al maroj) valoras pli ol 400 miliardojn da eŭroj jare, el kiuj pli ol 150 miliardoj por rekte maraj agadoj. Tutmonde la ekonomia valoro estis pritaksata je pli ol tri trilionoj da dolaroj.

Por ni esperantistoj gravas reliefigi la ligon inter oceanoj kaj lokaj komunumoj, precipe pri tradicioj, lingvoj kaj identeco. Sekve de la altiĝo de la marnivelo kaj la sekva translokiĝo de tutaj komunumoj, estas gravege certigi, ke la nemateria kultura heredaĵo estu gard-

ata kiel grava monda riĉeco. Ni bezonas paradigman ŝanĝon, el endanĝerigo de kultura diverseco al ĝia protekto kaj aprezo, en la perspektivo de vera povigo kaj profunda engaĝiĝo de la lokaj komunumoj en la efektivigan procezon de la Agendo 2030.

Taŭge agi pri oceanoj estas esenca tasko por la tuta homaro. Tial UN dediĉis al oceanoj apartan celon, la dekkvaran, en Agendo 2030. CDE14 strebas daŭripovan mastrumadon kaj protektadon de maraj kaj marbordaj ekosistemoj. Plibonigi konservadon kaj daŭripovan uzon de oceane bazitaj rimedoj per internacia juro ankaŭ helpos mildigi kelkajn el la defioj kiujn frontas niaj oceanoj.

**Kuriozaĵo**

La intertrakta debato ĉe Unuiĝintaj Nacioj estis komence aparte malfavora al enkonduko de aparta celo pri oceanoj. Ne klaris al pluraj landaj reprezentantoj ke sano de oceanoj estas influata de ĉiuj landoj – eĉ tiuj sen marbordo, kaj ke malbonfarto de oceanoj negative influas ĉiujn landojn. La lobiumado de la malgrandaj insulaj ŝtatoj fine sukcesis, ankaŭ danke al la mediacio de la Prezidanto de la Ĝenerala Asembleo, mem el malgranda insula ŝtato.

**Oceanoj en danĝero**

Ĉirkaŭ 40% de la oceano estas severe endanĝerigata pro poluado, agresa fiŝkaptado, perdo de marbordaj vivejoj kaj aliaj homaj aktivecoj. La oceanoj iĝas pli kaj pli acidaj. Ekde la komenco de la industria revolucio, oceana acidigo plialtiĝis je 26%. Sciencistoj pritaksas ke ĝi plu kreskos je 100-150% ĝis 2100, kun katastrofaj konsekvencoj por la mara vivo, kaj ne nur mara.

Plej multo de mara poluado venas el landaj fontoj kaj jam atingis alarmigan nivelon. Averaĝe, ĉirkaŭ 13.000 pecoj da plasta rubo troviĝas en ĉiu kvadrata kilometro da oceano.

**Mia sperto**

Kiel esploristo unue kaj nun profesoro pri maraj sistemoj kaj robotiko mia laboro rekte rilatas al oceanoj. Maraj sistemoj estas esencaj por interagi kun ĉi tiu medio. Ili nuntempe ludas ŝlosilan rolon en ekspluatado de maraj rimedoj, konservado de maraj medioj kaj sekurecaj aplikoj. Aŭtonomaj maraj sistemoj kiel memstaraj subakvaj robotoj ĉiam pli kapablas plenumi pli komplikajn misiojn inkluzive de monitoradaj kaj inspektaj taskoj en komplikaj medioj.

Mara robotiko reprezentas ŝlosilan ebligilon por atingi la celojn priskribitajn en CDE14. Gravas transdisciplina aliro, tiel ke maraj natursciencistoj kunlaboru kun inĝenieroj kaj robotiksciencistoj konkrete, cel-orientite, alportante konkretajn rezultojn. Nuntempe mi gvidas EU-financitan projekton "IMPACT" kun aliaj ok eŭropaj universitatoj fokusiĝante pri la kontribuo al la Agendo2030, kaj aparte al CDE14 fare de maraj robotikistoj.

**KION FARI?**

**Unuope:**

1. Esploru pri la rubociklo. Vi malkovros ke granda parto atingas rekte aŭ nerekte la oceanojn, eĉ se vi vivas tute for de la marbordo. Strebu redukti la rubon, kontrolu pri recikleblaj pakaĵoj.
2. Uzu alternativajn materialon al plasto. Ĝi venenigas la oceanojn.
3. Prefere evitu manĝi fiŝaĵon, sed almenaŭ certiĝu pri ĝia deveno el "daŭripova" fonto.
4. Volontulu por organizoj por oceana protektado aŭ alimaniere subtenu ilin.

**Grupe:**

1. Organizu prelegon kaj debaton pri la rolo de la oceanoj. Invitu spertulon, kaj diskutigu la partoprenantojn pri iliaj propraj kutimoj.

2. Kunlaboru kun aliaj lokaj asocioj por la protektado de maro / lago / rivero.
3. Organizu purigan ekskursan tagon, por purigi la strandon (aŭ alian lokon) por malpliigi la kvanton da rubo kiu rekte eniros la akvajn vojojn.

**Lande:**

1. Kunlaboru kun la nacia UN-asocio,
2. Aperigu artikolon pri oceanoj kaj ties graveco en la asocia bulteno,
3. Organizu apartajn eventojn pri la temo en la nacia kongreso,
4. Partneriĝu kun tutnaciaj asocioj pri la protektado de la oceanoj.

**Internacie:**

1. Kunlaboru en UN-iniciatoj pri la temo, partoprenu en la laboroj pretigaj kaj realigaj lige al la Oceanaj Konferencoj de UN, kaj rilatigu la temon al malaperantaj lingvoj kaj kulturoj,
2. Instigu transnaciajn kunlaborajn iniciatojn pri la temo.

**KION LEGI?**

- La retejo de UN Oceana Konferenco 2017: https://oceanconference.un.org/about
- La retejo de UN Oceana Konferenco 2020: https://www.un.org/en/conferences/ocean2020
- “Oceano kaj ni”, BBC Tero, Malfermo de UN Oceana Konferenco 2017: https://www.youtube.com/watch?v=2uuWN20Lc4E
- CDE14 Oficialaj Retpaĝoj ĉe UN: https://sdgs.un.org/goals/goal14
- https://www.un.org/sustainabledevelopment/oceans
- La retejo de la projekto IMPACT: http://impact.uni-bremen.de/

# CELO 15.
# **SURTERA VIVO**




***Said Pontes de Albuquerque***

**Protekti, restarigi kaj disvastigi daŭripovan uzadon de teraj ekosistemoj, daŭripove mastrumi arbarojn, kontraŭbatali dezertiĝon, haltigi kaj inversigi la degeneradon de grundoj kaj haltigi la perdiĝon de biodiverseco…**

La 17 Celoj, kompletigitaj per 169 celobjektoj aŭ subceloj, adoptitaj de Unuiĝintaj Nacioj (UN) en 2015, estas kerno de la ambicia Agendo 2030, gvidmarko de ŝtata interkonsento alvokanta la homojn por trovi plurdimensiajn solvojn al la defioj el utiligado de la natursistemoj. La 15-a celo, pri la surtera vivo, elstaras pro ties amplekseco: "*Protekti, restarigi kaj disvastigi daŭripovan uzadon de teraj ekosistemoj, daŭripove mastrumi arbarojn, kontraŭbatali dezertigon, haltigi kaj inversigi la degeneradon de grundoj kaj haltigi la perdiĝon de biodiverseco*."

Ĝiaj 12 celobjektoj proponas, ĝis 2030:

- *kontraŭbatali ekosisteman degradadon, ĉesigi perdon de biodiverseco;*
- *garantii la konservadon de montaj kaj enlandaj dolĉakvaj ekosistemoj;*
- *ĉesigi senarbarigon, redukti la degradadon de naturaj vivejoj;*
- *protekti minacatajn speciojn kaj eviti ilian estingon;*
- *dividi juste la avantaĝojn el utiligo de genetikaj rimedoj;*
- *fini ĉasadon kaj ŝakradon de protektitaj specioj;*
- *integri valorojn de biodiverseco en naciajn kaj lokajn planadojn;*
- *mobilizi financrimedojn por konservado kaj daŭripova utiligo de ekosistemoj, arbara mastrumado kaj rearbarigo.*

Milionoj da specioj kaj organismoj interagas en la ekosistemoj kaj biomoj, kiuj liveras manĝaĵan sekurecon, protekton al biodiverseco kaj hejmojn al indiĝena loĝantaro. Tamen, ilia ekspluatado kuntrenas bedaŭrindajn malutilojn, kiel malpliiĝon de arbara areo, precipe pro pliampeksiĝo de terkulturado kaj arbobruligado. Pli ol du miliardoj da homoj rekte dependas de agrikulturo, sed la uzata tero estas modere aŭ severe trafita. Ĉiuj biomoj ricevas premojn – tundro, tajgo, savanoj, kampoj, tropika, intertropika kaj ekvatora arbaroj. Dezertiĝo avancas tutmonde. Aldone, klimatvarmiĝo pligravigos la situacion kie akvo malabundas kaj ankaŭ kie hodiaŭ ĝi abundas. Agrikulturo uzas ĉirkaŭ 70% el la tutmonda dolĉakvo. Akvaj rimedoj jam provokas geopolitikajn konfliktojn.

De tempo al tempo oni strebas redukti senarbarigon, kiel en Amazonio antaŭ la jaro 2014[25]; tamen bedaŭrinda ampleksiĝo okazas nuntempe, probable por produktado kaj eksportado de sojo por bovnutrado. Sed feliĉe la tutmonda procento da protektataj biodiversecaj ter-areoj pliiĝis (de 33,1% en 2000 al 46,1% en 2018). Pli-malpli same okazis al dolĉakvaj kaj montaj protektataj areoj[26].

Laŭ la Interregistara Grupo pri Klimatŝanĝiĝo IPCC[27], se tutmonda varmiĝo superos la limon de du Celsiaj gradoj establitan de la Pariza Interkonsento, fruktodonaj teroj verŝajne transformiĝos en dezertojn kaj ekstremaj veterfenomenoj elmetos al risko la nutran sistemon.

UN jam delonge alvokas la homojn al vivkonduto, konsumado, manĝoproduktado kaj energiofontoj pli favoraj al naturaj sistemoj. Ĉe ĝiaj tribunoj, naciaj ĉefaŭtoritatuloj, sciencistoj kaj teknikistoj plurfoje atentigis pri la urĝo disponigi al ĉiuj socioj taŭgajn vivrimedojn, samtempe konservante la naturajn vivprocezojn kaj ties materiajn ciklojn. Ili nepre sugestis mediprotektan agadon laŭ diversaj nive-

25 De 27.772 $km^2$ en 2004 al 4.848 $km^2$ en 2014.

26 https://sustainabledevelopment.un.org/sdg15

27 https://www.ipcc.ch/srccl/

loj: individua, kolektiva, socia, scienca, teknologia, institucia, leĝnormiga, politika, nacia kaj internacia.

Aldoniĝis demandoj pri kiaj politikoj estu enkondukitaj por kontraŭbatali medipoluadon, misutiligon de agrosurfaco, dezertigon, tutmondan varmiĝon, kaj ankaŭ por favori ekologian agrikulturon kaj renovigeblajn energiofontojn. Same okazis pri la konsekvencoj de naturrimeda malŝparado, akcela industriigo, eksponenciala demografia pliiĝo, akcidentoj ĉe atomenergiaj centraloj, senarbarigo, gasaj forcejefikoj, kaj grandskala terkulturado por brutbredado. La nacioj ne povis plu nei la homan influon sur klimato-ŝanĝiĝo; tial ili plejparte konsentis plenumi planojn por malpliigi la elĵetojn en la atmosferon de karbona dioksido.

Signife aktualaj estas la vortoj de la tiama Prezidento de Brazilo, Lula da Silva, kiam li, en 2007, emfazis de sur UN-podio:

*Ni ne iluziiĝu: se la modelo de tutmonda disvolviĝo ne estos ŝanĝita, ampleksiĝos la riskoj de senprecedenca media kaj homa katastrofo. (...) Estas prezoj, kiujn la homaro ne povas pagi, ĉar kontraŭe ĝi povas detrui la materiajn kaj spiritajn fontojn de la kolektiva ekzistado. (...) Se ni volas savi la komunan posedaĵon, postuliĝas nova kaj pli ekvilibra distribuo de la riĉaĵoj, ĉu interne de ĉiu lando, ĉu internacie.*[28]

Nuntempe, la homaron skuas sinsekvo da katastrofoj (pluvegoj, inundoj, uraganoj, sekeco), manko de sanigado kaj de akvoprovizo. Krome, ĝin alfrontas tiaj plagoj, kia la koron-virusa pandemio, tiel intense tuŝanta ĉiujn naciojn kaj ilin pelanta al ekstremaj limoj de reaga kapablo. Ni ĉiuj, kompreneble, ne povas fuĝi el la streboj por protekto de la surtera vivo.

Ni, antaŭenigantoj de Esperanto, nature enviĉiĝas inter tiuj, kiuj rekonas la urĝecon de landaj kaj individuaj iniciatoj por malpliigi la negativajn intervenojn kontraŭ la Naturo.

28 Revuo Kontakto (2007:5): *Daŭripova disvolviĝo: vide el Brazilo.*

**KION FARI?**

**Individue, institucie, loke kaj nacie (kaj eĉ internacie…) ni povas:**
Studi, apogi, partopreni kaj disvastigi konojn pri: Tagordo 2030, mediprotektaj-sociekonomiaj UN-Institucioj kaj aranĝoj rilataj al la CDE.

Apogi politikojn favorajn al:

1. inspektado kaj kontrolado de senarbarigo;
2. kolekto de kampara imposto por eviti spekuladon pri teroj;
3. neaĉeto de sojo produktita en senarbarigitaj areoj;
4. nerajtigo de kreditoj al senarbarigantoj;
5. fermo al merkato por viando veninta el detruitaj areoj;
6. protekto de naturaj vegetaĵaroj kaj akvofontoj;
7. uzo de renovigeblaj energiofontoj.

**Krome ni povas:**

1. redukti viandokonsumon (pluraj miliardoj da bestoj estas mortigitaj jare pro homa konsumo)[29];
2. ŝpari akvon kaj energion;
3. plenumi recikladon kaj bonan trakton de forĵetaĵoj;
4. kontraŭbatali komercadon de bestoj;
5. eviti konsumismon;
6. utiligi veturilojn nur kiam necese;
7. eviti konsumon de plastaj sakoj.

**Kiel esperantistoj ni povas:**

1. Organizi diskutojn pri tiuj ĉi temoj en niaj lokaj kaj naciaj kunsidoj;
2. Verki artikolojn por la loka gazetaro, krei blogojn, mesaĝi per sociaj medioj;

29 http://www.fsp.usp.br/sustentarea/wp-content/uploads/2019/12/manifesto_sustentarea_en.pdf

3. Kun aliaj esperantistoj, trovu projektojn kiuj antaŭenigas la agadon menciitan ĉi-supre;
4. Planti arbojn, renovigi naturon, purigi la ĉirkaŭaĵon, kune kun niaj samideanoj;
5. Per tia praktika agado, plibonigi nian Esperanton kaj fari novajn ligojn kun esperantistoj en aliaj landoj.

# CELO 16.
# **PACO, JUSTO, FORTAJ INSTITUCIOJ**




***Ulrich Brandenburg***

Enhave la “Celoj por Daŭrigebla Evoluo” similas al registara programo: ili kovras vastan gamon da temoj, foje tre specifajn kaj ofte interligitajn. Sed ili turnas sin al multoble pli da agantoj. Realigi la celojn postulas la kunlaboron ne nur de pli ol 200 registaroj (kiuj ja almenaŭ aprobis ilin en la Ĝenerala Asembleo de UN), sed ankaŭ de ekonomiaj agantoj, de la civila socio kaj ĝiaj organizoj, de ni ĉiuj. Se vi traserĉas la reton, vi tie ankaŭ jam trovas bonan nombron da raportoj. Registaroj uzas la celojn kiel argumentojn por pravigi kion ili faras. En 2019 estis submetataj 142 libervolaj naciaj plenumraportoj. Neregistaraj organizoj (NROj) kontribuas al la debato, propagandas kaj helpas kompreni. La UN-sistemo fidele registras progreson kaj malprogreson. Almenaŭ en tiuj rondoj la mesaĝo do alvenis. “*Ni scias kian mondon ni volas*“, konstatas rezolucio 74/4 de la Ĝenerala Asembleo.[30] Sed kiel organizi la procezon al plenumo de la celoj?

Laŭ prijuĝo de multaj fakuloj la “institucia” celo 16 estas la plej komplika, plej malfacile difinebla kaj politike plej disputata. Ĝi postulas “*antaŭenigi pacajn kaj inkluzivajn sociojn por daŭrigebla evoluo, certigi aliron al justeco por ĉiuj kaj konstrui efikajn, respondemajn kaj inkluzivajn instituciojn je ĉiuj niveloj*” – apenaŭ io mankas en tiu listo. Aro da subceloj konkretigu tiujn postulojn kaj igu ilin statistike mezureblajn. Jen ilia listo[31]:

30 Politika deklaro de la Altnivela Politika Forumo pri Daŭrigebla Evoluigo kunvokita sub la aŭspicio de la Ĝenerala Asembleo (suplemento al la rezolucio 74/4 adoptita fare de la Ĝenerala Asembleo la 15-an de oktobro 2019), paragrafo 28

31 Bona priskribo de la 12 subceloj kaj 23 indikiloj pri progreso estas trovebla en angla lingvo sur SDG Tracker /Goal 16 (https://sdg-tracker.org/peace-justice)

16.1 *Signife redukti ĉiujn formojn de perforto kaj de mortokvotoj rilataj al ĝi ĉie ajn.*

16.2 *Ĉesigi misuzon, ekspluatadon, kontrabandon kaj ĉiujn formojn de perforto kontraŭ, kaj torturo de, infanoj.*

16.3 *Antaŭenigi la regadon de juro je nacia kaj internacia niveloj kaj certigi egalan aliron al justeco por ĉiuj.*

16.4 *Ĝis 2030 signife redukti kontraŭleĝajn fluojn de monrimedoj kaj armiloj, fortigi la retrovon kaj redonon de ŝtelitaj valoraĵoj kaj kontraŭbatali ĉiujn formojn de organizita krimado.*

16.5 *Signife redukti korupton kaj subaĉeton en ĉiuj formoj.*

16.6 *Evoluigi efikajn, respondecajn kaj travideblajn instituciojn je ĉiuj niveloj.*

16.7 *Certigi respondeman, inkluzivan, partoprenigan kaj reprezentan decidadon je ĉiuj niveloj.*

16.8 *Vastigi kaj fortigi la partoprenon de evoluantaj landoj en la institucioj de tutmonda regado.*

16.9 *Ĝis 2030 havigi juran identecon por ĉiuj, inkluzive registriĝon de naskiĝoj.*

16.10 *Certigi publikan aliron al informoj kaj protekti fundamentajn liberecojn konforme al naciaj leĝaroj kaj internaciaj interkonsentoj.*

16.a *Fortigi koncernajn naciajn instituciojn, inkluzive per internacia kunlaboro, por konstrui kapaciton je ĉiuj niveloj, precipe en evoluantaj landoj, por malhelpi perforton kaj kontraŭbatali terorismon kaj krimadon.*

16.b *Antaŭenigi kaj devigi sendiskriminaciajn leĝojn kaj politikojn por daŭrigebla evoluo.*

En la debato pri la "Celoj" formiĝis diversaj grupoj: iuj postulis prioritaton por la paco kaj eĉ strebis difini pacon kiel homan rajton, aliaj (ĉefe okcidentaj) partoprenantoj timis ke aparte eksponi la pacon povus malvalorigi la aliajn postulojn. Malgraŭ la apelacio de la tiam nova Ĝenerala Sekretario Guterres (enkonduka mesaĝo de

01.01.2017)[32] meti pacon en la unua loko, la okcidenta literaturo pri la "Celoj" ĝis hodiaŭ koncentriĝas je aliaj temoj. Eble pri sukcesoj – eĉ se nur etaj kaj partaj – registaroj raportas pli volonte, kaj iamaniere ĉiuj supre nomitaj subceloj ja ankaŭ kontribuas al daŭrigebla paco. Oni tamen ne forgesu la realecon.

Laŭ statistiko de UN 20 milionoj da homoj fuĝis el siaj landoj (kaj pliaj 41 milionoj fuĝis enlande): pro militoj, persekutoj kaj malriĉeco. La nombro de lokaj militoj triobliĝis inter la jaroj 2010 kaj 2020. Entute 93 milionoj da homoj dependas de humaneca helpo. Kiel paroli pri daŭripova evoluigo, se via hejmlando estas detruita, se oni mortigas viajn familianojn, se armitaj bandoj interbatalas je kostoj de la civila loĝantaro, se regantoj rekondukas siajn landojn en la mezepokon? La kontrasto estas okulfrapa. Ĉefe ĝi montras la krizon de institucioj en nia hodiaŭa "multpolusa" mondo. "*Ni scias kian mondon ni volas*" je la nivelo de abstraktaj celoj. Sed la obstakloj al realigo estas konataj kaj konkretaj: defendo de nacia suvereneco, religia ekstremismo, malkaŝa kaj senhonta naciismo, rezisto kontraŭ enmiksiĝo en internajn aferojn, malemo doni la necesajn rajtojn, monrimedojn kaj – jes – ankaŭ soldatojn al internaciaj organizoj.

La krizo de la internaciaj institucioj ne unuafoje fariĝis temo ankaŭ je la politika nivelo, almenaŭ en kelkaj landoj. Lastatempe formiĝis "Alianco por Multflankismo"[33]: multflankismo ne nur kiel teknika interrilato inter pluraj ŝtatoj aŭ kiel ludejo, kiu nek ĝenas nek multon utilas, sed kiel kunlaboro surbaze de komunaj valoroj kaj sekvendaj reguloj. Alianco do por pli efika internacia kunlaboro. La klimata ŝanĝiĝo bone ilustras la defion. Ne eblas solvi la problemon je la nivelo de individuaj nacioj aŭ eĉ kontinentoj. La rezistoj estas enormaj (pensu ekz-e pri la laborlokoj en tradiciaj industrioj);

32 Appeal for Peace from UN Secretary-General António Guterres, en: United Nations Secretary-General, 1 January 2017 (en ĉiuj oficialaj lingvoj de UN).

33 vidu sub https://multilateralism.org. Analizo germanlingva de prof-o Hans W. Maull aperis en SWP-Aktuell Nr. 11 /Februar 2020 (Stiftung Wissenschaft und Politik, Berlin).

samtempe kreskas la publika premo almenaŭ en okcidentaj socioj. Kaj la influo de registaroj estas limigita. Grandaj transnaciaj entreprenoj ofte havas pli da potenco ol ŝtatoj. Internacia kunlaboro ankaŭ necesas por malhelpi la disvastiĝon de la koronaviruso, por kontraŭi korupton, monlavadon, kontraŭleĝan komercon de armiloj.

La hodiaŭan praktikon de – senhelpa, kvankam bonvolema – multflankismo bone ilustras multaj UN-rezolucioj. Serĉado de kompromisoj estas necesa, sed apelacioj sen konsekvencoj nenion solvas. Precipe en la kazo de militaj konfliktoj ili nur subfosas la kredindecon de la institucioj. La sperto de la pasintaj jardekoj montras ke pacigi eblas nur kun la akordo de la ĉefaj agantoj kaj iliaj sponsoroj, kio en ideala kazo kondukas al klara mandato kaj efika kunlaboro de internaciaj institucioj per ĉiuj civilaj kaj – se necese – militistaj rimedoj. Tiaj kazoj bedaŭrinde malabundas. La "Celoj" estas honorinda provo konsciigi ĉiujn respondeculojn kaj la mondan publikon pri la riskoj: la risko de militoj kaj pliaj milionoj da rifuĝantoj, la risko ke venontaj generacioj devos pagi por nia neglekto, la risko forbruligi la estontecon de nia planedo. Ili ankaŭ montras kion ideale necesas fari. Por havi efikon ili devus atingi la mondan publikon kaj instigi premon desube. La monda publiko – tio estas pli ol nur la naciaj registaroj kaj NRO-funkciuloj bone regantaj la anglan.

## Agadoj fareblaj de esperantistoj (landaj asocioj, lokaj grupoj, unuopuloj, junuloj)

Neniu el la temoj menciitaj en Celo 16 kaj ĝiaj subceloj rekte rilatas al lingvaj rajtoj, lingva diskriminacio aŭ lingvaj aspektoj de internacia komunikado. Esperantistoj estu videblaj kaj partoprenu en debatoj pri UN-temoj. Sed ili estas malmultnombraj: ili koncentrigu siajn fortojn al temoj kun sufiĉa bazo por argumentado.

Rilate al la specifa Celo 16 la esperantista argumentado estas tiel abstrakta kaj ambicia kiel por la "Celoj" entute: La problemoj menciitaj estas tutmondaj. Solvi ilin eblas nur per tutmonda kunlaboro, kun la aktiva subteno de civitanoj ĉie ajn. Por subteni necesas kompreni. Egalrajta monda komunumo de civitanoj ne povas estiĝi kaj funkcii sen komuna lingvo.

**KION FARI?**

**Unuope:**

1. La diverseco de problemoj prezentataj sub Celo 16 estas granda. La ĉefa tasko de esperantisto estas klerigi sin pri tiuj problemoj, interveni por subteni politikajn elpaŝojn en tiu direkto, kaj pli bone kompreni la principojn de internacia kunlaboro, de tielnomata multflankismo, laŭ kiu la ŝtatoj pretas trovi ekvilibron inter suvereneco kaj ties cedo por la komuna bono.
2. Klerigu vin en via propra lingvo, sed ankaŭ akiru la vortprovizon kiun vi bezonas por prezenti la temon al esperantistoj, kaj instigi debaton.
3. Klopodu difini la rolon de lingvoj en la realigo de Celo 16.

**Grupe kaj lande:**

1. La 24-a de aprilo estas la Internacia Tago de Multflankismo – bona temo ne nur por grupa debato, sed ankaŭ por atentigi politikistojn pri la graveco de internacia kunlaboro, kontakti la lokan gazetaron, kunlabori kun UN-asocioj, disvastigi informojn per sociaj medioj.
2. Organizu debatojn kaj klerigajn sesiojn en via loka grupo. Kio estas paco? Kiel oni povas plifortigi ĝin? Kiel la diversaj ŝtatoj povas pli bone kunlabori? Kion fari pri la konsekvencoj de malpaco (kolapso de institucioj kaj de juraj sistemoj, rifuĝintoj, mortoj)? Kion oni povas fari por

apliki la leĝojn, malhelpi internacian krimadon? Specife, kion via loka grupo povas fari komune?

3. Organizu similajn sesiojn en landaj kongresoj. Stimulu debaton en Esperanto-revuoj, en sociaj medioj.
4. Kaj, ĉefe, pensu realisme, sobre, konsekvence! Ni esperantistoj emas al subitaj entuziasmoj, sed la vojo al paco estas longa, ŝvita, kruta.

# CELO 17.
# **PARTNERECOJ POR LA CELOJ**

***Humphrey Tonkin***

La deksepa el la Deksep Celoj samtempe okupas unuan kaj lastan lokon, en la senco, ke, se en la komenco la diversaj partioj ne kunlaboras, nenio estos atingebla en la fino. La deksepa celo emfazas la fakton, ke realigo de la Celoj dependas ankaŭ de jam ekzistantaj kaj novaj partnerecoj. Lastatempa *Deklaro de la Konferenco de Neregistaraj Organizoj* (CoNGO) emfazis, ke la plenumo de Agendo 2030 (t.e. la Celoj) postulas la aktivan engaĝiĝon de amaso de partnerecoj inter internaciaj unuoj, registaroj, lokaj instancoj, la privata sektoro, kaj la civila socio en ĉiuj siaj manifestiĝoj.[34]

Ĉiu lando de la mondo, eĉ la plej izolita, havas siajn interkonsentojn kun aliaj landoj. Multaj landoj estas membroj de regionaj organizoj pli aŭ malpli intense kunlaborantaj – la Eŭropa Unio, la Afrika Unio, diversaj interkonsentoj pri landlimoj, dogana kunlaboro, komercaj interkonsentoj. Se la koncernaj mekanismoj ne harmonias kun la Celoj, la Celoj ja malfacile realiĝos. Sekve, ĉiu membro de Unuiĝintaj Nacioj ekzamenu tiujn siajn ligojn kaj laboru por konformigi ilin al la strebado por atingi la Celojn. Kiel unuopuloj, ni povas malmulton fari por realigi tion, sed en kunlaboro kun neregistaraj organizoj, kaj kun elementoj de la civila socio ĝenerale, ni povas per nia atentemo influi niajn registarojn tiudirekten.

La 19 subceloj ligitaj al Celo 17 komenciĝas per io ege baza: reformo kaj efikigo de la imposta sistemo en la diversaj landoj kaj la

34 (La Deklaro estas legebla en Esperanto ĉe http://ngocongo.org/wp-content/uploads/2020/03/CoNGO-Declaration-UN75-Esperanto-1.pdf)

kolektado de impostoj kaj aliaj pagoj. Se mankas la financa kapablo, malmulto fareblas entute. La supremenciita deklaro de CoNGO emfazas, ke "*Korupto, kontraŭleĝaj financaj fluoj kaj impostevito subfosadas la kapablon de registaroj mobilizi rimedojn*". Kaj, paralele kun efike funkciantaj internaj financaj sistemoj, gravas, ke la sistemoj de internacia financado bone funkciu. Eĉ se ne eblas plene forigi certan spiriton de internacia komerca konkurenco, oni ĉefe celu kunlaboron (ekzemple pere de la Monda Komerca Organizo) – kaj precipe efikan internacian investon, kiu servas unuavice la landojn kie oni investas, kaj ne pure kaj nure la investantojn. Ŝtato kiu dronas en ŝuldoj neniel povas prosperi. Rolas en tiu procedo de justa financa mastrumo la Monda Banko kaj la Internacia Mona Fonduso, kies politikoj bedaŭrinde ne ĉiam harmonias inter si, kaj ankaŭ la Grupo G20, kiu celas stabilecon en la internacia financa ordo, sed ne nepre kun adekvata atento al la granda nombro de malgrandaj ekonomioj kiujn ĝi ja ne reprezentas.

Gravas ankaŭ kunlaboro pri scienca kaj teknologia scio. Kiel klare montras en la nunaj tagoj kunlaboro pri medicino, internaciaj problemoj ne povas solviĝi nur je naciaj niveloj: kunlaboro estas absolute esenca. Ni emas supozi, ke malriĉo, ekzemple, estas kvazaŭ pasiva fenomeno: ĝi havas siajn viktimojn, sed ne transdoniĝas infekte. Tio estas erara pensado: malriĉo povas vastiĝi same kiel malsano se oni ne laboras por minimumigi ĝin – kaj ne nur klopodas resanigi sed ankaŭ preventi la malsanon. Bona kunlaboro en scienco kaj teknologio alportas amason da avantaĝoj, ankaŭ en evoluigo de daŭripovaj teknologiaj solvoj. Tia kunlaboro parte dependas de malfermaj institucioj – universitatoj, taŭge reguligitaj komercaj entreprenoj, bonaj registaraj politikoj. Ĝi dependas de bonaj edukaj sistemoj, inkluzive de universitatoj. Kaj necesas ne nur krei scion sed ĝin dividi kun tiuj kiuj bezonas ĝin.

Malantaŭ ĉio ĉi staras unu klara kaj neevitebla principo: mondaj problemoj postulas mondan aliron. Realigo de la Celoj dependas de

la kapablo de la diversaj ŝtatoj malferme kunlabori – preti cedi por gajni, preti rigardi la tutan mondon kiel sian kolektivan respondecon. Tia multflankismo, tia preteco kunlabori, estas kvalito tro malofte renkontata en la hodiaŭa mondo.

Ni skribis multe pri ŝtatoj, sed kion diri pri individuoj? Ekde la lanĉo de Agendo 2030 (t.e. la 17 Celoj), oni prave emfazas, ke la ŝtatoj ne povas atingi la Celojn, aŭ eĉ progresi tiudirekten, sen la aktiva subteno de la publiko. Atingado de la Celoj dependos de kunlaboro inter ĉiuj sociaj niveloj kaj ĉiuj sociaj institucioj, inkluzive lernejojn kaj universitatojn, religiajn instituciojn, ĉambrojn de komerco, sindikatojn – la listo senfinas.  Tiuj institucioj gravas ne nur pro la agado, nacia kaj internacia, kiun ili plenumas, sed ankaŭ kiel influantoj de publika opinio.

Esperantistoj emas esti aktivaj en siaj socioj. Ili havas altan edukan nivelon. Ili ne timas esprimi siajn opiniojn. Multaj estas membroj aŭ aktivantoj en diversaj organizoj kaj institucioj.  Fakte la Esperanto-movado povas ludi aparte gravan rolon en influo de publika opinio pro tio, ke ĝi estas plene internacia komunumo, kiu pere de sia agado kaj siaj membroj, tuŝas amason da aliaj organizoj, movadoj, establoj.

Kaj se oni volas formi partnerecojn, indas komenci per plena interkompreniĝo. Ni esperantistoj bone scias, ke la monda lingva reĝimo estas neegala, maljusta. Homoj en riĉaj landoj, kosmopolitaj, ofte vojaĝantaj, ĝuas grandan avantaĝon pro sia scio de la lingvoj en kiuj okazas internaciaj intertraktoj; sed multaj homoj, en landoj riĉaj sed plejparte en landoj malriĉaj, estas ekskluzivitaj el la internacia dialogo, la internacia partnereco. Iliaj voĉoj restas ne atentataj. Partnerecoj por la Celoj komencu per inkluzivo de ĉiuj homoj, el ĉiuj landoj kaj lingvoj, en la dialogon – do en kreo de inkluzivaj kondiĉoj en kiuj tiu dialogo okazu. Se homoj ne povas partopreni en formulado de la solvoj, ili poste malmulte investos sian energion en plenumo de tiuj solvoj.

**KION FARI?**

**Unuope:**

1. Interesiĝi pri mondaj sistemoj. Eduki sin pri internaciaj institucioj. Vi povas komenci per la retejo http://www.esperantoporun.org, kie vi ekzemple trovos la starpunktan dokumenton de UEA pri la Celoj, http://www.esperantoporun.org/kiuj-ni-estas/niaj-starpunktoj/la-celoj-por-dauripova-evoluigo-cde-la-arto-traduki-vortojn-en-sangigon/
2. Interŝanĝi ideojn kaj spertojn kun esperantistoj el aliaj landoj, per personaj kontaktoj, sociaj medioj ktp.
3. Legi tiujn Esperanto-revuojn kiuj okupiĝas pri mondaj demandoj, kiel ekzemple *Kontakto* kaj *Monato.*
4. Legi la informilon de la oficejo de UEA ĉe UN, troveblan ĉe la supremenciita retejo.

**Grupe:**

1. Sekvi la edukajn vojojn kiujn ni sugestas ĉi-supre por individuoj, sed tion fari ankaŭ per diskutoj kun aliaj esperantistoj.
2. Elekti iun temon kiu rilatas al partnerecoj kaj organizi kunsidon ĉirkaŭ ĝi.
3. Kunlabori kun aliaj lokaj organizoj kiuj interesiĝas pri internaciaj aferoj.
4. Inviti esperantistojn kiuj bone konas internaciajn aferojn por skajpi kun via loka grupo, aŭ organizi Zoom-kunsidojn kun ili.

**Lande:**

1. Formuli starpunktajn dokumentojn en via landa asocio, aŭ faka asocio, pri la demandoj supre menciitaj, kaj uzi ilin por interveni ĉe registaraj instancoj, ĉe politikistoj, kaj kun influaj personecoj.
2. Labori per naciaj organizoj, kiel ekzemple via landa asocio pri UN.
3. Verki kaj publikigi artikolojn.

# KELKAJ SPECIALAJ TAGOJ DE UNUIĜINTAJ NACIOJ

[Kompleta listo:
http://www.un.org/en/sections/observances/international-days/]

| | |
|---|---|
| 24 januaro | Internacia Tago de Edukado |
| 27 januaro | Internacia Memortago al Viktimoj de la Holokaŭsto |
| 21 februaro | Internacia Tago de la Gepatra Lingvo |
| 8 marto | Internacia Virina Tago |
| 21 marto | Internacia Tago por Elimino de Rasa Diskriminacio |
| 24 aprilo | Internacia Tago de Multflankismo |
| 15 majo. | Internacia Tago de Familioj |
| 21 majo | Monda Tago por Kultura Diverseco por Dialogo kaj Evoluigo |
| 20 junio | Monda Tago de Rifuĝintoj |
| 30 julio | Internacia Tago de Amikeco |
| 9 aŭgusto | Internacia Tago de la Indiĝenaj Popoloj de la Mondo |
| 12 aŭgusto | Internacia Junulara Tago |
| 21 septembro | Internacia Tago de Paco |
| 27 septembro | Monda Turisma Tago |
| 30 septembro | Internacia Tago de Tradukado |
| 1 oktobro | Internacia Tago de Pli Aĝaj Personoj |
| 2 oktobro | Internacia Tago de Neperforto |
| 24 oktobro | Tago de Unuiĝintaj Nacioj |
| 16 novembro | Internacia Tago por Toleremo |
| 20 novembro | Universala Tago de Infanoj |
| 10 decembro | Homrajta Tago |

# NIAJ KONTRIBUINTOJ

**Allan Argolo** estas sanitara inĝeniero el Rio-de-Ĵanejro, Brazilo, kaj esploras pri mikropoluaĵoj en surfacaj kaj kloakaj akvoj. Estrarano de Asocio Esperantista de Rio-de-Ĵanejro kaj BEJO-aktivulo.

**Guillaume (Gijom') Armide** estas franca muzikisto, "eko-konsilisto" de la lernejo ÉCO-Conseil, laboranto en loka komunumo kaj asocio por fortigi edukadon pri daŭripova evoluigo.

**Ulrich Brandenburg** estas emerita ambasadoro de Germanio. Dum sia profesia vivo li ĉefe respondecis pri sekureca kaj defenda politiko. Li estas denaska esperantisto.

**Renato Corsetti** estas pensiiĝinta profesoro pri psikolingvistiko en la Universitato de Romo kaj iama prezidanto de UEA.

**Mark Fettes** estas profesoro pri edukado en Vankuvero, Kanado, kaj antaŭa prezidanto de Universala Esperanto-Asocio.

**Heidi Goes** estas prezidanto de Tutmonda Esperantista Vegetarana Asocio, verkis librojn pri la Esperanto-movado en Afriko kaj en Indonezio kaj doktoriĝas pri la konga lingvaro.

**Éric Hamelin** estas sociologo kaj urbologo en Parizo, esperantisto ekde la jaroj 2000, kunaŭtoro de libro pri urba disrampo.

**Christoph Klawe** estas germana neŭrologo, psikoterapiisto kaj psikiatro en Trier, Germanio. Li estas specialisto pri multobla sklerozo kaj prezidanto de UMEA.

**Rakoen Maertens** estas belga doktoriĝanto ĉe la Universitato de Kembriĝo. Li estas reprezentanto de UEA kaj TEJO ĉe Unuiĝintaj Nacioj kaj Unesko.

**Francesco Maurelli** estas profesoro pri maraj sistemoj kaj robotiko ĉe Jacobs University Bremen, Germanio, iama aktivulo en TEJO, nun komitatano de UEA.

**Alvaro Motta** estas ekonomikisto el Rio de Janeiro, Brazilo, fakulo pri energio kaj klimatŝanĝiĝo, delegito de UEA.

**Giorgio Novello** estas itala diplomato, iama ambasadoro en Norvegio kaj Islando; nuntempe vic-prezidanto de spaca firmao; membro de la Honora Komitato de UEA.

**Said Pontes de Albuquerque** estas eks-instruisto de Fiziko kaj emerita stabano ĉe la Parlamento de la Ŝtato Minas Gerais, Brazilo, kie li laboris kiel konsultisto pri mediprotekta leĝaro.

**Orlando Raola** instruas kemion altlerneje en Norda Kalifornio, Usono. Inter liaj plej ŝatataj kursoj troviĝas Mediprotekta Kemio. Membro de la Akademio de Esperanto, UEA Estrarano.

**Manuela Ronco** studis pri interkultura komunikado kaj sociologio. Iama TEJO-aktivulo kaj oficisto, en 2014 ŝi kunfondis "Egalecen", la unuan Esperantan blogon pri feminismo kaj socia justeco.

**Tamás Slezák** estas minejinĝeniero, entreprenisto en Nord-okcidenta Hungario. Gvidanto de transportfirmao, li krome okupiĝas pri elektraj veturiloj, verda energio kaj kemia reciklado de plastaĵoj.

**Humphrey Tonkin** estas emerita universitata prezidanto kaj profesoro pri humanistiko, iama prezidanto de Universala Esperanto-Asocio kaj nun UEA-reprezentanto apud UN Novjorko.

**Rafaela Urueña** estas emerita profesoro pri internacia juro kaj internaciaj rilatoj en la Universitato de Valladolid, Hispanio, specialisto pri medio-protektado kaj juro de la maro, kaj iama prezidanto de la Hispana Esperanto-Federacio.

**Manfred Westermayer** estas ekologia kemiisto, kunfondinto de Verda Partio en Germanio kaj sekretario de Asocio de Verduloj Esperantistaj, kunlaboranta faka asocio de UEA pri ekologio.

Antaŭ vi troviĝas gvidilo al la Deksep Celoj por Daŭripova Evoluigo, kiun Unuiĝintaj Nacioj lanĉis en la jaro 2015, kun aprobo de ĉiuj siaj membraj ŝtatoj. La Celoj, kune kun siaj subceloj kaj aliaj detalaj planoj, formas la bazon de la evoluiga strategio de UN dum la periodo 2015-2030.

Tiu ĉi gvidilo celas informi vin pri la Celoj kaj doni sugestojn pri kiel vi kaj viaj esperantistaj kolegoj kaj konatoj povas engaĝiĝi en kunlaboro por realigi ilin.

Ni petis deksep homojn kun apartaj kvalifikoj prezenti en tiu ĉi gvidilo la deksep Celojn. Kun ilia helpo, ni ankaŭ kunmetis etan kolekton de ideoj pri la manieroj laŭ kiuj vi povos kunlabori en realigo de la Celoj kaj utiligi viajn unikajn kontaktojn tiurilate.

Humphrey Tonkin
*(en sia "Antaŭparolo")*

Eldonita en kunlaboro kun Universala Esperanto-Asocio.

**MONDIAL**
Novjorko

www.esperantoliteraturo.com

ISBN 978-1-59569-410-2
90000
9 781595 694102